

EREVANA ŜTATA UNIVERSITATO
INSTITUTO DE ARMENSCIENCAJ
ESPLORADOJ

EDGAR HILZENRAT

LA FABELO DE LA LASTA PENSO

ROMANO

LIBRO TRIA

EREVAN
ELDONEJO EŜU
2017

Հայերենից էսպերանտո թարգմանեց
Մասնագիտական խմբագիր՝

ՍՈՒՍԱՆՆԱ ԳԵՎՈՐԳՅԱՆԸ
ԵՐՋԱՆԻԿ ԳԵՎՈՐԳՅԱՆ

ՀԻԼՋԵՆՐԱԹ ԷԴԳԱՐ

ՎԵՐՋԻՆ ՄՏՔԻ ՀԵՔԻԱԹԸ: ՎԵՊ/Է. Հիլզենրաթ: -Եր.: ԵՊՀ հրատ., 2017,
168 էջ:

Գերմանագիր հրեա Էդգար Հիլզենրաթի այս վեպը նվիրված է 1915 թ. Հայոց ցեղասպանությանը: Այն լույս է տեսել 1989 թ. և նույն տարում արժանացել «Ալֆրեդ Դյոբլին» մրցանակի:

Esperantigis: doktorino **SUSANNA GEVORGJAN**
Speciala redaktoro: **JERĜANIK GEVORGJAN**

Hilzenrat E.

La fabelo de la Lasta Pesno. Romano (Edgar Hilzenrat), esperantigis S. Gevorgjan.
Eldonejo de Erevana Ŝtata Universitato. 2017j, 168 paĝoj.

Origine judo Edgar Hilzenrat estas germanskribanta verkisto. Li naskiĝis en Lejpcigo, en 1926. En 1938-a jaro li elmigriĝis el Germanio kaj, trapasinte multajn landojn, en 1951 ekloĝis en Usono. En 1975 Edgar Hilzenrat revenis Germanion – Berlinon. Jam estinte aŭtoro de kalkaj romanoj, Hilzenrat en 1989 eldonis tiun ĉi romanon, dediĉitan al Armena genocide. La verko tuj meritis al premion “Alfred Djoblin”. Unu el herooj de romano Tovma Ĥatisjan - filo de ĉefa hero, naskiĝis en 1915 dum la tagoj de Armena Granda masakro – dum la deviga perforta elpelado el patrujo, kaj mortis en 1988, en jaro de masakro en azerbajĝana urbo Sumgaito. El lia lasta penso naskiĝas kruela fabelo. Pere de dialogoj inter la fabelisto kaj la heroo antaŭ ni reviviĝas teruraj eventoj de Granda masakro. La romano estas tradukita en multnombrajn lingvojn.

ISBN 978-5-8084-2182-0

© “Eldonejo de Erevana Ŝtata Universitato”, 2017

© Susanna Gevorgjan, 2017

Libro tria

1.

Neniu scias, kial la fabelistoj iam rapidas, lasas ceterajn jarojn kaj rakontas tion, kion konsideras pli gravan. Mi – via fabelisto, ne estas escepto. Kaj tiel, mi ne bezonas eksplikon pri tio, kial mi indiferece flugis preter unuaj jaroj de nova jarcento. En 1908-a jaro okazis detronigo de sultano Abdul Hamid, la kolapso de regado de hamidianoj, uzurpo de registro de junturkoj. Tiam la rusoj celis Bosporon, la anglanoj revis pri plej mallonga vojo al Hindujo tra la Turkujo. Tiam pli malgrandaj kaj grandaj ŝtatoj, kiuj avide rigardis pufiĝintan kukon – restitan post Abdul Hamid. Ĉiu volis detranĉi pecon de tiu ĉi kuko por si, la germanoj same. Sed la germanoj estis la plej saĝaj, ĉar povis kaŝi siajn neniam satiĝintajn okulojn malantaŭ grizaj, malvarmaj nepenetreblaj monokloj. La germanoj provizadis armilojn kaj sendadis siajn oficirojn perfektigi turkojn. Germanaj perantoj vivis en Berao – en konstantinopola kvartalo, plenita de vendejoj kaj luksaj hoteloj. La germanoj por turkoj konstruis fabelan fervojon – nomitan Bagdada fervojo. Ili ĉitian fervojon konstruis facile, per ŝtalo, fero, fajro kaj konstruis ridetante, kiel signo de sia majstreco, progreso kaj bonvoleco. Kaj okazis... tiel, ke inter apogiloj, senditaj de grandaj kaj malgrandaj ŝtatoj al malsanulo ĉe bospora bordo, la germanaj lambastonoj estis la plej taŭgaj.

Dum Balkana milito je mallonga tempo mi flugis en Bulgarion, sed baldaŭ revenis, por ke post la elpafoj en Sarajevo akompani germanajn oficirojn ĝis Bekiro. Tie samtempe mi turnadis super la urbo kaj finfine kun mia ombro malleviĝis sur la Beatecpordego.

- Antaŭ kelkaj tagoj ni aŭdis elpafojn, - diris mia ombro.
- Ili estis saraevaj elpafoj, - diris mi.
- Aĥ, jen kiel! - diris mia ombro.
- Jes, - diris mi.
- Sed kial ni ne estis tie?
- Ĉar mi ne volis vidi kial antaŭ amaso sensangiĝas la aŭstria reĝido kaj lia edzino.
- Ĉu ni povus ŝanĝi ion?
- Ni nenion povus ŝanĝi.

Ankoraŭ ne venis tempo de kondamnitaj. La nigraj kroĉoj de Beatecpordego dum sekvontaj semajnoj ankoraŭ estis la samaj.

- La tempo de kondamnitaj ankoraŭ ne estis veninta, - diris mi en fino de somero al mia ombro.
- Kiujn oni pendumos?
- Armenojn.
- Kiam?
- Iam, - diris mi. - Iam. Mi ankoraŭ ne scias. Hodiaŭ la turkoj proklamis armenan mobilizon. Hodiaŭ estas la 3-a de aŭgusto de 1914-a jaro.

- Kiel pasis vojaĝon de Vardan tiam, en la 1898-a, al Ameriko? - demandis mia ombro.
- Nu, pasis diversmaniere, - diris mi.

- Kaj kio okazis kun Anahit?

- La pastro kaj Bjulbjul zorgis pri knabineto kun brulaĵoj. Ŝi plu ne havis vizaĝon, sed la okuloj radiigis tian lumon, kvazaŭ ŝiaj okuloj estis vidintaj Kriston. Kaj ĉar la okuloj radiigis tian helegan lumon, nemalfacile estis por pastro trovi duongepatrojn – dezirintajn filinigi ŝin kaj eduki infanon laŭ Krista kredo. La pastro fidis Bjulbjul, sed ŝi ne estis kristanino. Tiele, troviĝis novaj gepatroj por eta knabino, geedza paro sen idoj, vivanta sur periferio de vilaĝo.

Duongepatroj de Anahit estis bredadistoj de silkraŭpoj Jeremjan kaj lia edzino, kiu estis nefekunda, kaj ŝi dum sia tuta vivo havis sekajn mamojn. Ili trovis iun nutristinon por knabineto, ankaŭ gebaptopatrojn, por ke ili baptu knabineton.

Kaj tiam pastro Gabriel Hamadjan diris al Hakob:

- Kristo savis etan knabineton. Kaj laŭ Lia volo bonkora iu trovis etulinon Anahit.

- Ĉu temas pri mia filo Vardan?

- Jes.

Mia filo volas edziĝi kun ĉi tiu knabino, kiam venos tempo, - diris Hakob, - ĉar, verŝajne, tiel estas la volo de nia Savanto, ke ili unuiĝu.

- Tiam, do estu tiel, - diris la pastro.

- Sed ŝin ne povas nutri la sama virino, kiu estis nutrinta mian Vardan, ĉar tio estas malpermesita, se ili devos edziĝi.

- Tiam vi trovu alian nutristinon, - diris la pastro.

- Kaj la ruĝharula forĝisto ankaŭ ne povas esti ŝia baptopatro, kaj lia edzino ne povas esti ŝia baptopatrino, ĉar ili estas gebaptopatroj de mia filo.

- Jes, estas malpermesita havi la samajn gebaptopatrojn, - diris la pastro, - se ili iam iĝos geedzoj.

- Tiam mi zorgos, ke Anahit havu aliajn gebaptopatrojn. Mi ankaŭ parolos kun la forĝisto, kiu jam estis dirinta, ke si volus fariĝi baptopatro de Anahit, - diris Hakob.

- Faru tiel,- diris la pastro. - Ekspliku por forĝisto, kial li ne povas esti baptopatro de Anahit.

Baldaŭ Hakob trovis alian nutristinon kaj aliajn gebaptopatrojn. Baptante infanon, ili ŝin nomis Anahit, ĉar Anahit estas la diino de fekundeco. Kiu revivis, devas esti fekunda, por ke la diablo vidu, ke la Dio vane ne semas.

Hakob kun bredadisto de silkraŭpoj Jeremjan interŝanĝis monerojn, poste monerojn ili ĵetis en sanktan fajron de toniro. Poste ili eligis monerojn el fajro, blovis kaj kraĉis sur siajn manplatojn kaj ili ree konservis monerojn.

Kiam Vardan veturis al Ameriko, zorganta patro de Anahit diris al Hakob:

- Via filo estas fianĉita kun mia filino. Kion li serĉas en Ameriko?

- Mi ne scias, - diris Hakob, - li diris, ke deziras fariĝi poeto.

- Ĉu pro tio li devos veturi al Ameriko?

- Verdire ne, - diris Hakob kaj daŭris, - verŝajne li timas de **Mec Depk** – iam komencotan grandan masakron, ĉar neniuj estos savita. Aŭ lin allogas malproksimaj lokoj, ĉar li estas juna kaj ankoraŭ ne scias, ke la radikoj estas pli gravaj, ol oraj fruktoj – penditaj sur tieaj arboj.

- Li verŝajne volas fariĝi milionulo, - diris la bredisto de silkraŭpoj.

- Li vere fariĝos milionulo, - diris Hakob, - ĉar ĉiu veturanto al Ameriko fariĝas milionulo. Poste Vardan revenos forkonduki Anahit.

- Sed li devos atendi ĝis la sangofluo inter femuroj de mia filino.

- Li atendos, - diris Hakob.

- Sed en Ameriko estas multaj virinoj, kiuj montras ne nur siajn piedojn, - diris Jeremjan.

- Ĝuste, - diris Hakob, - sed mi konas mian filon. Li revenos.

- Sed ĉu ne malhelpos lin, ke la fianĉino ne havas vizaĝon, havas nur okulojn?!

- Li tion scias, - diris Hakob. - Li revenos!

- Ĉu li forkondukos Anahit al Ameriko aŭ revenos Hajastanon kun siaj milionoj, por ke ekloĝu ĉi tie kun Anahit? - demandis bredisto de silkraŭpoj.

- Se ne komencos **Mec depk**, - respondis Hakob, - povos esti, ke mia malpliaĝa filo kun siaj multaj milionoj ne revenos Amerikon. Li edziĝos kun Anahit kaj aĉetos ĉi tie vilaon.

- Sed en ĉi tiu regiono nenia vilao ekzistas, - diris Jeremjan.

- Tiu okaze li konstruos, - supozis Hakob. - Aŭ li aĉetos ĝin en urbo Vano, verŝajne en armena kvartalo Ajgestan¹ aŭ tuj sur bordo de la lago Vano, kie vivas mia riĉa parenco.

- Tiu estas tre bela lago, - diris bredisto de silkraŭpoj.

- Ĉu la sapon oni portas el lago?

- Jes, el tie, - diris Hakob. - Kiu vivas proksime bordo,

¹ Ĝardenaro /armene/.

nur bezonas preni akvon kaj ĝin vaporigi. Kio restos simila al salo, estos sapo.

- Sekvante li ne bezonas aĉeti sapon, car povos senpage ricevi el lago.

- Jes, - diris Hakob.

Nokte, antaŭ forveturo, Vardan en sonĝo vidis pastron Gabriel Hamadjan. Li diris:

“Se ĝuste, filo mia, ke tie – en Ameriko, la tritiko estas el oro, prenu falĉilon, eniru kampojn de tiu lando kaj falĉu orspikan tritikon, ĝis akridoj ne manĝus ĝin. Kaj se ĝuste, filo mia, ke en grandaj amerikaj urboj mono estas abunde faligita sur stratoj, prenu balailon kaj akumulu, ĝis alkuros ratoj. Sed se vi rimarkus, filo mia, ke en oraj grajnoj kaj en akumulaĵoj sidas nur malvarmaj hirudoj – forsuĉantaj varmecon el via koro kaj trezorojn el via animo, rompu tenilojn de falĉilo kaj balailo, ĉar ili estas netaŭgeblaj iloj, kaj iru vian ĉambreton, kie vin neniu vidas kaj prenu vian verkistan anserplumon kaj fariĝu ĝi je la fiŝhoko”.

“Pastro, kion mi ĉasu per tiu fiŝhoko”?

“Kantojn el via koro, filo mia, kaj trezorojn el via animo, kiujn povas manĝaĉi nek akridoj, nek ratoj, nek hirudoj”.

La malsaĝa akvoportisto sciigis, ke Vardan estis savinta vivon de knabineto. Sed aŭdis ankaŭ la diraĵon de pastro: “La knabineton savis nia Jesuo Kristo”. Kaj ĉar la akvoportisto estis homo, kies animo estis malriĉa kaj la pensumado malsana, li pensis, ke Vardan kaj Kristo estas la sama persono. Kaj tiel, kiam ĉiufoje aperis Vardan, la akvoportisto komencis laŭte balbuti, kaj skuante manojn kuris malantaŭ li.

Foje, li akompanis Vardan ĝis Katnaghbjur. Kaj ĉar li aŭdis, ke la birdo de Sankta Sargis forflugis de tiu ĉi puto, por ke alkonduki Kriston al Anahit, geniuis antaŭ Vardan kaj balbutinte kisis liajn piedojn. Hazarde tie venis la pastro. Poste venis ankaŭ kelkaj aliaj homoj. Ili incitis akvoportiston, kaptis lin kaj kvazaŭ ili volis ĵeti lin en puton. Rapide alvenis ankaŭ Hakob, sed li nur vidis, kiel la pastro forpelas homojn kaj trankviligas hurlantan akvoportiston. Poste Hakob estis demandinta pastron:

- Pastro, ĉu vi komprenis pri kio balbutis la akvoportisto poste trankviliĝo?

- Jes, - diris la pastro.

- Pri kio li balbutis? - demandis Hakob.

- Li balbutis ion pri Kristo, poste montris vian malpliagan filon kaj demandis: "Ĉu li baldaŭ iros al la lago Genezareto"?

- Kaj kion vi diris al li?

- Mi diris al li: "Baldaŭ Vardan trans la Atlanta oceano veturos Amerikon".

Adiaŭante kun filo, Hakob ne ploris, kiel aliuloj. Li nur diris al Vardan:

- Neniam forgesu, ke vi estis naskita en Hajastano!

- Tion mi ne forgesos, - diris Vardan.

- Ne taŭgas ŝanĝi lokon de fruktoriĉa arbo.

- Mi tion memoros, patro.

- La bona arbo ne toleros ŝanĝon de sia loko, - diris Hakob, - ĉar la fremda, eĉ ege bona tero neniam anstataŭos antaŭan.

Komence en vilaĝo oni multe parolis pri Vardan, post kelka tempo – malpli, kaj en sekvontaj jaroj pri li parolis, kiam

Hakob havis leteron. Komence Vardan ofte skribis longajn, detalajn leterojn. Ju pli pasis tempo, des pli maloftaj estis leterojn kaj finfine ĉesis. Kiam Hakob plendis, oni diris: “Kiam la homo riĉiĝas, la karulojn forgesas. Ju pli la milionoj multiĝas, des pli forgesemaj fariĝas iliaj mastroj”.

Dume Hakob kaj lia edzino atendadis leterojn kaj interparolante provis cerbumi kaj ekspliki la kaŭzon de lia silento, la jaroj pasadis unu post alia, kaj ili maljuniĝis kaj laciĝis. Ili rimarkis, ke Anahit, ne havinta vizaĝon, ekfloris, kaj fariĝis juna virgulino, La bredisto de silkraŭpoj sian duonfilinon kelktempe sendis vivi ĉe siaj parencoj en Bekiro, por ke ŝi frekventu lernejon. Tie ekzistis amerikaj, frankaj misiistaj lernejoj – akceptintaj ankaŭ knabinojn – eĉ de Armena-gregoriana eklezio. Kiam Anahit revenis vilaĝon, jam regis landon junturkoj. Estis 1908-a jaro. Anahit jam havis monataĵojn.

- Vardan devas reveni, - diris Jeremjan al sia edzino, - ĉar Anahit jam estas preskaŭ 13-jaraĝa, kaj delonge ŝi havas menstruon. Mi timas, ke ŝi baldaŭ maljuniĝos, malfacile estos trovi bonan edzon.

- Ŝi eĉ fianĉan ringon ne havas, - diris lia edzino.

Antaŭe neniu malagrabis rigardante vizaĝon de Anahit, sed nun la homoj forigis siajn rigardojn kaj post ŝia iro mokante flustris.

Iutage perantino Manuŝak estis dirinta al bredisto de silkraŭpoj kaj lian edzinon:

- Ĉu mi devas serĉi fianĉon por ŝi?

- Ne, - diris Jeremjan, - mi ŝin promesis por filo de Hakob.

- Sed li sendas nenian informon pri si.
- Baldaŭ li sendos.
- Ju pli ŝi atendas, des pli malboniĝos ŝiaj ŝancoj, - diris la perantino. - Kiu volos edziĝi kun maljuna virgulino, des pli servizaĝa?

En 1909-a jaro ree venis amerikano – surmetinta grandan ĉapelon. Li kunportis oran ringon de Vardan por Anahit kaj mallongan leteron – havantan kelkajn liniojn.

- Li ne volis sendi ringon rimede poŝto, - diris la amerikano.

- Kiel fartas mia filo? - demandis Hakob.

- Nemalbone, - respondis la amerikano.

- Mi estis ricevinta leteron el Ameriko de mia frato Nahapet, ankaŭ de alia frato kaj de aliaj parencoj, - diris Hakob, - sed neniu memoras pri mia malpliĝa filo.

- Ĉar via filo ne havas milionojn, - diris la amerikano.

- Ĉu mia filo revenos?

- Jes. Li diris al mi, ke li revenos.

- Mi ne scias, - diris la fabelisto al sia ombro, - mi meditas kial Vardan hezitas reveni, sed mi supozas, ke li ne havas monon por vojaĝpago. Li devas akumuli, aŭ li havas monon por vojaĝpago, sed deziras pli multe akumuli, por ke ne revenu patran vilaĝon, kiel almozulo. Tamen la prokrasto daŭris ĝis 1914-a jaro, kiam Vardan decidis frusomeran tagon leviĝis sur germana ŝipo "Graf Ŝverin", kiu sendanĝere lin estus venigonta al Eŭropo.

- Kaj tiel okazis, - diris mi – Meddah, al mia ombro, trankvile sidanta sur Beatecpordego, tuj apud mi.

Frusomere en 1914 jaro Vardan estis starinta sur fordeko de tiu ŝipo kaj rigardis antaŭen – al haveno de Nju-Jorko. La ŝipo naĝis preter statuo de Libereco, kiu nek ridetis, nek manmovis. La torĉo en mano de statuo similis brilan glavon – eligitan el ingo. Sur glavo ankoraŭ estis pendita novjara afiŝo kun skribaĵo: “Happy New Year 1914!”.²

- “Happy New Year 1914!”, - nevroze, sed ne malbonkore, kaj mallaŭte ekridetis mia ombro:

- Ĉu tio estas malica ŝerco, Meddah?

- Ne, - diris mi. - Tio estas nur novjara diraĵo.

- Ĉu Vardan antaŭsentis ion?

- Kion li povis antaŭsenti?

- La impeton de ventego reŝanĝonta mondon post kelkaj semajnoj.

- Kiel li povis antaŭsenti ĝin? Li pensis pri Anahit kaj pri proksima edziĝfestoj. Verŝajne li pensis ankaŭ pri sia filo Tovma, kiun li kun Anahit devus naski. Kaj vere, - diris mi – la fabelisto, - kiam Vardan naĝis preter la statuo de Libereco, li pensis pri numeritaj stratoj de la granda urbo, pri stratoj, kiuj post kelka tempo ree havos vizaĝon kaj mem povos koni ilin. Sed lia koro sopiris Armenion.

- Vardan restis en Ameriko 16 jarojn, - diris mia ombro. - Longa infera tempo!

- Jes, - diris mi.

- Tamen, kial li devis reveni hejmen antaŭ Granda mondmilito? Ĉu pli malbonan momenton li ne estis povinta trovi?

² Feliĉan Novjaron /angle/.

- Ĝuste, - diris mi. - Malgraŭ tio, li estis feliĉa, ke ne atendis pli longe en Ameriko, ĉar, se Vardan estus hezitinta reveni, li neniam estus reveninta. Post kelkaj semajnoj jam komencis la milito, baldaŭ komencis ankaŭ la Granda masakro.

- Pri kia masakro vi parolas?
- Pri okazonta masakro, kiun mi nomas holokaŭsto.
- Ĉu holokaŭsto?
- Jes, holokaŭsto.

- *Feliĉo kaj malfeliĉo* ĉiam estas kune, - diris mi al mia ombro. - Ni supozu, ke Vardan estis malprudenta aŭ simple malsaĝa – lasinte tiam sendanĝeran landon, kia estis la Ameriko kaj reveni Turkujon, por ke travivi militon kaj masakron – holokaŭston, kiun li povis eviti. Tiel, ĉi tiun ni nomu *malfeliĉo*. Sed ĉu la malfeliĉo ankaŭ ne estas *feliĉo*? Ĉar se Vardan prokrastus sian revenon je kelkaj monatoj, plu neniam estus vidinta sian familion: nek patron, nek patrinojn, nek fratojn, nek fratinojn, nek aliajn parencojn kaj amikojn. Li ankaŭ plu neniam estus vidinta Anahit, neniam estus okazinta lia edziĝfesto, ĉar ĉiuj, kiujn li amis, pereis dum Granda masakro. Kaj poste li neniam estus naskinta Tovman, por kiu nun mi rakontas ĉi tiun historion.

- Ĉu por Tovma?
- Jes, por Tovma.
- Ĉu feliĉo kaj malfeliĉo ĉiam estas kune?
- Ĝuste tiel.
- Do, ĉu ĉeesti en masakra tempo por Vardan estis decidita?
- Jes, estis decidita.

- Kaj ĉu vi tion nomas feliĉo?
- Jes, mi tion nomas feliĉo.

Vardan estis mirinta, kiel estis ŝanĝita ĉio dum sia manko. Oni ĉie asertis lin, ke la armenoj nun estas en bona stato, ol estis iam. Eĉ la armena komercisto, veniginta lin el Bagdada stacidomo en Bekiron, kredigis, ke vere ĉio estas certa. Post la detronigo de Abdul Hamid, - tiel diris la komercisto, - la junturka registaro de nomo de Enver paŝao, Taleat bejo kaj Ĝemal paŝao solene promesis, ke ĉiuj civitanoj de Osmana ŝtato, ne gravas ili estas mahometanoj aŭ ne, havas egalajn rajtojn. Tiuj rajtoj, - tiel diris la komercisto, - kvankam ankoraŭ plejparte restas sur papero kaj precipe en malproksimaj provincoj ili neniel estos realizota, sed tamen la armenoj nun rajtis havi armilon, estis akceptitaj en turka armeo, kiel oficiroj kaj soldatoj – unu fakto, kiu antaŭe estis ne imagebla. La potenculoj disdonis armilojn eĉ en malproksimaj vilaĝoj, por oni defendu vilaĝojn de atakoj de kurdoj. Kaj mi aŭdis per miaj propraj oreloj, - diris la komercisto, - kiel turka impostkolektisto diris al armena brutvendisto: “Ĝuste, efendio, vi – armenaj orgojloj, ĉiam pagis la plej altajn impostojn, mi devas konfesi tion, efendio. Ĉar vi, trompante akiras monojn kaj plenigas ŝtatan trezorejon, sekvonte necesas doni al vi rajtojn”.

“Jes, necesas doni al ni rajtojn”, - diris la brutvendisto.

Kaj la impostkolektisto diris:

“Ĝuste, la Alaho scias, ke estas tiel”.

- Kaj ĉu li diris ion ankaŭ? - demandis Vardan.

- Li diris: “Mi aŭdis, efendio, ke rusoj malbone rilatas al armenoj – vivantaj sur alia flanko de limo. Ili persekutas viajn

pastrojn, fermas viajn preĝejojn, eĉ malpermesis vian lingvon en viaj lernejoj”.

“Vere, iam estis tiel, - diris la brutvendisto, - punu min la Dio, se ne estis. Sed la rusoj nun por armenoj promesis multajn bonajn ŝanĝecojn”.

“Sed vi bone scias efendio, - diris la impostkolektisto, - ke ĉiuj rusoj estas mensoguloj. Ĉu ekzistas pli grandaj mensoguloj ol la rusoj?”

“Ne”, - diris la brutvendisto.

- Poste ili iomete flustris kunekun, sed mi plu nenion povis aŭskulti, - aldonis la komercisto. Sed baldaŭ ili ekparolis laŭte, kaj mi aŭskultis, kiel la impostkolektisto diris al brutvendisto: “Nu, efendio, la nova registaro bone rilatas al vi. Vi devas konfesi ĝin. Se la rusoj sciis, ke ni bone rilatas kun armenoj, ol si, ili ektimigus, ĉar komprenus, ke dum estonta milito ruslandaj armenoj defendus turkojn”.

“Jes, ĝuste”, - diris la brutvendisto .

“La triumvirato ja ne estas malsaĝa, precipe Taleat bejo, kiu estas tro ruza, kaj ankaŭ Enver paŝao, kaj Ĝemal paŝao. Ili ĝuste scias, kial estas prudente bone rilati kun armenoj kaj eĉ disdoni armilojn al vi – hundoj”.

“Jes”, - diris la brutvendisto.

- Do, ĉu la stato de armenoj nune estas bona? - demandis Vardan. - Ĉu eĉ pli bona, ol de rusflankaj armenoj?

- Ĝuste tiel, - diris la komercisto. - Kruelej tempoj de Abdul Hamid pasis. La nova registaro bonega estas por armenoj kaj lia politiko superas ĉiujn niajn atendecojn. Ĉie oni esperas. Ĉie estas bonaj ŝanĝecoj. Kaj ne estas mirinde,

ke la daŝnakanoj kunagas kun junturkoj, persvadas subteni novan registaron.

- Sed kion pri revo de la daŝnakanoj rekrei armenan ŝtaton.

- Videble, la daŝnakoĵ estas pretaj anstataŭigi siajn revojn je civitanaj rajtoj.

- Sed ĉu vi estas konvinkita, efendio, ke ĉio estas tiel?

- Ĉiuj diras tion.

- Se komencus milito kun la rusoj, ĉu la turkoj fidus nin? Ĉu ili ne pensus, ke la daŝnakanoj ne serioze akceptis civitajn egalajn rajtojn en Osmana potencega ŝtato? Ĉu ili ne supozus, ke la daŝnakanoj daŭrigus siajn revojn pri la sendependeco? Ja la rusoj helpus ilin en tiu ĉi afero.

- Malsaĝeco! La turkoj scias, ke la caro novajn okupitajn terojn ne donacos al armenoj, ĉar mem volas havi tiujn. Sekvonte la caro neniam permesos, ke sur liberigitaj teroj la armenoj kreus sendependan ŝtaton. Kion scias la turkoj, tion scias ankaŭ la daŝnakanoj. Tion ĉiuj scias, ĉiuj armenoj, eĉ la malsaĝulo. Neniu armeno iam estis fidita rusojn.

Kaj la komercisto ekridis.

- Vi vidu, efendio, - diris li. - Mi konis armenan fiŝvendiston – dezirantan iri Rusion kaj sur bordoj de Norda Glacia oceano aĉeti salitajn fiŝojn. Kaj kion mi diris al li?

- Kion? - demandis Vardan.

- Mi diris al li: “Efendio, neniun rusion vi kredu. La caro ĉion promesis al ni! Ĉu vi volas aĉeti fiŝon de rusoj? Sed ĉu vi ne scias, kio okazas kun fiŝoj promesitaj de rusoj al armenoj?”

“Ne, mi ne scias”, - diris la fiŝvendisto.

“Nu, certe, vi ne scias”, - diris mi al li.

“Pri kio temas?”, - demandis la fiŝvendisto.

Kaj mi diris al li:

“La afero estas tia, efendio: se la ruso estas promesinta fiŝon al vi, do li donos al vi nur pikostetojn, kaj esperos, ke vi sufokiĝos pro ili”.

“Ĉu tio estas ĝusta?”, - demandis la fiŝvendisto.

Kaj mi diris:

“Jes, tio estas ĝusta”.

- Vere, tio estis ĝusta, - diris la fabelisto. - Kiam Vardan revenis Turkujon, pri ruslandaj armenoj oni diris, ke ili envias siajn turklandajn parencojn, ĉar jam stato de iliajn parencoj estis pli bone.

2.

- La dua edziĝfesto de Vardan okazis post kolekto de rikolto, kiel la unua, kaj ĝi neniel distingiĝis. Sep tagojn kaj sep noktojn daŭris festado sur stratoj de Jedi Suo.

La muziko ankaŭ estis la sama – blovaj kaj kordaj muzikiloj, la batadoj de tamburoj, kaj la ciganaj violonaj sorĉaj sonoj, kiuj leviĝis, atingis nubojn, kiujn ne estis pluveblaj, ĉar dum armenaj edziĝfestoj ne devas plui. Estis buĉitaj ŝafoj kaj ŝafidoj. Hakob kaj liaj helpantoj viandaĵon pendis de hokoj. Poste ĉio la viandaĵo kuirigis kaj rostiĝis, kaj la apetitema odoro de multegaj manĝaĵoj disvastiĝis super preĝejo kaj domaj tegmentoj. Tamen, ĉi tiu dua edziĝfesto distingiĝis de unua. Nun forestis teruro pro kurdoj. La vilaĝaj viroj nun estis armitaj, kaj montloĝantaj kurdoj sciis pri tio. Sekve iliaj atakoj fariĝis raraj. Malgraŭ tio, Vardan insistis

pagi edziĝfestan imposton al maljuna ŝejko Sulejman, ĉar malprudente estos kolerigi ŝejkon, liajn filojn kaj nepojn. Iliaj rajdantoj nombre superas vilaĝanoj de Jedi Suo.

- Ĉu la fianĉina imposto tamen pagiĝis?

- Jes, pagiĝis.

- Kaj ĉu la kurdoj ne forŝtelis fianĉinon?

- Ne forŝtelis. Kaj la kurdoj ne defloris ŝin. La edziĝfesto plenumis sen akcidentoj. Jam mi diris, ke ili festis sep tagojn kaj sep noktojn daŭre. Kaj la sepa tago jam estis la tago de kronado kaj de la sangoza littuko, kiu estus pendita sur la pordo, kiel ĉiam.

- Ĉu Vardan ree malfaciliĝis koni sian fianĉinon, kiel dum unua fojo? Kaj ĉu Hakob estis devigita kun helpo de Bjulbjul buĉi kokon kaj trompi homojn?

- Ne, - diris mi – la fabelisto.

Kaj mi diris:

- Tiam la puto de la unua edzino – de obeza filino de vilaĝestro, estis seka, kaj nek pasio de “kaŭĉuktubulo”, nek liaj penoj povis dum unuaj tagoj konduki kaŭĉuktubon al fonto – estinta en kaŝejo kaj atendinta sian eltrovanton. Kaj la pikarbusto antaŭ seka puto estis tiel neobeema, ke mi malagrable rakontas pri ĝi. Sed ĉi foje estis tute alimaniere.

Ne! Anahit ne estis obeza, kvankam ŝin ankaŭ oni klopodis obezigi. La paĥlavaoj kaj bonaj konsiloj de duongepatroj ne havis sukcesojn. Kvankam Anahit ne estis maldika, sed estis altstatura kaj ŝvelaj partoj, rondaĵoj sur ŝia korpo ne estis tre videblaj. Anahit estis la plej altstatura inter

vilaĝaj virinoj, kaj alta je tuta kapo inter multaj viroj. Ŝi ne estis bela virino, ĉar ne havis vizaĝon. Ŝia korpo estis kovrita de brulaĵoj kaj spuroj. Sed ŝi moviĝis fiere kaj koketante, kaj ŝiaj okuloj ĉiam brilis sur brulita vizaĝo, ĉar ŝi vidis Kriston.

Vardan konis ŝin ĝuste unuan nokton, ĉar estis nek seka puto, nek ne obeemaj pikoj. Tie estis dankema, gaja fonto – dezirinta esti taksita kaj samtempe mem taksi. Kaj ĉio kruda, rigida, kaj senkonscienca en viro (kiel oni diras) fariĝis tenera kaj ĝoja. Kaj okazis tiel, kiel Kristo por ĉiam unuigis viron kaj virinon, dume ili spiras.

Kiam la milito komencis, ĉiuj viroj de vilaĝo, taŭgaj por armeaj celoj, siavole enlistiĝis, ĝis heraldo kaj tamburisto kun malrapidemaj turkaj poŝtaj servistoj estus alportintaj apartajn porlokajn ordonojn. Nun la riĉuloj, pagante bedelon, povis liberiĝi, ne servi. Kaj tiaj personoj estis en mahometanoj ankaŭ. Sed en vilaĝo estis filoj de riĉuloj, kiuj rezignante pagi bedelon, iradis kazernon de Bekiro. Mi – la fabelisto, povas nur miri, anoncante al vi, ke la sama situacio estis en aliaj urboj kaj vilaĝoj. Ankaŭ estis dizertitoj kaj timuloj kiel inter mahometanoj, tiel inter senkreduloj. Sed la granda parto de armena junularo rapidis stari sub standardoj.

- Kaj kiel kondukis la daŝnakoj? - demandis l'ombro.
- Ili postulis, ke siaj homoj batalu kun junturkoj.
- Ĉu ankaŭ Pesak – la bofrato de Vardan?
- Li surmetis uniformon de turka armeo, kaj fariĝis soldato.
- Kaj ĉu li ne fariĝis gvidanto de daŝnakoj?
- Li fariĝis.

- Ĉu li siajn revojn pri popolaj pravoj deziris ŝanĝi?

- Jes, - diris mi – la fabelisto. - En lando ŝanĝiĝis la humoroj, aparte de armenoj. La perspektivo fariĝi egalrajtaj civitanoj en Osmana ŝtato, estis pli alloga, ol la aventura rekonstruado de Armena ŝtato – tre malgranda kaj malforta, por ke ekzisti inter du grandeguloj – Rusio kaj Turkujo. La armenaj simplaj homoj deziris nur sendanĝerecon kaj plu nenion. Ili deziris okupiĝi per siaj aferoj kaj zorgi pri siaj familioj. Tio estis deziro por ekzistado. Tion sciis ankaŭ la daŝnakanoj.

- Kaj ĉu la revos pri sendanĝeroco kaj stabileco estus efektiva la junturkoj?

- Tion promesis la nova registaro, - diris mi.

- Kaj kiel kondukis armenaj pastroj, kiam komencis la milito?

- Ili persvadis siajn komunumojn batadi por turkoj. Ili preĝadis por bonvivo de padiŝaho.

- Sed por kiu padiŝaho?

- Mi precize ne scias, sed pensas, ke por turka padiŝaho.

- Kaj ĉu la pastro Gabriel Hamadjan ...?

- Li diris: “Vere, la nova registaro donis al ni rajtojn, kaj tiuj rajtoj nun ni devas akiri, ĉar plejparte ili estas nur sur papero. Nun ni havas ŝancon pruvi al turkoj, ke ni estas leĝemaj civitanoj. Pli bona ŝanco ne estis en historio. Ĉar la junturkoj donis al ni armilojn, do niaj viroj estas soldatoj de turka armeo, kiel ĉiuj aliuloj”.

La vilaĝon venadis fremdaj mjunadioj, por ke per siaj tamburoj voki kaj persvadi popolon. Post kelkaj semajnoj de komenco de milito kun rusoj, venis ankaŭ antaŭa piedkripla, kun unu surda orelo maljunulo Nazim efendio, por ke de nomoj Enver paŝao, Taleat bejo kaj Ĝemal paŝao, mallonge dirante, de nomo de triumvirate, kaj de Komitato Unuiĝo kaj Progreso, kaj de nomo de Sultano informi pri grandaj sukcesoj kaj militaj novaĵoj. Ĝis Nazim efendio kun sia tamburo estus irinta bazaran placon, Hakob invitis lin drinki glason da ŝnapso, donis sufiĉan grandan baĥŝiŝon kaj flustris sekreton ĉe la lia malsana orelo. Pli malfrue en bazara placo la mjunadio anoncis, ke edzino de Vardan estas graveda, kaj la Komitato de Unuiĝo kaj Progreso, la triumvirato de Enver paŝao, Ĝemal paŝao kaj Taleat bejo, krom tio Sultano Muhamed la Tria esprimas siajn bondezirojn al Vardan, al lia edzino kaj al ilia naskota filo – nomota Tovma. Poste la mjunadio memoris, ke baldaŭ la turka armeo estos aneksinta Trabzon, kaj la rusoj frakasiĝos, ke Enver paŝao persone estas en fronto, gvidas siajn armeojn kaj baldaŭ Kaŭkazo, la tuta turka popolo estos liberigiĝita, ke la germana kunulo estus starinta ĉe Parizo – frankistana multpekula urbo. Kaj Alaho defendu justulojn!

Vintre ne estas multaj aferoj. La vilaĝanoj ludas kartludojn kaj tavlaon, vespere ili dormetas ĉirkaŭ la toniro. Certe la hejma ekonomio kaj brutaro postulas zorgon, sed sur kampoj laboro ne estas. Tiel dum tuta vintro vilaĝanoj revas pri printempo kaj pri novaj sulkoj en plugitaj kampoj. Ili demandis unu alian: “Ĉu printempe la cikonioj denove revenos? Ĉu post la milito, kiu certe finiĝos printempe, estos

tiel, kiel estis en Armenio ĉiam, dum semado kaj printempaj ventoj”.

Kaj unu tagon, kiam la vintro finiĝis, kaj la tero jam atendis degelon, venis taĉmento de zaptiĥoj kaj haltis antaŭ domo de Hakob. La uniformoj de zaptiĥoj estis kovritaj de neĝo kaj koto, kaj iliaj ŝuoj ne pli bone aspektis. Ili traserĉis domon de Hakob kaj ĉiujn kortajn dometojn de Ĥatisjanoj. Ili ne trovis multon, nur du simplajn fotojn de Vardan, ankaŭ dokumentojn, kiujn li ne konservis en sia poŝo. La dokumentoj estis kun fremdaj viroj kaj sigeloj – konservitaj kun fotoj en skatolo.

Forirante el vilaĝo, ili kunprenis Vardan. La oficiro – grasa kaj bonkora ĉaŭŝo, diris al Hakob: “La afero nur koncernas simplan formalajon. Via filo estas amerlikano. Kaj mjudiro de Bekiro volas, ke li subskribu ian paperon”.

- Kiam revenos mia filo? - demandis Hakob. Ĉar Hakob divenis ion malbonan, aldonis, - diru al mi, agao-ĉaŭŝo, ĉu mi revidos mian filon?

- Al la fina demando de Hakob la ĉaŭŝo ne respondis, - diris mi – la fabelisto, al mia ombro, ĉar al tiu demando kiel povus respondi simpla ĉaŭŝo? Sed la demandon de Hakob la ĉaŭŝo kunportis tra sia vojo – trans Taŭra montĉeno. Kaj poste, kiam la ĉaŭŝo la malpliaĝan filon de Hakob transdonis mjudiron, al la sama demando la mjudiro respondis:

- Tiu ĉi armeno plu neniam revenos al siaj geparencoj.

- Lia edzino estas graveda, - diris la ĉaŭŝo. - Li diris al mi, ke atendas filon.

- Tiun filon li neniam vidos, - diris la mjudiro.

- Sed la patro almenaŭ devos aŭdi naskiĝkrion de sia filo, - diris la ĉaŭŝo, - nur unuan krion, kiam ido krias, kvankam ĉi tiun mondon – kreitan de Alaho, li tute ne konas.

- Tiu ĉi armeno kun amerika pasporto aŭdas nur siajn kriojn – tiajn laŭtajn, ke sia filo en patrino sino aŭdos patrajn kriojn.

- La Alaho indulgu lian animon! - diris la ĉaŭŝo.

- Multaj filoj de tiu ĉi perfida popolo devos krei, - diris la mjudiro.

- Iuj krios pli laŭte, iuj mallaŭte, sed ĉiufoje, kiam ili krias, la justuloj kovras siajn orelojn en Paradizo. Kaj skeletoj de kreduloj – odorantaj lavendon kaj moskon, pli bone ripozos. La profeto estis malbeninta tiujn senkredulojn. Eblas, ke iliaj patrinoj skuiĝas pro ĉiu krio de siaj filoj.

- Jes, - diris la ĉaŭŝo. Kaj forirante el mjudira laborĉambro flustris: “La Alaho indulgu iliajn animojn”.

3.

Antaŭ du semajnoj de aresto de Vardan sur Beatepordego estis pendumitaj unuajn armenojn, kaj ni – mia ombro kaj mi, ĉeestis. Poste, la nombro de pendumitoj grandiĝis. La turkaj regantoj ĉiutage pendumis armenojn, ofte multojn. La kvanto jam estis nekalkulebla.

- Post aresto de Vardan, - diris mia ombro, - la okazintaĵoj multiĝas. Ĉu eble tio estas ligita kun lia aresto?

- Pli verŝajne kontraŭe, - diris mi. - Lia aresto iel estas ligita kun nova politiko, kaj por tiu celo oni timigas per pendumuloj.

- La vizaĝoj de tiuj ĉi pendumitoj esprimas ironion.

- Kaj tiuj nur certigas timon de registaro.
- Sed kie estas la promesoj de partio “Progreso kaj Unuiĝeco”?
- Estas milito, - diris mi.
- Mi konsideras demandon de egalaj rajtoj.
- Tiu estis antaŭ la milito, - diris mi.

Mi diris:

- Aŭstrian Franc-Josef volis en Parizo renkonti germanan kajzeron, sed verŝajne ne sukcesis.
- Eble la aŭstria kajzero estas tro maljuna por tia malproksima vojaĝo, - diris mia ombro, - precipe lastatempe li urinante havis malfacilaĵojn. Tio ne estas oportuna dum vojaĝoj.
- Eblas, - diris mi.
- Kaj kion pri Enver paŝao? Ĉu li ne volis renkonti kun germana kajzero?
- Certe volis.
- Kaj kie?
- En Sankt-Peterburgo.
- Ĉu li sukcesis?
- Tute ne, - diris mi. - Enver deziris antaŭe aneksi Kaŭkazon kaj liberigi ĉiujn turkajn popolojn de cara sklaveco, poste iri Peterburgon. Sed li ne sukcesis.
- Sed kion pri la germana kajzero?
- Li ankaŭ prokrastis vojaĝon al Peterburgo. Kiel oni diras ... pro taktikaj celoj.
- Kaj kiel estas la afero en rusa-turka fronto?
- Malbone por turkoj, - diris mi. - La armeo de Enver paŝao fakte estas frakasita. En ĉi tiu malsukceso oni serĉas kulpon.

- Kaj kiu estas la kulpulo?
- La armenoj.
- Sed ili estas bravaj soldatoj kaj estas leĝemaj. Pri tio estas skribita en turkaj ĵurnaloj. Enver persone tion konfesis.
- Tiu jam delonge estas refutita.
- Ĉu ekzistas kaŭzoj?
- Kaŭzoj ĉiam kaj ĉie estas.
- Kie estas tiuj kaŭzoj?
- En propraj timoj.

- Sed klariĝus, ke ili estas senkulpaj.
- Pro tio ili fariĝos pli kulpaj, ĉar armenoj dubas pri propran historion, kiun devigas aliuloj. Kaj tio estas kulpo. Ankaŭ estas krimo tion, ke armenoj dubas ĉion pravigantan turkan historion, ĉion nun skribitan de junturkoj.
- Do ĉu armenoj devas en tio esti kulpuloj?
- Ĝuste tiel.

Mi kaj mia ombro ankoraŭ iomete konversaciis. Poste ni aŭdis, ke io flugas inter ni. Ni ambaŭ aŭskultis, mia ombro kaj mi – fabelisto.

- Io flugas inter ni, - diris mia ombro.
- Tiu estas la Lasta Penso de Tovma Ĥatisjan, - diris mi.
- Ĉu vere tiu estas lia Lasta Penso?
- Ne, - diris mi. - Tiu ankoraŭ sidas en lia kapo kaj atendas signon forflugi.
- Kaj kiu estas tiu Lasta Penso?
- Entute la Lasta Penso estas ia persono el “La fabelo de la Lasta Penso” – rakontata de mi al kuŝanto en morta lito, por ke li sciu, kia estos lia Lasta Penso..., kiam ĝi finfine

iotempe forflugos.

Kaj mi – la fabelisto, povas aŭdi, kiel ĝemas la Lasta Penso. Kaj nun mi aŭdis lian demandon:

- Ĉu mia patro hodiaŭ eliros el malliberejo?

- Ĝuste, ŝafideto mia, - diras mi. - Hodiaŭ li eliros. Kaj dudek kvin zaptiĥoj tute pretaj atendas lin.

- Ĉu ili kondukos lin Konstantinopolon?

- Ĝuste tiel.

- Ĉu oni juĝus lin?

- Jes, oni juĝus lin.

Kaj mi montras al la Lasta Penso sakon de blinda almozulo, sidantan ĉe Beatecpordego, sur la strata rando.

Mi diras:

- En ĉi tiu sako la blindulo estis kaŝinta ŝuojn de via onklo Tigran. Li estis ŝuisto – la plej bona en Bekiro.

- Mi scias, - diras la Lasta Penso.

- Vi verŝajne dezirus scii, kial li ne vendis ŝuojn?

- Jes, - diras la Lasta Penso.

- Mi ankaŭ ne scias, - diris mi. - Sed ni aŭskultu, kion diras la blindulo pri tio.

- Vere, mi volis vendi la ŝuojn, - diras blinda almozulo Mehmed efendio al sia nepo Ali. - Sed mi pensis, ke tiuj ĉi ŝuoj, kudritaj de flava kaproledo, tute ne estas la plej bonaj en tiu ĉi urbo – inter ekzistantaj ŝuoj, kvankam mi ĉiam estis kredinta tion. Do, mi estis kredinta fabelon.

- Kial, dedeo³. Kial ili ne estas la plej bonaj. Vi ja ĉiam

³ Dede-avo/turke/.

krediĝis, ke ili ĝuste estas la plej bonaj.

- Kiu iam estis, tiu delonge forpasis, - diras la blinda almozulo. - Kaj kio iam havis altan koston, hodiaŭ havas nenian koston.

Ĝuste tiel estas la afero de la plej bonaj ŝuoj en tuta Bekiro – kudritaj de flava altkvalita kaproledo. Iam ili estis novaj, sed hodiaŭ estas disŝiritaj. Nu, vi rigardu, la ledo estas eluzita, kaj tute gratita, la plandoj distruitaj, la kalkanumoj kurbitaj, kaj ĉio havanta certan formon, por ke teni piedon en ordo, nun estas ĉifita, ĉar mi diligente serĉis ojn.

- Sed kie estas la ojn, kiujn ĉiu armeno kaŝas en kalkanumoj?

- Nenia oro estis en kalkanumoj, ŝafideto mia. Tigran estis aŭ malriĉa kaj ne povis iomete ŝpari ojn, aŭ li ne estis sufiĉe antaŭvidita.

- Kion vi faros tiujn ŝuojn, dedeo?

- Mi ne povas ilin revenigi al mortinto, ŝafideto mia. Sed mi povis doni al lia edzino aŭ al frato. Jes... al frato. Tio estus pli prudenta, ĉar la frato povas surmeti.

- Al kiu frato?

- Al Vardan Ĥatisjan.

- Hodiaŭ Vardan eliros el malliberejo. Pri tio mi sciis de zaptihoj. Oni volas venigi lin Konstantinopolon.

- Ĉu juĝi?

- Jes, juĝi.

- Ĉu vi hodiaŭ donos ŝuojn al li?

- Ne, hodiaŭ ne.

- Kiam vi ilin donos al li?

- Kiam li bezonos ŝuojn.

- Ĉu li hodiaŭ ne bezonas?
- Ne, hodiaŭ ankoraŭ li ne bezonas.

Kaj mi – la fabelisto, diras:

- Ĉu vi vidas kurdojn-rajdantojn? Ili estis alvenintaj de granda bazaro kaj rajdas al Beatecpordego.

- Kiuj estas ili? - demandas la Lasta Penso.

- Ili estas rabistoj. Ili iam venas urbojn – rabi bazarojn, sed hodiaŭ ili ne sukcesos, pro granda kvanto da zaptiĥoj kaj soldatoj, kiuj ĉimomente paŝadas tie.

- Ĉu verŝajne ili vivas rimede rabajfoj?

- Ilija gento ankaŭ havas ŝafarojn, sed nur rimede ŝafbredado ili ne povas vivi. Ilija maljunuloj, virinoj kaj infanoj zorgas pri ŝafoj, kaj la junaj viroj rabadas sur vojoj. Tiu estas malgranda tribo – vivanta sur altaj montoj. Ili estas geparencoj de Hertos-Kurdoj kaj subiĝas al ŝejko Halil Veremulo. Kiel oni diras, tiu estas malgranda, preskaŭ ekstermita tribo.

- Sed kiel?

- Jen tiel. Kiel tiu kutime okazadas. Mi diris, ke antaŭ 300 jaroj la filo de tiama ŝejko murdis filon de alia ŝejko. La fratoj devis venĝi por mortinto, ĉar la leĝo de sanga venĝo estas sakramenta, kaj ili postulas kompenson. Ekde tiu tempo la du treboj fariĝis malamiko kaj reciproke mortigas unu alian. Kaj la homoj de ŝejko Halil, ricevinta nomon Veremulo, jam restis malmultaj.

- Kiom da ili restis?

- Mi precize ne scias. Sed almenaŭ 50 da batalantoj – havantaj malmultajn ĉevalojn.

- Kial vi tion rakontas por mi?

- Vi baldaŭ ekvidos.

- Kaj mi diras:

- Ĉu vi vidas? La kurdoj haltis antaŭ la blinda almozulo. Unu el ili (tiu estas la filo de ŝejko) nun deĉevaliĝas, proksimiĝas al almozulo kaj ĵetas arĝentan mediĝen sur lian naztukon.

- Mi vidas.

- Jam estas kelkaj jaroj, ke ili estis amikiĝinta.

- Kiel tio okazis?

Mi diras:

- Tiuj sovaĝaj kurdoj scias nek legi, nek skribi. Krom tio ili ne kredas skribaĵojn en ĵurnaloj. La blinda almozulo estas la plej fidinda informejo. Ĉiufoje, veninte urbon, la kurdoj ricevas lastajn sciigojn de almozulo.

- Ĉu la blindulo legas ĵurnalojn?

- Ne. Sed li havas bonajn orelojn kaj ĉiam tiuj estas malfermaj.

- Kiel estas la militaj aferoj, Mehmed efendio? - demandas la filo de ŝejko.

- Estas bonaj, - diris la almozulo kaj aldonas, - sed estas demando – por kiu?

- Ĉu por armeo de Enver paŝao?

- Ne.

- Ĉu por armeo de caro?

- Ĝuste tiel.

- Kiam la caraj rajdantoj eniros Bekiron?

- Ĉisomere ankoraŭ ne, - diris la almozulo. - Sed ili estos ĉi tie.

- Sed kio okazos kun tiuj malbenitaj armenoj? Ĉu ilin ĉiujn oni pendumos?

- Ne ĉiujn, filo de Veremulo.

- Sed kial ne ĉiujn?

- Ĉar ĉiujn ilin oni forpelos. Maljunulojn, virinojn kaj infanojn oni forpelos en dezerton. Kaj ĉiujn virojn havantaj fortojn en testikoj, oni pafmortigos.

- De kie vi scias?

- Mi estas aŭskultinta.

- Kaj kio okazos kun armenaj domoj, vendejoj, brutoj, terpecoj?

- Poste troviĝas heredantoj, filo de Veremulo. Kaj la heredantoj devos rapidi, ĉar la heredantoj ĉiam rapidas. Kaj kreu min, la heredantoj jam atendas. Kaj ili estas senpaciencaj. Kaj ili forgesis diraĵon de profeto: "Ĉiu rapidemeco venas de diablo".

- Ĉu la afero atingis tion?

- Ankoraŭ ne.

- Kion atendas potenculoj?

- Ili bezonas pruvojn kaj kredindajn akuziĵojn.

- Sed kiu diris tion al vi?

- Lu juzbaŝio diris.

- Sed kial ili bezonas tiujn?

- Por presaro. Ĉar ili iel devos argumenti: kial plu ne ekzistas armenojn?

- Sed ĉu ili ankoraŭ ekzistas?

- Ĉimomente ekzistas.

- Unu el armenoj estas akuzita, kiel spiono, - diris la almozulo, - kaj delonge li estas fermata en malliberejo. Sed hodiaŭ oni lin eligas.

- Ĉu oni lin liberigas?
- Ne. Hodiaŭ oni lin ĉenligitan eligos tra la Pafilegpordego, kaj akompanante 25 zaptiĥoj, forkondukos.
- De kie vi scias?
- Mi konas tiun armenon. Jam kelkajn semajnojn mi daŭre iras malliberejon kaj paroladas kun konataj zaptiĥoj.
- Ĉu vi scias, oni lin kien forkondukos?
- Ĝis stacidomo de Bagdada fervojo, poste Kostantinopolon.
- Do – tien!
- Jes, tien.

- Ili rajdos mallonge – laŭ karavana vojo, al Erzrumo, - diras blindulo. - Poste laŭ mallonga vojo tra montoj.
- Laŭ kia mallonga vojo?
- Ekzistas nur unu mallonga vojo. Tion vi certe scias, filo de granda bejo. Kaj vi – kurdoj, ĝin nomas **Burak**, kiel nomiĝas la ĉevalo de profeto, kiu ĉieliris.
- Tio estas tre mallarĝa kaj danĝera montpasejo.
- Jes, - diras la blindulo.

- Do, ĉu 25 zaptiĥoj kaj unu arestito?
- Jes, - diras la blindulo.
- Kaj kiom da ĉevaloj?
- Se vi havas sufiĉajn fingrojn kaj scipovas kalkuli, do estos 26 ĉevaloj.
- Ĉu 26 ĉevaloj?
- Jes, mi diris tiel.

- Eble ni bezonas 26 bonajn ĉevalojn, - diras la filo de ŝejko.

- Kaj ĉu vi scias kiaj estas tiuj ĉevaloj?
- Tiuj estas nemalbonaj ĉevaloj, - diris la blindulo.
- Kiajn felajn ĉapojn kaj ŝuojn havas tiuj zaptiĥoj?
- Nemalbonaj ĉapoj estas kaj nemalbonaj ŝuoj. La armiloj estas tre bonaj, sed la plej bonaj estas iliaj novaj uniformoj, ĉar tuj komencis la milito kaj oni denove disdonis novajn vestaĵojn.

- Ni ne bezonas uniformojn.
- Ĉu ĉevalojn ankaŭ?
- Ni bezonas ĉevalojn.
- Ĉu modernajn pafilojn?
- Same.
- Ĉu felajn ĉapojn kaj ŝuojn?
- Ankaŭ felajn ĉapojn kaj ŝuojn.

- Por vi estos simpla infana ludo pafi tiujn timemajn zaptiĥojn, - diras la blindulo, - tuj sur ravinrando, kiam ili devos trapasi montpasejon po unu, kiel anseroj.

- La afero ne estas granda.
- Vi nur indulgu arestiton. Li estas amiko.
- Ĉu amiko?
- Jes.

- Pli malfrue, kiam la kurdoj forrajdis, pasante sub pendumitoj de Beatecpordego, kaj ili jam malaperis, Ali demandis avon:

- Ĉu la kurdoj rabos ĉevalojn, felajn ĉapojn kaj ŝuojn?
- Jes, ŝafideto mia.
- Kion pri la uniformojn?
- Ili tiujn forĵetos en ravinon kun vestintoj.

- Sed ĉu la arestito? Kio okazos kun li?
- Mi ankoraŭ ne scias.
- Ĉu li iam atingus Konstantinopolon?
- Ne, ŝafideto mia.

Kiam la mjudiro, malfrue vekiĝite, finfine atingis Hjukimeton, la supera skribisto eksplikis, ke la dokumentoj, donitaj al akompananta grupo de Ĥatisjan, ne estas kompletaj. Kiam ĉio pretiĝis (homo kaj liaj paperoj, kiuj estas nedisigeblaj) sendi al stacidomo de Bagdada fervojo, ree pasis kelkaj karaj horoj. Nur preskaŭ tagmeze, kiam ĉiuj dokumentoj estis konvenitaj, kaj la mjudiro persone kuradis inter Hukjumeto kaj mallibereja korto kaj lastfoje rekontrolis, ke ĉio estas en ordo, la taĉmento ekmovis antaŭen. Tamen, la zaptiĥoj antaŭe alkondukis arestiton al kazerno, por ĉevaloj ili ricevis municion kaj provision, plenigis felsakojn per akvoj. Post ĉio ili haltis ĉe ĉefa poŝto, kunprenis kelkajn sakojn kaj nur tiam tra la interesiĝita amaso laŭlonge fortikaĵa interna zonmuro malrapide moviĝis direkte de Pafilegpordego. Kiam ili finfine eliris el urbo kaj malaperis en polvozaj nuboj de vojo, la tempo de tagmeza preĝo jam delonge estis pasinta. Ili rajdis nek rapide, nek malrapide, kiel ĉiam ili rajdis, kiam la vojo estis longa kaj maloportuna. Sed ili sciis la vojon kaj rajdis fideme. Ili movis laŭ definitiva ordo – sekvante ordonojn de mjudiro, laŭ karavana vojo al Erzrumo, sed poste ili dekliniĝis kaj ekrajdis laŭ mallonga vojo de Taŭrosa mallarĝa montpasejo.

4.

En komenco de majo la valio de Bekiro invitis kelkajn gravajn postenulojn en sian laborĉambron.

- Efendioj, kiom da tempon necesas, por ke sperta zaptiha taĉmento atingu ĝis la stacidomo de Bagdada fervojo?

- Ne pli ol tri tagojn, valio bejo.

- Ĉu se ili irus laŭ la mallonga vojo?

- Ne pli ol du tagojn.

- Sed ili jam iras pli ol du semajnojn, sed ni ne havas sciigojn pri ili. Ni nur scias, ke la taĉmento kun arestito Vardan Ĥatisjan ne estis atinginta lastan stacion de Bagdada fervojo.

- Kaj nek ĝis Kostantinopolon? - demandis la kajmakamo.

- Certe ne, - diris la valio. - Ĉar kiel la arestito devus atingi Kostantinopolon?, se li atingis nek Taŭroson, nek lastan stacion de Bagdada fervojo.

- Tiu fervojo havas multajn staciojn, - diris la mjudio.

- Kaj inter ili situas Taŭroso.

- Sed ekzistas nur unu lasta stacio, kie ne ŝanĝante vagonaron, eblas atingi Kostantinopolon.

- Jes, ĝuste, - diris la mjudio.

La kajmakamo ankaŭ diris:

- Tio vere estas ĝuste. Nur mi ne komprenas, kial tiuj germanoj ne povas konstrui tunelon tra la Taŭroso?

- Ili povas, - diris la valio, - sed intence malrapide laboras ili, por ke siaj laboristoj multjare ĉi tie okupiĝu.

- Al mi ŝajnas, ke germana kajzero pli trankvile dormas,

sciante, ke siaj konstruantoj longtempe vivus ĉi tie, - diris la mjudiro.

- Diablo prenu tiujn konstruantojn, - diris la valio.

- Mi multfoje telegramis al staciestro de Bagdada fervojo, - diris la valio, - ankaŭ al policia fako de Erzurmo – gardinta mallarĝajn montpaseojn, tra kiuj estas pasinta la taĉmento. Sed la respondo ĉiam estis la sama.

- Kaj kia estas la respondo?

- La taĉmenton kun arestito oni estis vidinta lastfoje, kiam ili lasis karavanan vojon kaj estis eksinta laŭ la montpaseja mallonga vojo. Poste ili estis malaperinta.

- Ĉu ili estis malaperinta en Taŭrosaj ravinoj?

- Ĝuste tiel.

- Ĉu oni sendis tien serĉantajn taĉmentojn?

- Jes, oni estis sendita.

- Kaj kia rezulto?

- Nenia rezulto.

- Sed nenia rezulto ankaŭ estas rezulto.

- Mi ne scias, efendioj.

- Sed kiu povas scii?

- Nur la Alaho.

- Ĉu eble Alaho devos trovi ilin?

- Sed kial ne?

- La taĉmento eble estis atakita kaj kunekun mortigita kaj falita en unu el multaj ravinoj.

- Eblas.

- Aŭ ilin kaptis la rusoj?

- Tio ankaŭ eblas.

- Ne, - diris la mjudiro. - La rusoj ne povis. Ili ja estas

ankoraŭ tre malproksimaj. Kaj ne eblas, ke ili estas kaptitaj de rusaj taĉmentoj.

- Ĉu verŝajne tiuj estis rusaj patrolaj grupoj?
- La patroloj ne estus irintaj tiel malproksime.
- Tiu okaze kiu povis esti?
- La Alaho scias, - diris la mjudio.

- Eble tion faris kurdoj, - diris la mjudio. - Se ili bezonus ĉevalojn, neniu ilin timigus. Kaj tio estas ne unua fojo, ili estis atakinta zaptihojn multfoje.

- Jes, tio estas ĝusta.
- Kurdoj ne lasas vivantajn atestantojn.
- Tio ankaŭ estas ĝusta.

- Se iu estas vivanta, jam delonge li estus aperinta. Sed neniam spuroj ne estas trovintaj.

- Sed kiel, valio bejo? Ĉu eĉ spuroj de ĉevaloj ne estas?
- Spuroj de ĉevaloj ankaŭ ne estas, mjudio bejo.
- Kaj ĉu nek spuroj de arestito?
- Nek de li?

- Sed kion pri la juĝo?

- Kia juĝo?

- Nu, la afero de Ĥatisjano... Mi konsideras la aferojn pri mortigo de aŭstria reĝido kaj pri tutmonda konspiro de armenoj.

- O, jes...

- Se mi estu tute honesta, mjudio bejo, vere mi neniam estis kredinta tion. Post prudenta pensado, mi klaris, ke pro tiu juĝo ni estus ridindaj por tutmonda societo.

- Do, estus pli bone, se ni neniigu la aferon pri morto de la arestito.

- Jes, guste tiel.

- Sed ĉu estas nenian dubon pri morto de arestito?

- Nenian, - diris la valio. - Se dum la du semajnoj neniuj aperis el tiu taĉmento, do ĉiuj estas mortintaj.

- Kiam la kurdoj faras ion, neniam faras duone.

- Tiel estas, - diris la valio.

- Bone, forgesu ni aferon de Ĥatisjano, - diris la valio, - ni havas pli gravajn aferojn.

- Ekzemple kiajn? - demandis la kajmakamo.

- Ekzeple la afero de Vana ribelo.

- Ĉu vi scias ion certan?

- Jes, - diris la valio.

Kaj la valio diris:

- Efendioj! Ni nun finfine havas kredindan akuzon koncerne armenaĉoj.

- Kaj kia estas la akuzo?

- Jam dum kelkaj tagoj armenaj rabistoj pafadas kaj mortigas turkajn soldatojn. Dume ni ne scias ion certan, sed de hieraŭa tago jam ekzistas detalaj informoj de Vana valio. Ĉio estas ĝusta. En armena kvartalo de Vano komencis ribelo, kaj tio tuj en malfronto.

- Ne kredeble!

- Tio estas pruvita, efendioj. La tuta mondo ekscios pri tio. Kaj vi kredu, kun rusoj batalas armenaj taĉmentoj, de kiuj soldatoj ne estas rusaj civitanoj. Ili venadas el ĉiuj ŝtatoj kaj kuniĝas kun rusoj.

- Ĉu ili batalas kontraŭ ni?
- Ĝuste tiel.
- Ĉu inter ili ekzistas turkaj civitanoj?
- Kelkaj fuĝintaj armenoj.
- Jen kiaj aferoj!
- Kaj nun pri historio en Vano, - diris la valio. - Ribelon organizis la daŝnako⁴. Ili ekzistas ĉie – en ĉiu urbo kaj en ĉiu vilaĝo. Ili ĉie organizadas ribelojn.
- Kaj ĉu ekzistas pruvoj, ke la ribelo en Vano ne estas unika? Ĉu ribelo disvastigos? Ĉu ekzistas anticipa programo?
- Efendioj, - diris la valio. - Neniu estas pruvita, sed estos pruvota.

- Poste alvenis vintro kun frostoj kaj ĥolero, - diris la fabelisto. - Kaj printempe, kun neĝa degelo venis la tifo kaj disenterio. La turkaj frakasitaj militaj trupoj remarŝis el Kaŭkazo al Anatolio kaj kun ili – kurdaj regimentoj. Dum remarŝo la turkaj kaj kurdaj soldatoj rabadis armenajn vilaĝojn kaj buĉadis loĝantaron. La bofrato de Enver paŝao – Ĝevded bejo, la estro de Kaŭkaza Tria armeo, kiam Enver paŝao rapide revenis Konstantinopolon, Ĝevded paŝao ne kaŝis, ke mem neniigos tutan armenaron en Vana vilajeto, ĉar li ne nur estas armeestro, sed samtempe estas la valio de Vana vilajeto. La armenoj de Vano (la plej granda kaj bela urbo de Armenio en Osmana imperio) sciis, kio atenditas. Kaj kiam la turkaj taĉmentoj aperis antaŭ urbo, kaj la loka policio komencis arestadi elstarajn armenojn, iujn turkoj pafmortigis.

⁴ Estas mallonga formo de vorto *daŝnakano*.

Oni ekparolis, ke turkoj perfortas virinojn, sur stratoj batadas virojn. La armenoj remarŝis de urba centro, malfermiĝis kaj armiĝis.

- Ili havas malmultajn armilojn, - diris la fabelisto. - Plejparte armiloj estis el junturkaj armilejoj. Definitan parton kontrabande alportis daŝnakanoj el Persujo dum jaroj de persekutoj de sultano Abdul Hamid. La armenoj de Vano nek estis ribelintaj, nek havis ligojn kun proksimiĝitaj rusaj armejoj, nek kun rusflankaj volontaj taĉmentoj. Armenoj nur defendiĝinte estis fermintaj enirejojn de sia kvartalo antaŭ zaptiĥoj kaj ĝevdedaj soldatoj, kaj nenion alian... unika rimedo kontraŭ buĉado kaj forpelado de loĝantaro.

Sed nenio pli bone konvenis al junturka programo de neniigo de armenoj, ol la sciigoj, ke armenoj pafas turkojn. Finfine troviĝis pruvo – “ŝtata perfideco”, kaj ĉi tiu pruvo devos justiĝi venontajn kruelajn paŝojn antaŭ tutmonda societo kaj presaro. Memdefendon de armenoj la preso kaj tamburistoj en urboj kaj vilaĝoj komencis deklari, kiel ŝtata perfideco, kiel ribelo tuj en turka malfronto. Necesis nur pruvi, ke la ribelo ne estis fenomeno.

- Kaj mi imagas, - diris la fabelisto, - kiel ĉiuj gravaj pensantaj kapoj de Komitato de Unueco kaj Progreso kreskis, fariĝis grandega kapo, sur ŝultroj de unu uniformulo, kiu sidas en Konstantinopolo, en registara domego, en sia laborĉambro. La uniformulo ne estas sola, ĉar mi – la fabelisto, ankaŭ estas tie. Sed li ne vidas min, ĉar mi estas sidante en lia orelo. Kaj ĉar li ne havas imagon, ne

komprenas, ke oni observas lin kaj tute ne kredas, ke niaj pensoj havas voĉojn.

- Tiuj armenoj ankoraŭ tute ne scias, kiajn intencojn ni havas koncerne ili, - pensas uniformulo. - Ili nenion scias pri finaj intencoj kaj pri fina solvo de armena problemo.

- Vere, ili devos scii pri tio, - respondas Meddah al liaj pensoj.

- Jam vintre ni ilin elĵetis el armeo, kaj ili uziĝis kiel laborforto en malfronto.

- Ĉu kiel Inŝaat Thaburi⁵?

- Jes, Inŝaat Thaburi. Poste ni ĉiujn ilin pafmortigis.

- Mi scias, - diras mi.

- Certe, ni ne povis pafmortigi ĉiujn, ĉar multoj el tiuj timemaj hundoj fariĝis dizertintoj kaj kaŝiĝis en montoj, sed ankaŭ en vilaĝoj kaj urboj – ĉe geparencoj kaj ĉe geamikoj.

- Jes, - diras mi.

- Ni ekzilis grandan parton de armena loĝantaro el urbo Zejtuno kaj el ĉirkaŭaj vilaĝoj. Kaj ĉiuj estis vidinta mortajn grupojn. Malgraŭ tio, armenoj ne volas kompreni ...

- Jes, - diras mi.

- Tiu ĉi ekzilo el Zejtuno devas esti nur averto, nur averto.

- Mi komprenas, - kapjesis mi.

- Multojn ni pendumis kaj milajn inteligencianojn arestis. Sed ili ankaŭ nenion komprenas.

- Ili ne kredas, ke vi kapablas neniigi tutan popolon, - diras mi.

- Ne, ili ne kredas, - diras uniformulo. Tiaj obstinaj kapoj

⁵ Konstrua bataliono /turke/.

pensas, ke la aferoj estos la samaj, kiel ne grandaj okazintaĵoj – ne havantaj signifecon. Kaj ili ne scias, ke tio estas nur komenco, la grandegaj okazintaĵoj ilin atendas en proksima estonto.

- Ĉu vi parolas pri fina solvo?

- Jes, mi parolas pri tio.

- Kaj kion vi diros pri ribelo en Vano?

- Nu, kion mi diru? - diras la uniformulo. - La tutmonda presaro tion elĵetos el ludo. Tiuj putinfiloj – ĵurnalistoj, insistos, ke tio estis memdefendeco.

- Sed kiun pri armenaj volontaj regimentoj en rusa armeo?

- Tiun ankaŭ la tutmonda presaro forĵetos el ludo. La ĵurnalistoj deziras konvinki mondon, ke la armenoj en rusa armeo estas interna afero de Rusio – ne ligitaj kun problemo de turkaj armenoj.

- Sed tio ĉio tre konvenas por viaj programoj, ĉu ne?

- Certe, diris la uniformulo. - Kaj tiujn precedentojn ni uzas por propagandaj celoj. Ĉu vi komprenas? Sed tiuj ne sufiĉas.

- Pri kio temas?

- Ni bezonas pruvojn... tute aliajn ..., por finfina akuzo, por ke iniciati finfinajn agojn.

- Kaj pri kiaj pruvoj?

- Ni havas programon.

- Kaj kiel estos la finfina solvo de problemo?

- Tre simple, - diris la uniformulo. - Se la Vana ribelo

disvastiĝus kaj ĉiuj armenoj en Turkujo levus kontraŭ ni, ni ekkomecus masakron.

- Sed tia ĝenerala ribelo ne ekzistas.
- Ni provokos.
- Kiel vi volas fari tion?
- Nu, ni pri tio ankaŭ havas programon.

- Kiel estos la finfina solvo de problemoj?

- Ni mem precize ne scias, - diras la uniformulo. - Sed ekzistas proponoj. Nenion certan ni ankoraŭ scias.

- Sed tio ja ne estas komplika, - diris uniformulo. - Ni frakasos tiun disvastiĝitan neekzistantan ribelon. Tiu tute ne povas ekzisti, ĉar la armenoj havas nek armilojn, nek sufiĉajn virojn. Ili estas nek organizitaj, nek unuiĝitaj. Ni frakasus tiun ribelon ĝis tio ekkomencus. Poste ni pafmortigos ĉiujn dubindajn virojn. Kaj ĉar ĉiu povanto uzi armilon, estas dubinda, pro averto ni ĉiujn pafmortigos.

- Sed kiel vi kondutos koncerne virinojn, infanojn kaj maljunulojn?

- Ilin ni ekzilos.
- Kien?
- Ien.

Kaj uniformulo, al kiu verŝajne ne plaĉis vorto "ien", diris al mi:

- Ni daŭre devos konsideri opinion de niaj aliancanoj kaj de tutmonda presaro. Pro tio necesas malorienti ilin. Ni devos anonci ilin, ke tiujn amasaĉojn ni devos disloki en Mezopotamio aŭ en dezertoj de Sirio, por ilia sekureco.

- Ĉu por reloĝigado?

- Jes, - diras la uniformulo.

- Mi ne kpedas, ke la homo, laŭ sia karaktero ne estas nomada, - diris uniformulo. - Li ĉie povas vivi, se la klimato konvenas, ekzistas sufiĉa akvo kaj nutraĵo.

- Jes, - diras mi.

- La plantoj ankaŭ kapablas kreski ĉie, se havus sunon, teron kaj akvon.

- Sed devas esti ĝuste tia tero, tia suno, tia akvo, kiuj necesas por tiu planto. - Mi ne povis ne kontraŭdiri.

- Tute ĝuste, - diras la uniformulo.

- Se ĉu mankus tiuj kondiĉoj?

- Tiam... - diras uniformulo, - ... tiam oni mortas frue, kaj la morto estus kruela kaj nenatura.

- Tiujn ekzilitojn oni pelos tra la Taŭrosaj senvojaj montpasejoj. En ĉi tiu lando ĉie ekzistas tiaj nepaseblaj lokoj. La vivantojn oni veturigos per Bagdada fervojo al iu landparto, poste oni ilin mallevigos el trajno kaj daŭrigos peli. Oni ilin kurigos tiam, ĝis ili plu ne havos piedplatojn aŭ ili havus iojn restintajn de siaj piedoj. Kaj la rajdantaj zaptiĥoj daŭrigos peli per knutoj tiuj armenoj ĝis ili falus mortinte. Restantojn... obstine ne dezirintojn rifuzi vivon, kvankam tio nenion kostas, ni pelos al dezertoj – sen akvo kaj sen nutraĵoj. La plej obstinaj, laŭ mia opinio, atingus dezerton. Kaj tie ni bazigus grandegan tendaron, por ke la tutmonda presaro ne opiniu, ke ni estas forgesitaj anticipe zorgi, kaj ke tiu ne estas vera loĝloko – bazita de ni tie. Ja la vera loĝloko devas taŭgi por reloĝigado, ĉu ne? La loĝloko de tiu ĉi amasaĉo necesas, laŭ strategia celo, bazi malproksime

fronto. Sed tie – en tendaro de kaptitoj mankos nutraĵon, ĉar ni estas en milita stato kaj mem havas tre malmultan. Tion kompenus la presaro kaj ambasadoroj, aliancanaj landoj kaj la neŭtralaj ŝtatoj. Post la milito pli neniu armeno restus.

- Tiamaniere ĉu en Anatolio pli ne estos armena problemo?

- Tiele.

- Ĉar neniu armeno vivus?

- Ĝuste.

- Kiam solviĝos la armena problemo?

- Pli malfrue en fino de septembro.

- Ĉu en fino de septembro?

- Jes.

- Sed kiel vi praviĝus antaŭ tutmonda presaro?

- Tre simple. Ni povos nian ministron de internaj aferoj – Taleat bejon, stari antaŭ tutmonda presaro, prezenti oficialan eksplikon. Tion li faros per pura konscienco, ĉar en tiu momento li povus diri al ili: “Sinjoroj, mi tute ne scias, kion vi volas de ni? Ja ne ekzistas armenoj en provinco Anatolio de Turkujo, nek Armena problemo, nek grandkvanteco de armenoj, ĉar rigardu, sinjoroj, kiel mi estas informita, tie plu neniu armeno ekzistas”.

Per fortega salto mi elflugis el orelo de uniformulo kaj flugis al la Lasta Penso, kiu sidinte sur Beatecpordego, atendis min. Mi informis al li mian konversacion, poste diris:

- Ŝafideto mia, kiel vi vidas ĉio entute ne estas komplika. Ĉio definiĝas laŭ volo de bono aŭ malbono. Kiam en certaj medioj la homoj en malico vidas bonon, ĉio fariĝas pli klare. La pastroj kaj la monaĥinoj la pekojn de por grandaj akcidentoj atribuas Dion. Poste ili diras: “Tio estas Dia volo”.

Tamen, la proektantoj de grandaj ŝanĝaĵoj sur geografiaj mapoj kaj de ŝtataj limoj, batadas siajn brustojn kaj paroladas pri naciaj sendanĝerecoj, konscienca riproĉo, kaj ili paroladas pri venko de volo, de malbono, ĉar jam estas malfruiĝintaj, neageblaj decidoj kaj pri finfine efektivigita bono.

Kaj tiel baldaŭ ekagis ĉiuj leviloj, regitaj de turka bjurokratio, por ke la projektojn, naskiĝitajn en gvidaj cerboj, efektivigus en vivo. Pri tio neniu demandis turkan popolon. Ĉiu venis de supro kaj transdoniĝis al malsupro. Mi – la fabelisto, estas mirinta, vidante, ke la korumpita, malbone lubrikita maŝino de turka bjurokratio ĉion faras laŭ programo de Komitato de Unueco kaj Progreso – per preskaŭ prusa motivado kaj certeco. Tia programo, impetante al fina celo, similas artaĵon. Aŭ ĉu mi eraras? Verŝajne nur la vivo estas artaĵo, sed ne tio – kondukanta al neniigo de vivo... La vivo estas pli komplika, ol la morto: ĉar estas pli malfacila, genia afero naski vivon, ol estingi tion. Ĉu tion povas fari ĉiu malkapablulo? Min ekscitas demando: sed kial mi – la fabelisto, devas rompi mian kapon pro tio?

Estas fakto, ke la proektantoj serioze pensadis. La Speciala organizaĵo – nomita Theŝkilath-mahsuz, komence okupiĝis pri milita politiko en kontraŭa flanko de limo. Kiel propaganda kaj kontraŭagitada organo, ĝi volis helpi ribeli kaj liberiĝi turklingvajn popolojn kaj aliajn muzulmanajn naciojn – vivantajn en malamika landparto. Tiu ĉi organizaĵo estis ekscitita pro armenoj. En 1915-a jaro kun unuaj someraj tondroj reprezentantoj de tiu ĉi Speciala organizaĵo –

Theŝkilath-mahsuz, surmetitaj istanbulajn kostumojn kaj ruĝajn fesojn, iliaj malgajaj moŝtoj atakis provincojn. Ilia misio havis unu celon kaj ordonoj de partia komitato neniujn kontraŭdirojn permesis. Ĉio estis klara. La valioj, responduloj por entreprenoj en siaj vilajetoj, devis transinformi ordonojn al apartaj sangakaj poliestroj, mutesarifoj, kajmakamoj, mjudiroj kaj al aliaj malsupraj postenuloj, tasko de kiuj estis akcepti ordonojn kaj plenumi. Necesis trovi armilojn ĉe armenoj, interalie, kaŝitajn armilojn, sekretajn arsenalojn, pri kiuj registaro nenion sciis kaj eltrovis pruvojn de organizataj ribeloj. Pafmortigo ĉiujn virojn, kabaplastajn armiĝi, devus esti plenumita rapide. Ju pli neatendaj estus okazintaĵoj, des pli facile estus por registaro superi en situacioj. La ekzilo de virinoj, infanoj kaj maljunuloj devus esti finite ĝis aŭtuno. En ĉeffrontaj vilajetoj oni devis plenumi ekzilon pli frue. La sinjoroj de Speciala organizaĵo eksplikis al valioj, ke tute ne ĉiuj ekzilitoj devus atingi finajn lokojn. Ili ankaŭ eksplikis, ke necesas informi al montajn kurdajn gentojn kaj ordoni, ke dum pasado tra la kurdaj landpartoj, tuj sur vojoj same kurdoj mortigu virinojn, infanojn kaj maljunulojn. Neniu punos kundojn. Vi interkomprenu. Vi devus interesi kurdojn per karaj aĵoj: ŝuoj, vestoj, rabaĵoj. La sinjoroj ankaŭ promesis helpon. Alvenis helpaj fortoj, por ke la lokaj zaptiĥoj plenumu siajn seriozajn malfacilajn taskojn. Tuta regimento de policioj alveturis partopreni en pafmortigoj kaj akompani ekzilitojn. **Ĉeteoj** ankaŭ vagadis sur vojoj, t. e. ĉiuj krimuloj, kiujn Enver eligis el malliberejoj, por ke ili helpu liberigi tutan popolon de tiu ĉi armena pesto. La ĉeteoj, kiel taĉmentoj en operacioj devus esti dislokitaj ĉie, kie ilin bezonos: sur ĉiuj strataj krucoj, sur ŝoseoj, en montpasejoj, sur riverbordoj. Ilia

tasko estis buĉadi virinojn, infanojn kaj maljunulojn per tranĉilo, fosilo, pioĉo, bajoneto aŭ per aliaj porigaj iloj, sed iam per siaj pafiloj, ĉar ili estis ne sufiĉe armitaj. Tiel eksplikis vojaĝantaj sinjoroj de Speciala organizaĵo. La registaro tamen ŝparis armilojn, ĉar la tempoj estis malfacilaj. La ĉeteoj, kvankam estis ŝtelistoj kaj murdistoj, tiel diris la sinjoroj de Speciala organizaĵo, sed havus eblecon servanti por patrujo derigniĝi post plenumintaj krimoj. La registaro (tiel diris la samaj sinjoroj) ne donas salajron al ĉeteoj kaj postulas, ke ili prenu sian salajron de viktimoj kaj memfinancu. En tia malfacila situacio iliaj agoj estas motivitaj. Pro tio oni misvidadis rabaĵojn de ĉeteoj. La registaro atendas, ke la reprezentantoj de armeno, la policio estimus ĉeteojn. La ĉeteoj surmetis uniformojn de militministaro Enver paŝao kaj de armenaj soldatoj, kvankam ili estis partizanoj, kiel iam hamideanoj kaj baŝibozukoj.

5.

Je fruaj someraj tagoj granda kvanto da telegramoj surteriĝis en laborĉambro de valio de Bekiro, diligente kaj mirinde deĉifriĝis kaj poste bruliĝis, ĉar nenia skribaĵo estis permesita restigi. Tiel devigis ordonoj el Konstantinopolo. Poste, kiam la sinjoroj de Speciala organizaĵo alveturis Bekiron, persone informi ordonojn de Komitato kaj konvinki konsenti kun neeviteblaj okazintaĵoj, ili insistis, ke la enhavoj de telegramoj en Bekiro oni miskomprenis.

- Tio vere estas bona afero, - diris la mjudio al unu el sinjoroj de Speciala organizaĵo, - mi opinias, ke finfine venos la fino de tiuj ratoj.

- Jes, ili estas ratoj, - diris la valio.
- Certe, - diris unu el sinjoroj de Speciala organizaĵo. - Tiele.
- Mi nur ne komprenas, - diris la mjudio, - kial ni devos ekzili ankaŭ maljunajn virinojn. La maljunaj virinoj, tamen, ne ribelas.
- Kiam vi neniigas ratojn, vi devas neniigi ĉiujn, - diris la valio. - La maljunaj virinoj mortados sur vojoj, kaj tio estos bone.
- Ni vidu objektojn reale, - diris unu el sinjoroj de Speciala organizaĵo. - Ili estas ratoj aŭ ne, maljunaj virinoj estas danĝeraj, ĉar ege multe paroladas. Se ili restus vivontaj, povas rakonti pri ni, disvastigi mensogajn fabelojn kaj atingi malbonan reputacion por ni.
- Ĉu mortintoj ne paroladas?
- Ĝuste tiel, mjudio bejo. La mortinta buŝo ne kapablas ŝpruci venenon.
- Kaj kion pri malgrandaj infanoj?
- Ili estas la plej danĝeraj, - diris sinjoro de la Speciala organizaĵo. - Ĉar ili kreskus kaj venĝus por siaj patroj.
- Kaj por siaj patrinoj, - aldonis la mjudio.
- Kaj por siaj fratinoj kaj fratoj, - diris la valio.
- Infanoj estas la plej danĝeraj, - diris la sinjoro de Speciala organizaĵo.
- Kaj kion pri ambasadoreoj? - demandis la mjudio, - antaŭe pri ambasadoroj de aliancuroj.
- Por ili vi tute ne maltrankviliĝu, - diris la homo de Speciala organizaĵo. - Kontraŭ tiaj demandoj ni havas bonan pretekston, ĉar ĉio decidita de registaro estas leĝa.

- Sed ĉu la demando de pafmortigoj de viroj?
- Estas agnoskita, ke oni ribelantojn pafmortigas. Ja estas milito. Aliaj nacioj, ankaŭ havante similajn problemojn, ne kondukis alimaniere.
- Kaj kion pri la ekziloj?
- Pri kiuj ekziloj temas?
- Nu, mi konsideras evakuadojn.
- Aĥ, evakuadojn!
- Jes, tiujn.
- Nu, mjudio bejo. Temas pri evakuado de malamika loĝantaro el militaj regionoj.
- Sed ne ĉiuj provincoj estas militaj regionoj.
- Ĉiuj estas militaj regionoj, mjudio bejo. Vi ne forgesu, la interna malamiko agas ĉie.
- Sed kiel ni eksplikos por ambasadoroj, ke plejparte evakuitoj ne atingis antaŭvidintajn lokojn?
- Vi diru ĝustecon, mjudio bejo. Vi diru, ke la responduloj por tiuj amasoj devus esti niaj viroj, sed ili estas en fronto. Vi trankviligu ilin dirante, ke ni ne povus scii, ke la ĉeteoj larĝigis limojn de siaj rajtoj. Kio koncernas al kurdoj, nu pri tio mi jam parolis. Ne eblas ilin lernigi mezurecon aŭ sintenecon. Se ili estis venintaj de siaj montoj kaj estis buĉintaj virinojn kaj infanojn, kion ni povas fari? Ĉu la malgranda taĉmento de zaptiĥoj devis pafi kurdojn – havantaj kelkcent da rajdantojn kaj pafilojn? Tiu estos vera memmortigo. Nu, vi kompenas, ni ne povis esti responduloj por ili.
- Sed la zaptiĥoj ankaŭ mortigos evakuitojn.
- La zaptiĥoj plenumos sian devon kaj mortigos, se ne eblas agi alimaniere.

La sinjoroj konversaciis pri ĉio, daŭre ili fumis, trinkis dolĉan kaj fortan kafon per malgrandaj tasoj.

- Vi scias, efendioj, - diris la sinjoro de Speciala organizaĵo, - tiu Abdul Hamid estis kompatinda faraĉisto. En tiuj tempoj, 1894-1896 jaroj, li mortigis iom da armenojn, sed la travivintaj armenoj poste abunde multiĝis: anstataŭ mortintoj la armenoj multoble reproduktiĝis. Vi rigardu ĉirkaŭen, la armenoj rapide kreskas, kiel herbaĉoj en fekundaj kampoj.

- Lastatempe mi klarigis, - diris la valio, - ili fakte en estonto pli kaj pli multiĝos.

- Do, al afero, sinjoroj.

- Jes, al afero.

- Kia estas la situacio koncerne armiloj?

- Armenoj armilojn transdonis, - diris la valio.

- Kiam?

- Vintre.

- Post unuaj rimedoj koncerne armenoj, - diris la mjudio, - kiam ni forpelis armenojn el armeo kaj ree ni malpermesis ilin havi armilojn, ni mjunadiojn sendis al armenaj mahaloj. Ili kriis novajn ordonojn. Krom tio ili algluis afiŝetojn sur domoj.

- Pri kio?

- Pri transdonado de armiloj.

- Pri kiaj armiloj?

- Pri leĝaj armiloj, - diris la mjudio. - Pri tiaj armiloj, kiuj la Komitato en komenco de sia potenco disdonis al loĝantaro, ankaŭ al armenoj.

- Jes, mi scias, - diris la sinjoro de Speciala organizaĵo.
 - Ni postulis, ke armenoj tiujn armilojn redonu.
 - Kaj ĉu ili plenumis vian postulon?
 - Memkompreneble, - diris la mjudiro.
 - Ni minacis, ke ili estus murditaj, se ne redonus armilojn,
- diris la valio.

- Ĝuste, - diris la mjudiro.

Kaj la valio diris:

- Ĝuste tiel, je la nomo de Alaho.

- Nun pri la demando de armilkaŝejoj de daŝnakanoj.
- Efendioj, trovi ilin estas malfacile.
- Vere, - diris la valio, - tre malfacile estas trovi tiujn. Ni jam esplorerĉis domojn de armenoj, - diris la mjudiro.
- Ĉu ankaŭ kortojn, kelojn kaj tombejojn?
- Ankaŭ tiujn.
- Antaŭ ĉio la tombejojn, - diris la mjudiro. - Ni levis tomboŝtonojn, sed armilkaŝejoj ne trovis.
- Ili armilojn estis kaŝintaj helpe diablo, - diris la sinjoro de Speciala organizaĵo.
- Vere, - diris la valio. - Vi tute pravas, efendio.

- Kaj nun, - diris la sinjoro de Speciala organizaĵo,- ni ĉion scias. Vi ne pensu, ke la Komitato estas malsaĝa. Ĝi ne estas malsaĝa.

- Je la nomo de Alaho, mi neniam konsideris Komitaton malsaĝan, - diris la valio.

- Jen tiel, - diris la sinjoro de Speciala komitato.

- La Komitato estas decidinta, - diris la sinjoro de

Speciala organizaĵo,- ke la armiloj, kiel pruvo de organizado de antaŭvidita ribelo de rusoj kaj daŝnakoĵ, dum venontaj tri semajnoj estus trovita. Kaj la Komitato, estinte antaŭvidanta kaj sagaca, estas decidinta helpi vin en afero de trovado de armiloj.

- Sed kiel?

- Mi tuj eksplikos, - diris la sinjoro de Speciala organizaĵo.

- Ĉio estas tre klara, efendioj. Dum proksimaj tagoj vi ree sendu mjunadiojn trapasi stratojn, kie vivas armenoj kaj alglui afiŝetojn kun postulo transdoni armilojn.

- Sed se la kaŝejoj de sekretaj armiloj ne ekzistas?

- Ili devos ekzisti, efendioj!

- Jes, vere ili devos ekzisti, - diris la valio. - Kaj je la nomo de Alaho, ni trovos tiujn.

Kaj la sinjoro de Speciala organizaĵo diris:

- Vali bejo, tiuj armilkaŝejoj ekzistas, kaj Alaho indulgu vin, se vi ne trovus ilin.

Kaj la sinjoro de Speciala organizaĵo diris:

- La armenoj ne ekzistantajn armilojn kompreneble ne transdonos. Sed la Komitato saĝe, sagace kaj ĝuste kondukante trovis solvon.

- Ĉu solvon?

- Ĝuste tiel. Solvon.

- Ĉu solvon de tia malfacila problemoj?

- Por la Komitato ne ekzistas nesolveblaj problemoj, efendioj. Kaj mem Alaho scias, ke tiaj problemoj ne ekzistas.

Kaj la sinjoro de Speciala organizaĵo diris:

- Vi arestu armenan eliton – eminentajn homojn, kaj mal-liberigu ilin kiel garantiulojn. Kaj vi minacu armenajn komunumojn, ke vi pafmortigus garantiulojn, se armenoj ne transdonos armilojn.

- Sed ĉu se la armiloj ne ekzistas?

- Ili trovos kelkajn pafilojn.

- Kaj ĉu tio estas ĉio?

- Ne, ne ĉio estas. Poste vi arestu ankaŭ 200 aŭ 300 da viroj, kaj vi turmentu ilin, certe kunekun la elito. Faru vi ĉion, kion konsideros ĝustan.

- Ĉu uzi kutimajn perfortojn?

- Estu perfortoj.

- Ĉu ni povas ankaŭ pinĉpremi iliajn testikojn aŭ verŝajne iomete gratvundi?

- Faru kion vi volas.

- Jam ni pinĉadis iliajn barbojn, sed tiu metodo ne estas efika.

- Certe, ĝi ne estas efika.

- Ni hakis piedojn kaj brakojn de kelkaj armenoj, ankaŭ ni insistis ilin trinki propran urinojn, ni forpremis iliajn okulojn, sed estis nenia rezulto. La armeno ne parolas, se li ne volas paroli.

- Ni eĉ tranĉis iliajn langojn, - diris la mjuriro, - sed ili des pli ne parolis.

- Elpensu vi ion, - diris la sinjoro de Speciala organizaĵo.

- Turmentu vi arestitojn tiom, ĝis ili denuncos lokojn de armilkaŝejoj.

- Armilkaŝejoj, kiuj verŝajne ne ekzistas, ĉu ne?

- Ĝuste.

- Kaj kion poste?

- Poste vi devos trovi kaŝejojn kaj vi konvinkiĝos, ke tiuj estas malplenaj.

- Kaj kion poste?

- Poste vi proponos al arestitoj.

Kaj la sinjoro de Speciala organizaĵo diris:

- La Komitato per sia sagaco, kaj antaŭvideco estas decidinta vendi 4000 pafilojn en Bekiro al tiuj obstinaj armenoj. Ili per armiloj plenigos malplenaj kaŝejojn.

- Sed, efendio, armenoj ne farus tian aŭdacan paŝon!

- Vi eraras, valio bejo. La elturmentitoj faros tion paŝon.

Vi sciu, valio bejo, la turmentitoj estas cedemaj. Vi dirus al ili: "Efendioj, la Komitato de Unueco kaj Progreso estis decidinta savi vin de turmentoj, ĉar tiuj malbelaj metodoj estas tre malnovaj kaj estas tre malproksimaj principoj de partio. Pro tio la antaŭvidema, sagacema kaj justema Komitato estis decidinta armilojn, kiujn vi devis transdoni, simple vendi al vi. Tiel ni vendas al vi 4-5 mil da pafiloj malmultekoste. Vi tiujn armilojn metos en kaŝejojn, kiun mencios ni, por ke ni ankaŭ povu trovi tiujn. Poste vi diros al ni nomojn de viaj gvidantoj. Kaj ni, la regantoj de Bekiro povus informi al konstantinopola komitato, ke la ribelo en necesa tempo estas eltrovita. La armiloj estas trovitaj, la gvidantoj – arestitaj. Kaj vi, efendioj, poste povus trankvile iri hejmen".

- Sed la armenoj ne partoprenus en tiaj sekretaj traktoj.

- Certe, ili ne partoprenus, efendioj, - diris la sinjoro de Speciala organizaĵo.

Kaj li diris:

- La armenoj estas komercista popolo. Ili siavice proponos. Vi pripensu pri tiu propono kaj faru alian

respondan proponon.

- Eblas, - diris la mjudio.

- Estas tute ĝuste, - diris la valio, - kaj ĉu kiun respondan proponon ni farus?

- Do, jen kiun, - diris la sinjoro de Speciala organizaĵo.

- Vi dirus al armenoj: "Efendioj, la kaŝitajn armilojn ni ne trovus, vi transdonus tiujn. Nu, vi vidu, efendioj, jen kion. Ni vendas al vi 4000 da bonajn rusajn pafilojn. Ĉu vi komprenas kiajn? Certe, ankaŭ ni vendas municion. Vi tiujn kunprenus en mallumo, por ke neniu vidu. Vi armilojn portas en viajn kaŝejojn, poste ni donas tritagan tempon. Dum tiuj tri tagoj ni postulos transdoni rusajn armilojn – donitaj de rusoj. Dum tri tagoj daŭre la mjunadioj kriegus, ili ankaŭ promesus ĝeneralan amnistion, se vi bonvole transdonus armilojn.

Ni ankaŭ algluus afiŝojn kun ĉi tiuj postuloj kaj promesoj. Poste tiuj tri tagoj vi eligus armilojn el kaŝejoj kaj alportus kazernon. Tie ni atendus vin. La armilojn ni kalkulus kaj enlistigus. Poste ni informus al Komitato havantan informon. T.e. la ribelo estas elfromita, la armenoj voleme transdonas siajn armilojn kaj dank'al tio ili estus elkulpigitaĵ. Nur poste tio la gvidantoj estus arestendaj. La nomojn de gvidantoj ni anoncus, kaj ili havus tempon malaperiĝi».

- Nu kiel, ĉu plaĉas al vi, efendioj?

- Mirakla propono estas, - diris la valio.

- Estas unika, - diris la mjudio.

- Tiu ĉi ideo iĝis en kapoj de komitatanoj.

- Tiu okaze ni al ĉiuj arestitoj donus ŝancon forkuri.

- Memkompreneble, - diris la sinjoro de Speciala organizaĵo, - tamen post kelkaj tagoj ree ni arestus ilin.

- Sed estus promeso de amnistio.

- Amnistio ne estos, - diris la sinjoro de la Speciala organizaĵo, - ĉar la armenoj ne havus tempon redoni armilojn venditajn de vi. La zaptiĥoj de vilajetoj post vendo de armiloj je la sekvonta tago per ĉenformaj taĉmentoj kontrolus ĉiujn domojn, ankaŭ armilajn kaŝejojn – anticipe informitajn al ni. Vi trovus armilojn kaj laŭ tio arestus ĉiujn virojn - kapablajn uzi armilojn. Poste aroncus pri trovo de armiloj. Kaj samtempe komencus pafmortigadon.

La homo de Speciala organizaĵo ridetis. Kaj mi – la fabelisto, vidis lian rideton kaj povis legi liajn pensojn: “4000 da pafilojn kaj konvenan multekostan municion. La valio monon devus transdoni al ŝtato. Sed tiu ĉi valio estas ruza, fripona homo. Li, certe, vendos al armenoj 6000 da pafilojn, sed transdonos koston de 4000 kaj diferenco de sumo malaperiĝos en lia poŝo. Sed kion fari! Estas vane tiujn provincanojn de malnovaj tempoj de Abdul-Hamid – koruptita regado al kutimigo, al etiko de Komitato. Ili ne komprenas novajn idealojn de nova registaro, luktan kontraŭ koruptado, lian puran disciplinan koncepcion, lian okcidentan orientadon, liajn celojn de novaj tempoj kaj nacian konsolidacion. Nenion, nenion fareblan. Tiuj neŝanĝeblaj posteuloj daŭros trompi ŝtaton kaj ĝiajn enspezojn plenigi en siajn poŝojn. Kaj ĉar nun ni necesas ililan kunlaborecon, pli bone ni ne demandu superflujajn demandojn”.

Tiel pensis la sinjoro de Speciala organizaĵo.

- Se ĉio okazus sukcese, - diris la valio, - la Komitato povus konsideri, ke ni antaŭ festaj tagoj jam komencos pafmortigadon. Post kelkaj semajnoj estos Ramadano. Kiam la kreduloj ekfastos, ĉio estos farita.

- Kaj kiam ni komencu ekziladon de virinoj, maljunuloj kaj Infanoj?
- Post pafmortigadoj. Sed ĝis la festoj. Tuj kiam komencos la Ramadano, armenaj kvartaloj devos esti malplenitaj.
- Sed kiel ni ekzilu ilin?
- Piede – unu parton, alian parton – en bovjungitaj ĉaroj.
- Sed tiom da multajn ĉarojn ni neniam trovos!
- Vi pripensu kiel.

- Ĉu ne eblas tiujn amasaĉojn forpeli piede el urbo?
- Ne, pro presaro kaj ambasadoreoj. Vi ne forgesu, ke temas nur pri evakuacio, aŭ precize pri reloĝigado. Ili devos iri normale, bonstate.
- Sed kiel garantii manĝaĵojn?
- Dum la presaro kaj ambasadorejoj sekvas niajn agojn, vi devas disdoni panon kaj akvon.
- Sed poste, kiam la homoj kaj ĉaroj malaperiĝos en Taŭrosaj montpasejoj.
- Poste ne taŭgas.
- Sed kion fari domojn, meblojn, vestaĵojn, aliajn propraĵojn de armenoj? Kion fari kun iliaj monoj, oraĵoj, ornamaĵoj?
- La karajn objektojn devos esti transdonitaj al ŝtato, - diris la homo de Speciala organizaĵo, - kaj minacante verdikti, ke la armenoj povas en pakaĵoj kunpreni vestaĵojn, ŝarĝi ĉarojn. Ni anoncos, ke la nmovebla posedaĵo estus redonita al mastroj post la milito.
- Ĉu iuj de tiuj homoj revenus?
- Ni zorgus, ke neniu revenu.

- Tiam ne estus problemo redoni nmoveblan posedaĵon.

- Tiele.

Kaj mi – la fabelisto, diras:

- Ili revenus aŭ ne, iliaj domoj restos, sed aliuloj loĝos en tiuj domoj – turkoj, kurdoj aŭ turkmenoj kaj muhaĝinoj, plejparte muhaĝinoj – fuĝintaj mahometanoj el Kaŭkazo kaj el Balkanoj – post eŭropaj malvenkaj bataloj.

- Jam, se venus la tempo, - post drinko glason da brando diris la homo de Speciala organizaĵo, - iam ni kurdojn farigos je veraj turkoj, kion ni ne povas koncerne armenoj: armeno estas fremda objekto en nia viando, malrespektebla piko – nereŝanĝebla, neabsorbenda, neobeema. Ili ĉiam estas fremdaj kaj nekomprenante kontraŭas turkecon aŭ obstine enpikitaj en ni venenas niajn korpojn.

- Tuj lastatempe la mjudio diris ion similan, - diris la valio, - kaj mi pripensis ion similan.

La sinjoro de Speciala organizaĵo kapjesis kaj samtempe affable ridetis:

- Sed Abdul Hamid pensis, ke sufiĉas armenojn farigi je mahometanoj kaj la problemo solviĝas. Sed ni – junturkoj, lernis de eŭropanoj, ke ni devas atenteme rilati al religioj de civitanoj de nia ŝtato, ankaŭ al nacia pensumado kaj al sango, raso. Enver paŝao promesis, ke li mem unuigos ĉiujn turkajn popolojn sur ĉi tiu terglobo kaj promesis, ke li farigos je turkoj ĉiujn.

- Jes, - diris la valio, - Abdul Hamid nenion sciis pri ĉi tiuj novaj ideoj kaj ne sciis, ke reŝanĝado de armenoj ne estos utila.

- Ne estos utila, - diris la valio.

- La eksterlandaj armenoj, la neŭtrala presaro jam kontraŭiĝis koncerne ni, - diris la sinjoro de Speciala organizaĵo, - kaj antaŭ ĉio – la amerikanaj. Kiam ni komencos niajn finajn aranĝaĵojn, ili des pli koleros. Tion ni atendas. Sed ni avertis ilin kaj antaŭ kelkaj monatoj jam diris: “Se iam la armenoj sukcesus ekscitigi tutan mondon kontraŭ ni, tio signifus neniigon de ĉi tiu raso”.

- Ĉu en limoj de nia influo, efendio?

- Ĝuste, valio bejo.

6.

- Antaŭ kelkaj semajnoj ĝis festoj, dezirintoj promeni laŭ longeco de mallibereja murzono, proksime Hjukjumeto, povis precize aŭskulti kriojn de turmentiĝitaj homoj. Turmentoj estis ĉiam en Turkujo, se ne perfidas mia memoro. Sed ĉi fojon la krioj sonis alimaniere, ol iam antaŭe. La krioj atingis medolojn de homoj. La krioj aŭdiĝis tiel, kvazaŭ ia kantisto – ĉenita sur turmenta stablo, deziris kanti por malliberejestro, sed ne havanta muzikan aŭdon.

La krioj estis ne ĝentilaj, sen triloj. La krioj estis diferencaj – mallongaj, daŭraj, kvazaŭ oni ŝovis ion en buŝon de homo. Eble zaptiĥo tenas la randon de lango de arestito kaj iomete tiradas, sed ne forte, ĉar la arestito ankoraŭ bezonas langon, konfesi atenditon. Aliaj krioj estas aŭdeblaj post egalaj paŭzoj: estas klare, oni knutas piedojn. La plandoj de piedoj de armenoj estas precipe sentemaj, ĉar ĉi tiu popolo, konsideranta sin nobela, nudpiede ne paŝadas – almenaŭ en urboj. Kaj la pasantoj scias, la mastroj de ĉi tiuj

piedoj havas delikatajn haŭtojn, tiuj ne estas harditaj. La piedoj de turkoj kaj kurdoj de malsupraj tavoloj en Bekiro estis ne pikeblaj, ĉar havis plandumsimilajn plandojn. Sed armenaj piedoj kutimiĝis surmeti bonajn ŝuojn, eĉ silkajn duonŝtrumpojn, kiujn armenoj ĉiam havis kaj ŝanĝis. Tiaj estis piedoj, de ĝentilaj homoj. Certe, aŭdiĝis diversaj krioj, kaj oni ne bezonis fini konstantinopolan universitaton, por ke scii la aferojn malantaŭ malliberejaj muroj. Precipe facile koniĝis krioj – faritaj de akraj objektoj. Sonis krioj de ĉia toneco de gamo: ŝajnis, ke ili venis el tiu mondo – el purigatorio aŭ el inferno – obtuzaj kaj akraj, orelboraj – venintaj el profundo de torturitaj korpoj, aŭ el senkorpaj malbenitaj animoj. Kelkaj preterirantoj vetis kaj insistis, ke povas precize scii kaŭzojn de krioj nun aŭ iom poste, kion devos fari la sperta zaptiĥo. Poste subite ĉio silentis kaj nenio aŭdiĝis.

La sinjoro de Speciala organizaĵo pravis. Post kelkaj tagoj de turmentadoj armena elito kaj ĉiuj reprezentatoj de komunumoj estas pretaj por fari ĉion, ankaŭ por sekretaj traktoj pri vendado de armiloj. Ili komprenis, ke valio de Bekiro bezonas pruvon pri organizita ribelo – kontentigi konstantinopolan Komitaton. La valio promesis fini turmentadon kun ĝenerala amnistio, se ne havantaj armilojn, kiujn armenoj povus havi, memvole transdonus.

Kaj kial la prudentaj gvidantoj de komunumo devus refuzi tian proponon, des pli la armiloj ne estis multekostaj?

La aferon oni plenumis nokte. Kiam loĝantoj de urbo, pri kiu oni diris, ke ĝi havas mil kaj unu moskeon, estingis siajn

naftajn lampojn, en Bekiraj armilejoj komencis diligenta agado. Jam en kazemro staris longaj vicoj de bovĉaroj. Tiuj ŝarĝiĝis per kestoj de armiloj kaj de municioj. Poste ĉaroj veturis laŭ vojo al armena mahalo. Lacigitaj zaptiĥoj kompanis ĉarojn kaj iomete rajdis, eĉ la dika dormema valio – sidinte sur sia ĉevalo, la mjudio kaj la mutesarifo, la kajmakamo kaj certe ankaŭ la sinjoroj de speciala organizaĵo. En armena kvartalo nur informitaj personoj sciis pri la granda komedio – fina ĉapitro de armena historio, por ke komenci alian novan. La sciintoj kvankam estingis siajn lampojn, sed ne kuŝis dormi. Malgraŭ komandanta horo, ili malfrue nokte estis sur stratoj, sed neniu arestis ilin pro rompo de reĝimo. La armenoj prenis la armilojn, kunekun zaptiĥoj portis en kaŝejojn. Pli malfrue ili kun urbestro iris restoracion “Hajastan”, kiu kelkajn semajnojn estis fermata, sed dum la tiu neordinara tempo estis malfermita. La elitanoj, ankoraŭ havantajn manojn kaj piedojn, kiujn la turkoj ne knutis aŭ ne tranĉis per hakiloj, kiuj ankoraŭ povis paŝi lamante, sendanĝere ŝarĝis kaj kaŝis armilojn. Poste kun ili reprezentantoj de registaro renkontis en restoracio “Hajastan”, ili drinkis rakion kaj deflanke registaron – sidintan en Konstantinopolo, asertis, ke armenoj estas neŭtralaj. Ankaŭ unu fojon oni argumentis ĝeneralajn kaŭzojn koncerne vendo de armiloj, sekretajn traktojn ĝeneralan amnistion, interkompreniĝon. Ree kaj ree la valio promesis sendanĝerecon. La armenoj, samtempe disrigarde vizaĝojn de sinjoroj, trankviliĝis kaj poste, ankoraŭ ne parolis pri interkonsento, nur asertis, ke ili mem silentiĝos pri la sekreto kaj laŭ konvena tempo, dum tri tagoj transdonos armilojn. Sed tuj sekvontan tagon la komedio finiĝis, aŭ vere, nur

komencis, ĉar sekvontan tagon, kiam la armenaj elitanoj unue vekiĝis sen timo, karesis siajn edzinojn kaj diris al ili, ke nun ĉio estas bone, la situacio paciĝos kaj estos efektiva interkonsento, la zaptiĥoj jam estis starintaj antaŭ iliaj pordoj. La zaptiĥoj longtempe ne staris antaŭ pordoj, ĉar sciis, ke la armiloj estas trovitaj, ke la kaŝejoj de armenoj estas malsekretigitaj, sekve, la armenoj devas tuj transdoni armilojn, kiujn ili – la perfidoj, ricevis de rusoj aŭ de rusflankaj homoj, por ke ribeli, kiam la rusoj proksimiĝos al urbo. Tuj, post ĉi tiuj sciigoj, la zaptiĥoj invadis en loĝejojn.

Jes, ĉio plenumiĝis tre rapide – laŭ la programo. Dum la sama tago komenciĝis arestoj, tiom multaj, ke la urbo neniam vidis. Estis la 20-a de junio de 1915 jaro, ĝuste du semajnoj antaŭ Ramadano – antaŭ granda fasto kaj purigo de konscienco – komencota en la 2-a de julio. Vere, la turkoj havis tempon por pafmortigado, kiuj ne devus maltrankviligi kredulojn dum fasta monato. Restas kelkaj tagoj, kiam la unua pafilega salvo de fortikaĵo, kiel dum malnovaj tempoj, sciigos pri komenco de fasta preĝo. Malgraŭ tio, la valio ĝuste sekvontan tagon, ĉe la aŭroro komenci pafmortigojn. Eble la valio rapidis, sed ne. Tiel okazis, ĉar la sinjoroj de Speciala organizaĵo jam volis forveturi kaj insistis, ke ili ne povas forveturi, ĉar ĉio ankoraŭ ne estas finita. La valio transdonis komendecon al mjudiro, alvokis lian moŝton kaj eksplikis, ke necesas pafmortigi ĉiujn virojn – kapablajn uzi armilon, t.e. ĉiujn virojn, kiuj kapablas teni vergon sen helpo de patrino, viroj – ankoraŭ havantajn dentojn aŭ membrojn, kiuj uziĝis ne nur por urini. Ĉiujn danĝerulojn, kiuj aspektas danĝeraj aŭ kiuj en proksimaj tempoj povos fariĝi danĝeraj.

Dum 3 tagoj, daŭre, armenaj viroj, po 4 vico – interligitaj per ŝnuroj, frumatene forigiĝis el urbo. Samtempe la oficialaj heroldoj kriegis kaj informis pri ribelo en urbo Vano, pri armenaj regimentoj en Rusoarmenio, pri ilia kunlaboro kun orgojlaj Bekiraj armenoj. Ĉio estis eksplikita, en necesa momento Alaho savis patrujon de turkoj. La imamoj ankaŭ anoncis similajn sciigojn en moskeoj, la ĥoĝaoj diris la saman al infanoj en lernejoj kaj ili avertis esti malproksime ĝinoj, diabloj kaj armenoj. Sur fortikaĵa murzono estis algluitaj kriantaj listoj, ankaŭ sur pordegoj, domaj muroj – malhonorigantaj armenoj, kaj la ĵurnaloj superis ĉiujn – skribante informojn pri perfido de armenoj. Sur stratoj de Bekiro kune estis starintaj konfuzitaj turkaj kaj germanaj oficistoj, kaj la ambasadoraroj de neŭtralaj ŝtatoj, kiuj abomenante fermadis siajn fenestrojn.

En grandaj partoj de Anatoliaj urboj armenajn virojn oni pafmortigis antaŭ urbaj pordegoj, sed en Bekiro turkoj kondukis pli singardeme. Ĉar la montoj estis proksime, oni kondukis virojn iomete paŝi ne pli malproksime – je la distanco, kiu postulis fumi 40 da cigaredojn, sed ne pli. Tie, kie la montaj ravinoj estas profundaj, ke zaptiĥoj mem timis rigardi rekten, tie la ĝinoj kunekun ventoj hurladis unumaniere, kaj la forta homo, sen rapidbatado de koro, ne povis observi abismon, tie homo singardeme paŝetas ne lasante bridon de ĉevalo, tie oni pafmortigis virojn. Certe, ne ĉiuj estis pafmortigitaj, ĉar la taĉmentoj – senditaj helpi bekiran policion, informis, ke necesas ŝpari municion. Ili diris, ke venos pli malfacilaj tempoj, ili diris ankaŭ aliajn iojn. Sekve

tiuj senditaj zaptiĥoj mortigis homojn per glavoj kaj ĵetadis malsupren. Tie partoprenis ankaŭ ĉeteoj, kiuj havis hakilojn en siaj selsakoj.

La bekiraj malsaĝaj, maldiligentaj zaptiĥoj miris vidante, kiel lerte la ĉeteoj per siaj hakiloj krevigas kraniojn de armenaj viroj, kvazaŭ dum sia vivo neniojn aliajn ili faris. Kaj ankaŭ unu avantaĝo: oni ne bezonis enterigi mortintojn, ĉar la ravinoj estis bonegaj tombejoj. Kaj ĉar multegaj homoj estis ĵetitaj en ravinoj, poste oni ne ĉiujn ĵetis forte, kaj multoj estis falintaj sur montaj vojetoj. Tiajn mortintojn la turkoj lasis por hundoj, kiuj en ĉi tiu lando estis tre multnombraj. Ja la frankoj Turkujon nomis lando de vagantaj hundoj. Ili estas nekalkuleblaj, pli multnombre ol vulturoj kaj kornikoj. La hundoj manĝaĉis ĉian putrintan viandon sur urbaj kaj vilaĝaj stratoj, sur ŝoseoj kaj en montpasejoj. La tuta lando estis ĉasejo por hundoj. Kvankam ili estis malpli rapidemaj ol la rabobirdoj, sed pli sukcesis, ĉar manĝaĉis pli multe kaj rare lasis ion post si.

La sinjoroj de Speciala organizaĵo estis mirintaj, sciante, ke la kurdaĵ gentoj ne partoprenis ĉi tiun buĉadon. Ĝenerale la kurdoj tuj alvenadis, se ekzistis trofeo – vestaĵoj kaj ŝuoj.

- La kurdoj atendas, - diris la valio, - verŝajne ili evitas konflikti kun ĉeteoj aŭ kun multegaj zaptiĥoj el vilajeto Erzrumo.

- Ni jam informis al montloĝantaj kurdaĵ gentoj, - diris la sinjoro de Speciala organizaĵo, - ke baldaŭ ĉaroj – ŝarĝitaj de virinoj kun infanoj kaj maljunuloj, pasos tra iliaj teritorioj.

- Bone, - diris la valio, - la kurdoj atendas, ke la familioj de pafmortiĝitaj viroj pasus tra siaj teritorioj, ĉar supozas, ke

ekzilitojn akompanas malmultnombra grupo de zaptiĥoj.

- Jes, verŝajne, - diris la homo de Speciala organizaĥo.

- Ankaŭ la kurdoj atendas pli multan trofeon de virinoj, infanoj kaj maljunuloj, ol de la viroj – nenion karan havantaj.

- Tiele, valio beĵo.

- Malgraŭ tio necesas timigi kurdojn.

- Kontraŭe, - diris la homo de Speciala organizaĥo, - se ni virinojn, infanojn kaj gemaljunulojn pelus al montoj, la kurdoj devos neniigi ilin pro eksterlanda presaro kaj ambasadorejoj. Nu, mi ĉion jam eksplikis por vi. Kaj la aliaj sinjoroj ankaŭ aŭskultis: la pafmortigado de ribelantoj postulas la milito. Por tio ni povas respondi. Sed la buĉado de virinoj, infanoj ni atendas de kurdoj. Tiam la registaro povos diri, ke si nenian rilaton havas kun ili.

- Jes, vi tiun jam estis eksplikita al ni.

- Jen, vi rememoris.

- Sed ĉu la atakoj de zaptiĥoj kaj precipe de ĉeteoj...?-demandis valio.

- Nedelonge tion mi ankaŭ eksplikis por vi kaj por viaj homoj. La Komitato scias kion faras kaj scias pri sia respondeco. La zaptiĥoj nur plenumas sian aferon, kaj, se ili iam estos devigante uzi armilon por defendi disciplinon, eksterlandanoj tion komprenos. Kaj pri la ĉeteoj ni eksplikis por vi – ili estas rabistoj kaj murdistoj. Ni devos transdoni aferon al ili, ĉar mankas homoj. Ĉu ni havas kulpon, ke la ĉeteoj ignoras leĝon? Ili venis el malliberejoj. Ni ne povas ja por ĉiuj trovi juristojn. La leĝa okulo ne povas esti ĉie. Nun estas malfacilaj tempoj, valio beĵo. Ni devos doni ŝancon al ĉeteoj agi.

- Sed ĉu la ekziloj?

- Nenia ekzilo estas. Ĉu tiun denove ekspliki? Jen, kion. Temas pri evakuo pro strategiaj kaŭzoj en militaj kondiĉoj. Ĉi tiujn armeninojn kun siaj infanoj kaj gemaljunulojn ni nur akompanas vojaĝi. Pro tio ni desponis al ili bovjungitajn ĉarojn, ni permesos kumpreni ŝarĝojn. Do, tiel. Estos malgranda vojaĝo kaj nenion pli.

7.

Antaŭ Ramadanaj kaj fasta monato en Bekiro kelkaj tagoj nomiĝas “mjunadiaj”, ĉar iam antaŭe la heroldoj kaj tamburistoj neniam tiel penis hurli pri ordonoj de registaro antaŭ fermitaj pordoj kaj fenestroj de armenoj. La granda parto de heroldoj konis mastrojn de oreloj, por kiuj estis antaŭvidita la sciigoj, kaj ili sciis, ke la armenoj estas ĉiam singardeme de naskiĝo ĝis morto kaj ili eĉ dormante aŭskultas malbonaŭgurajn sciigojn – elpensitaj de nomo de Alaho. Sed la armenoj denature estas krudaj. Ili ne agnoskas sian sorton kaj ĉiun antaŭ deciditan por ili – skribitan en Libro de Sortoj, kiun neniu en la mondo povas eviti. Ĉi tiuj armenoj tiel kondukis, kvazaŭ estis misaŭskultitaj, kvazaŭ la tago de ekzilo ne estas skribita en Kalendaro de Alaho. La mjunadioj tra la fermitaj pordoj kaj fenestroj aŭdis ĝemojn kaj plorojn de geparencoj de ekzikutitoj, kaj pro tio la mjunadioj kriadis tiel laŭte, kiel neniam antaŭe, por ke la plorantoj ne sin ŝajnis, kvazaŭ ne aŭdas. Kelkaj mjunadioj estis bonkoraj kaj kun plezuro helpis armenojn, ĉar dum jaroj, aldonitaj de Alaho, ĝis hodiaŭ, negocis kun armenoj, de ili aĉetis siajn vestojn, ŝuojn, ledajn monujojn, ŝafidfelajn akropintajn ĉapojn, kurtenojn, kovraĵojn, siajn kuprajn potojn, ferajn serurojn –

por siaj pordoj. Jes, eĉ grandaj tamburoj kun bastonetoj ili mendis ĉe armenoj. Ofte kelkaj mjunadioj post kriado de gravaj anoncoj, ĝenerale de nomo de tuta Komitato de Unueco kaj Progreso, havis apartajn interparolojn kun mastroj de ĉi tiuj oreloj, iam kun infanoj, iam kun maljunuloj, sed plejparte kun virinoj. Mjunadioj diris al ili: “Via plorado por viroj estas simuleco, kaj kvazaŭ vi ne estis aŭdintaj sciigojn, estas absurdo. Vi devos transdoni al ŝtato viajn ĉiujn karajn objektojn kaj monojn. La ŝtato estas bonkora kaj permesas kunpreni 300 piastrojn – elspezi dum vojaĝo. Do, kolektu viajn aĵojn, kunprenu 300 piastrojn. Se vi havas orojn aŭ ornamaĵojn, kiujn ankoraŭ vi ne estis transdonintaj, ne kaŝu tiujn en viaj vestaĵoj aŭ en haroj aŭ en viaj vaginoj, neniam en viaj analogoj, ĉar oni ĉion trovos kaj elprenos. Vi tiujn enterigu ie, por ke poste denove vi eligu”. Multaj armeninoj obeis mjunadiojn kaj kion ili ne volis transdoni al ŝtato, enterigis. Tamen, multoj ne kondukis tiel, ĉar pensis, ke ne taŭgas vojaĝi sen oroj.

Antaŭ Ramadano, dum fastaj lastaj tagoj antaŭ okuloj de servistoj de ataŝeoj okazis spektaklo. Ĝi komencis kun sunleviĝo kaj daŭris ĝis mallumiĝo. Longaj vicoj de milaj virinoj, infanoj kaj gemaljunuloj – akompanitaj de rajdantaj soldatoj, eliradis el urbaj pordegoj. Kiuj ne estis havintaj lokojn en ĉaroj, iris piede. Similaj ĉarvicoj venadis el vilaĝoj kaj urbetoj, kaj ĉiuj pasadis tra Bekiro: “Deportiĝas cent miloj armenoj, - skribis reprezentantoj de ataŝeoj al siaj registaroj. - Oni reloĝigas ĉiujn. La registaro asertas, ke armenoj iras Surion. La donitaĵoj ne estas certaj. Neniu scias deciditan lokon”.

Memkompreneble, kelkaj metiistoj kaj homoj, kies servo estis neŝanĝebla, saviĝis de pafmortigo kaj ekzilo. Oni ne ekzilis ankaŭ iliajn familiojn, ĉar ĉi tiuj homoj ne povis plenumi siajn laborojn bone, se iliaj familioj estus forpelintaj kaj mem estus restintaj sole. Kaj ĉar en tiu ĉi landparto la metiistoj sen ekskluzivo estis armenoj, okazis tiel, ke la plej gravaj aŭ neŝanĝeblaj homoj por ŝtato, povis resti. Ankaŭ povis resti kelkaj riĉuloj, ĉar la valio havis intencojn, pri kiuj ne devis scii la sinjoroj de Speciala organizaĵo.

En la fino de junio de 1915-a jaro, antaŭ du tagoj ĝis Ramadano, la valio invitis en sian laborĉambron mastron de restoracio "Hajastan".

- Hajkaz efendio, - diris la valio, - mi ofte manĝis kaj drinkis en via restoracio, ankaŭ la mjudio, la kajmakamo, same la mutesarifo. Servistoj de malsupraj gradoj, eĉ la zaptiĥoj kaj mjunadioj manĝadis en "Hajastan". Via kuirejo estas luksa, ne ekzistas plej bona kuirejo.

- Jes, - diris Hajkaz, - mia edzino estas bona kuiristino. Mi same klopodis bonege, por ke kontentigi niaj gastojn.

- Tiele, - diris la valio, - vere. Kaj vi prenis nenian piastron de ŝtataj uniformuloj.

- Tio estas ĝuste, - diris Hajkaz.

- Sed ni ĉiam gardis, ŝirmis vin.

- Jes, - diris Hajkaz.

- Ĉu vi konfesas tion?

- Jes, - diris Hajkaz.

Mi indulgis vian familion, Hajkaz efendio, - diris la valio. Sed ĉu vi kredas, ke mi tion faris, ĉar ofte mi estis manĝinta en via restoracio?

- Ne, - diris Hajkaz.
- Mi estis havinta miajn kaŭzojn.
- Jes, - diris Hajkaz.
- La registaro permesis min, - diris la valio, - indulgi kvindek metiistojn kaj iliajn familiojn.
- Jes, - diris Hajkaz.
- Sed mi skribis al Komitato, ke mi bezonas cent da metiistojn, por ke la urbo estu en ordo. Ĉu vi komprenas?
- Jes, - diris Hajkaz.
- Sed mi tute ne bezonas tiom da metiistojn, - diris la valio, - ĉu vi komprenas?
- Ne, - diris Hajkaz.
- Do, jen kion. Kvindek riĉajn armenojn mi enlistinĝus, kiel metiistojn. Kaj ĉu vi scias, kion tio signifas?
- Ne, - diris Hajkaz.
- Tio signifas, ke ĉi tiuj homoj povas vivi, kvankam ili ne estas metiistoj. Ĉu vi komprenas?
- Jes, - diris Hajkaz.
- Mi enlistiĝis vin, kiel ĉarpenton, Hajkaz efendio. Sekve, post ĉi tiu tago vi estas ĉarpento.
- Jes, - diris Hajkaz.
- Ĉu vi komprenas ion en ĉarpenta afero?
- Ne, - respondis Hajkaz.
- Nu, tio ne gravas, - diris la valio. - Gravas, ke ni interkomprenas.
- Kial vi estis farinta tion? - demandis Hajkaz.
- Vere, kial mi ne estis farinta?

Kaj la valio diris:

- Vi, efendio, estis enteriginta grandnombrajn orojn kaj

ornamaĵojn. Tio vi estis kaŝinta, por ke la ŝtato ne forprenu. Tion ni scias. Sed ni ne scias, kie vi estis kaŝinta.

- Mi tute nenion estis kaŝinta, valio bejo.

- Ho, ne. Certe vi estis kaŝinta – eĉ grandan kvanton.

Kaj la valio diris:

- Ĉiu armeno havas kvar kaŝejojn. Se mi ilin turmentus, li diris al mi la lokon de unua kaŝejo, por ke eviti turmentojn. Sed en unua kaŝejo estas ioj, sed ne trezoroj. Ĉu vi komprenas tion?

- Jes, - diris Hajkaz.

- Se mi daŭrigu turmentojn, ili, verŝajne, dirus lokon de dua kaŝejo. Sed tie ankaŭ ne ekzistas veraj trezoroj.

- Jes, - diris Hajkaz.

- Kaj eble post tio ili sciigus lokon de tria kaŝejo, - diris valio. - Sed tie estus nur malmultega parto de iliaj riĉaĵoj.

- Eblas, - diris Hajkaz.

- La veraj trezoroj estas en kvara kaŝejo, - diris la valio, - sed pri tiu loko ili neniam dirus al mi.

- Jes, - diris Hajkaz.

- Kio ajn mi faru, - diris la valio, - ili neniam dirus.

Kaj la valio diris:

- Sekve, ne taŭgas turmenti ilin, efendio. Ne taŭgas turmenti.

- Jes, - konsentis Hajkaz.

- Do, mi elpensis ion alian, pli multe influeblan ion plezuron por ni ambaŭ.

- Pri kio temas, valio bejo? - demandis Hajkaz.

- Vi volonte alportos trezorojn al mi, efendio, - diris la

valio, - kaj vi eĉ ekpetos min preni ĝin. Vi ĉiutage sur genuoj alvenos ĉi tien – Hjukjumeton, kaj petos min preni trezorojn.

- Sed kiel valio bejo? - demandis Hajkaz.
- Tio okazos jen kiel, - diris la valio.

Kaj la valio diris:

- La germanaj aliancanoj mokas nin pro kutima imposto por liberiĝo de rekruto, kiu ĉimomente estas 44 da turkaj liraĵoj. Ni tiun nomas bedelon. Kaj ĉiu armeno ekde naskiĝtago pagas tiun bedelon. Do, kial, vi efendio, ne pagu bedelon al mi, ĉar vi ne ekziliĝas? Vi komprenu min ĝuste: tiu ĉi bedelo ne estas oficiala, ĉar ni tre erarus, se ĉiu armeno – peliĝenda en dezerton, per malriĉa bedelo aĉetus sian liberon. Ne, certe, tiel ne estos.

- Do, ĉu ne estos?
- Se vi rakontus al alioj nian sekretan interparolon (kaj mi ne konsilas rakonti), tiam eblos fari ion.
- Do, ĉu eblos fari ion?
- Jes, efendio. Je la nomo de Alaho, eblos fari ion.

Kaj la valio diris:

- Vi pagu al mi ĉiutage 44 liraĵojn, kiel bedelon – per oraj aŭ arĝentaj monoĵoj. Se vi pagos per ornamaĵoj, tiam necesos certigi veran koston, kaj laŭ ĝi ĉiutage trakalkulos 44 liraĵojn.

- Ĉu eblas per papermonoj?
- Ne, nenian papermonon, - diris la valio, pro devaluto de mono.
- Mi komprenas, - diris Hajkaz.
- Pri tia afero neniu scias, nur ni ambaŭ scias, ĉu vi kompensas? Vi kaj via familio estus libera, ne ekziliĝus.

- Mi komprenas, valio bejo.
- Nun vi estas metiisto, efendio, ĉarpento, kiun ni necesas.

- Jes, valio bejo.
- Domaĝe, ni devas konfiski domojn de ĉiuj armenoj. Sed vi, kiel metiisto, povas loĝi en via domo, dume la ŝtato bezonos metiistojn.

- Jes, valio vejo.
- Ĉiutage, efendio, vi devos malfermi vian trezorojn kaj eligi oron aŭ arĝenton aŭ konvenan ornamaĵon. Dum la tempo vi malfermos ĉiujn viajn kaŝejojn – fositajn en tero. Tiel vi po parte ĉion eligos de tie.

Mi ne ordonos nek batadi vin per vipoj, nek turmentigi alie. Ni ne fortiros viajn dentojn, viajn avarajn fingrojn per hakilo, ne fortranĉos ankaŭ vian voston – naskadan infanaĉojn, kutime nomiĝantan armeno. Ni eĉ ne tinkos viajn teskitojn, ni tute ne bezonos. Ĉiutage vi eligos monon aŭ ornamaĵon, vi mem komprenas, ĉar tiuj multekostaj aĵoj signifas tagan prokraston de ekzilo aŭ tagan liberecon. Kaj tiun ĉion vi volonte transdonos al mi.

- Jes, valio bejo.
- Se la milito daŭros longe, frue aŭ malfrue vi malfermos ankaŭ kvaran kaŝejon, kie kaŝiĝas la granda trezoro kaj vi alportos al mi.

- Jes, valio bejo.
- Ĝuste tiel, - diris la valio.
- Mi dankas, valio bejo, - diris Hajkaz.

- Nur bedaŭrinde, - diris la valio, - antaŭnelonge ni pendumis vian fraton Tigran.

- Jes, valio bejo.

- Li estis bona ŝuisto. Sed nun ni bezonas ŝuistojn. La botoj de mortintaj turkaj soldatoj bezonas urĝajn rebonigojn, por ke tiujn surmetu vivantaj soldatoj. La botoj de vivantoj ankaŭ bezonas riparon, ĉar post longaj marŝadoj tiuj estas en malbona, mizera stato. Ĉu vi komprenas, efendio? La krudaĵo estas malmulta. Kaj la bona ŝuisto faros miraklon. Sed de kie ni rapide trovu tiom da ŝuistojn, kiuj efektive nun taŭgas? Sed la bonaj metiistoj plejparte estas armenoj.

- Preskaŭ ĉiuj ŝuistoj estas armenoj.

- Ĝuste tiel, efendio.

- Jes, - diris Hajkaz.

- Mi tre domaĝas, - diris la valio.

- Tiuj ĉi friponaj armenoj havas orajn manojn, - diris la valio. - Ĉioj, faritaj de ili, estis altkvalitaj. Ilin helpas mem diablo, alie kiel ekspliki kial ĉe ili ĉio fariĝas tiel bone. Vidu, efendio, eĉ mi – la valio de Bekiro, miajn botojn mendas ĉe armeno. Mian civilan vestaĵon, eĉ la uniformon kudris armeno. Ĉio farita de armena tajloro estas bonstila. La laboro de mia majstra tajloro estas rimarkinda. La ŝuoj, kurditaj de armeno, mi surmetas kun plezuro – ankaŭ uniformon kaj vestaĵon. Tiu ĉi uniformo faras min pli bonproporce kaj junaspekta je 10 jaroj.

- Jes, valio bejo.

- Sed malgraŭ tio, mi pafmortigis lin, ĉar klariĝis, ke en listo de metiistoj – ricevintaj rajton vivi, estis tre multaj.

- Mi komprenas, valio bejo.

- Tre domaĝe, - diris la valio.

- Kiel fartas via frato Sargis? - diris la valio. - Ĉu li estis juvelisto?

- Jes, li estis juvelisto, - diris Hajkaz.

- Mi trarigardos, ĉu li estas en listo de metiistoj? - diris la valio.

- Li ne estas tie, - diris Hajkaz.

- De kie vi tion sciis?

- Li estas pafmortigita kun aliuloj, - diris Hajkaz.

- Domaĝe! - diris la valio. - Li estis sperta juvelisto.

- Jes, - diris Hajkaz.

- Certe estus alie, se li estus forĝisto, - diris la valio. - Dum militoj neniu bezonas juvelistojn, la kavalerio bezonas hufferistojn.

- Jes, valio bejo.

- La plej bonaj hufferistoj estas armenoj, - diris la valio, - sed domaĝe, malmultoj de ili estas ĉi tie.

La valio proponas al Hajkaz cigaredon de fabrikmarko "Amrojan".

- Tiuj ĉi estas finaj amrojanaj, - diris li, - ili estas multekostaj, sed bonegaj cigaredoj – vera armena kvalito. Ĉu vi scias, efendio, mi akiris grandan kvanton, ĉar la uzino de ameno Amrojan plu ne ekzistas?

- Tiuj estas bonaj cigaredoj, - diris Hajkaz.

- Ĉu vi havas ion informon pri mia frato Vardan Ĥatisjan?- demandis Hajkaz.

- Ne, - diris la valio. Ni supozas, ke li estas mortinta kaj ni forgesis pri li.

- Do ĉu juĝo ne estos?

- Ne, juĝo ne estos. - Kaj la valio aldonis. - La afero de Vardan Ĥatisjan estis elpensa ideo de mjudio. Tio daŭre turniĝis en lia cerbo, kaj mi ĝojas, ke tiu afero plu ne ekzistas. Efendio, se la babilantoj de presaro demandus min klari tiun aferon, mi dirus al ili: "Efendioj, pri kiu afero temas? Ĉu pri afero de Ĥatisjan"? Kaj mi ekridus kaj dirus: "Efendioj, tiu ĉi afero similas turkajn fabelojn, kiuj komenciĝas: "Vivis iu iam, vivis iu neniam...". "Efendioj, la ĉi tiu afero ne ekzistas kaj neniam ekzistis..."

- La afero de Vardan Ĥatisjan, mallonge dirante, "La afero de Ĥatisjan" plu ne ekzistas, ŝafideto mia. Tiun diras mi – la fabelisto, al mia ombro. Kaj se pli malfrue, post la milito, dum pli bonaj tempoj, kiuj, verŝajne, pli bonaj ne estos, se oni listumos historiajn librojn, nenian trovus tie pri la afero de Vardan Ĥatisjan, pri kiu la falsifikanto de historio, si mem – la mjudio de Bekiro, insistis, ke tiam, en Saraevo reĝidon de Aŭstrio kaj lian edzinon paftrafis mem Vardan. Kaj mi, ŝafideto mia, vetas, ke falsifikantoj de historio ŝancelus siajn kapojn, kiam mi – la fabelisto, eventuale estus sidonta en liaj oreloj. Ili dirus al mi: "Ne, ni neniam aŭdis pri afero de tiu ĉi Ĥatisjan. La turkoj imputis tiom pekojn al armenoj, ke plu nenio estis imputi. Ĉu la tiu ĉi armeno paftrafis erchercogon? Kaj ĉu per tiu ĉi mortebla pafo aranĝis Grandan militon? Ni ne kredas tion. Tio certe estas perfekta absurdo!"

Sed mi dirus: "Certe, tiu estas absurdo. Sed vi vidu, sinjoroj kaj sinjorinoj, signifecon, se aldoni al milaj imputitaj pekoj de armenoj ankaŭ unu, tiu vere havos por ke poste oni dirus: "Estis mil kaj unu kulpoj"."

Mi aŭskultas silenton. La voĉoj de pensoj de ekscititaj historiistoj silente babilaĉas. Unu el iliaj pensoj diras al mi:

- Meddah, ĉio en miaj libroj – en historiaj lernolibroj, tamen estas priskribo de sekveco.

- Kia sekveco?

- Sekveco de genocidoj de grandaj kaj malgrandaj gentoj ekde komenco. Kaj ĉiuj estas argumentitaj, por ĉiu estas preteksto kaj por ĉia preteksto estas unu akuziĝo. Nun mi komprenas, Meddah, kial la akuziĝoj estas multaj aŭ malmultaj, nenian signifecon havas.

- Ĝuste, - diris mi.

- Tamen, ĉu *la afero de Ĥatisjan* estis ekzistinta aŭ ne? - demandis la voĉo de historiisto.

- Tio ne gravas, - diras mi.

- Sed kion pri tutmonda konspiro kaj diablo, kiu estas kulpulo en ĉio?

- Mi ne scias, - diras mi.

- Pri tio nenio estas en miaj lernolibroj.

- Nu, tio nenian signifecon havas, - diras mi.

Kaj mi sin turnas al ĉiuj ĉeestantaj sinjorinoj kaj sinjoroj:

- Sinjorinoj kaj sinjoroj! - diras mi. Vi nenion trovos pri tutmonda konspiro en viaj lernolibroj, sed vi bone serĉu en viaj kapoj kaj pripensu. Aŭ pli bone, ne pripensu!

8.

- Ĉu vi vidas tiun homoseksualan germanon, kiu ankoraŭ iradas en Hjukjumetan viran necesejon, kaj montras sian postafiĝon al zaptiĝoj. Ĉu vi vidas lin, ŝafideto mia? Kaj ĉu vi vidas alian germanon – tiun okulvitruilon? Ĉu vi vidas iliajn

kakikolorajn uniformojn?

- Jes, mi vidas ilin, - diras mia ombro.

- La okuvitrulo ĵus ion skribis en sia kajereto, - diras mi.

- Ĉu vi vidas kiel li ridetaĉas? Nun li diras al homoseksualisto.

“Laŭ nia kalendaro la Ramadano de niaj aliancanoj komenciĝas je la 2-a julio de 1915-a jaro kaj finiĝos je la 1-a de aŭgusto”.

“Jes, longdaŭra fasto estas”, - diras la homoseksualisto.

“Tio ankoraŭ estas duono de malbono, - diras la okulvitrulo. - La fasto komenciĝas kaj finiĝas per pafilegaj salvoj. Ĉiutage ripetiĝas la sama. Dum tago la muzulmanoj streĉas siajn remenojn, sed post sunsubiro tute ili malstreĉas, manĝaĉas plenigante tutojn ventrojn kaj trinkaĉas, kiel ĉevaloj”.

“Kaj kion pri amo?”

“En la Korano estas skribita: “La virinoj estas viaj kampoj. Iru viajn kampojn kiam kaj kiom vi volas””.

“Ĉu ankaŭ dum fastaj tagoj?”

“Ne, vere ne!”

“Ĉu la amo estas malpermesita dum Ramadano?”

“Ĝi nur estas malpermesita dum tago, nokte estas permesita”.

“Ĉu de sunsubiro ĝis sunleviĝo?”

“Jes”.

“Ĉu tio estas skribita en la Korano?”

“En la Korano estas skribita: “Estas permesita al vi dum fastaj tagoj dormi kun viaj edzinoj””.

“Ĉu ĉio?”

“Ne. La profeto ankaŭ diras: “Vi dormu kaj aspiru, kion

Alaho estas permesinta vin””.

“Kaj kion pri *aliaj amoj* dum Ramadanano?”

“Pri kiaj aliaj temas?”

“Mi konsideras amon, kiu ekskluzivas partoprenon de virino. Ĉu eblas, ke la kredema mahometano dum Ramadanano dormu kun viro?”

“Pri tio necesas demandi imamon, - diris la okulvitrulo, - aŭ ĥoĝaon”.

”Ili scias pri tio”.

Neniam la registoj laboris tiel rapide kaj difine, kiel dum lastaj tagoj antaŭ Ramadanano. Ŝajnis, ke la ĉie estintaj soldatoj de germana kajzero – pelitaj de prusa vento, ordigis ĥaosaj laborĉambroj de aliancaj turkoj. Kaj okazis tiel, ke jam antaŭ semajno de fastaj tagoj, en la urbo Bekiro armenoj ne ekzistis, restis nur kelkaj metiistoj kaj riĉuloj – savitaj de la valio. Ili nek ekziliĝis, nek pafmortigiĝis. La germanaj oficiroj daŭre deziris insulti, ĉar nenio estis por siaj edzinoj. Estis fermitaj vendejoj de armenaj juvelistoj, estis fermitaj ankaŭ la metiejoj de kudristoj, la butikoj de komercistoj – vendintaj silkon, ŝtofojn, produktojn same estis fermitaj de miksitaj varoj – havantaj fabelajn aĵojn, alportitajn de Okcidento. Ŝajnis ĉio estis ŝanĝita en Bekiro – pro malapero de armenoj. La bazaroj estis preskaŭ malplenaj, la stratoj kaj la stratetoj – silentaj. La odoroj tie jam estis aliaj, ĉar malaperis la fabelaj odoroj – ĝuitaj de germanoj, dum romantikaj vojaĝoj, malgraŭ tio estis ne nur odoro de dolĉaĵoj, de gustozaj manĝaĵoj de fremda lando, sed ankaŭ odoro de restaĵoj kaj putraĵoj. La urbo estis malĝojinta, malĝoja estis

ankaŭ la flava suno – disvastiginta radiojn sur kasketoj de fremdaj soldatoj.

“Strange estas, - diras homoseksuala germano al sia akompananto. - Post malapero de armenoj neniu estas pendumita sur Beatecpordego”.

“Jes, estas strange”, - diras la dua germano.

- Ĉar ĉimomente neniu estas pendumenda, - diras mi – la fabelisto, al mia ombro, - mi proponas vin pendumiĝi sub Beatespordega arko.

- Sed mi ne havas kolon, - diras mia ombro.

- Mi scias, - diras mi, - mi ankaŭ ne intencas vin pendumi, ĉar la nigraj hokoj de pordego hazarde estas malplenaj. Mi nur deziras, ke vi atendu ĉi tie, por ke mi povus facile trovi vin.

- Ĉu vi volas forflugi ien sen mi?

- Jes. Nelongtempe.

Do, tiel mi flugis – sekvante ĉarvicojn de virinoj, infanoj kaj gemaljunuloj – kun siaj pakaĵoj. Mi volis scii, kial la bovjungitaj ĉaroj poste revenis malplene?

Baldaŭ mi vidis, ke virinojn, infanojn kaj gemaljunulojn oni tuj ne pafmortigis. Okazis tiel. La arabaĉioj (ĉaristoj) – responduloj por ĉaroj, kun siaj pasaĝiroj, atingis vojkruciĝon de ŝoseoj, unu el kiuj kondukas ĝis marĉoj de Konio. Mi aŭdis ankaŭ, kiel unu el arabiĉioj – urboloĝanta kurdo, diris al zaptiĥoj: “Ni plu ne veturos. La mjudio diris al ni, ke ni veturu ĝis vojkruciĝo de ŝoseo – kondukanta al Konio”.

- Diablo prenu ĉi tiun vojkruciĝon! - insultis la zaptiĥo.

- Sed ni ne veturos al Konio, - diris la maljuna kurda

arabaĉio. - Ni devos revenigi malplenajn ĉarojn en Bekiron, por ke ree ŝarĝi.

Poste venis la ĉefzaptiĥo kaj diris:

- Jes, ĝuste. Ĉi tiujn orgolojn forĵetu sur ŝoseon. Tiu ĉi armena amasaĉo povas piede daŭrigi vojon.

- Ĉu vere ili iras Konion? - demandis la arabaĉio.

- Mi ne scias, - diris la ĉefzaptiĥo. - Ili iras ien, verŝajne Mezopotamion.

- Tiuokaze necesas iri je alia vojo.

- Sed mi devas ĉi tiujn homojn konduki ĝis Konio, - diris la ĉefzaptiĥo, - tie mi ilin transdonos. Poste ili verŝajne daŭros sian vojon.

- Ĉu Mezopotamion?

- Verŝajne tien, - diris la ĉefzaptiĥo. - Eble ne tien.

Diablo prenu ĉi tiun amasaĉon, kiun ni devos konduki ien, kvankam mi ĝuste ne scias kien. Kaj la ĉefzaptiĥo forkraĉis longarke sian maĉitan tabakon kaj samtempe svingis skurĝon al zaptiĥoj – signante ekmovi.

Ĉio daŭris humane. La zaptiĥoj – ĉeestintaj antaŭ kelkaj tagoj, kiam pafmortigis edzojn de ĉi tiuj virinoj aŭ alimaniere buĉis, nun estis mirintaj – kial la ĉaŭŝo ne ordonas pafmortigi ĉi tiujn virinojn kaj infanojn, ankaŭ gemaljunulojn, pri kiuj estis dirita, ke ili estas virinoj, ĉar iliaj vostoĵ plu ne ekscitiĝas, kiel decas al veraj viroj. Jes, estos utile ne prokrasti aferon kun tiuj ĉi senkreduloj, ĉar malsaĝe estus, se oni tiujn ĉi friponojn pelos piede kun siaĵ pakaĵoj – kaŝintaj multkostaj aĵoj, kiujn ili akiris kaj proprigis, kvankam tiuj apartenas al turka popolo kaj al neniu. Al Konio. Kial al Konio? Ja ekzistas pli mallongaj vojoj al Mezopotamio – tra Malatio kaj tra Eŭfrato.

Kiam la zaptiĥoj komencis per ledaj knutoj peli homojn el

ĉaroj kaj ĵeti iliajn pakaĵojn sur ŝoseojn, la turkaj kaj kurdaj arabaĉioj ekridis.

Ĉio plenumas humane. Je la nomo de Alaho, la zaptiĥoj ne estas kulpaj, ke la armenoj havis multajn ŝarĝojn, pli multajn, ol si mem povis porti. La granda parto de ŝarĝoj estis restinta sur ŝoseo, kiam la zaptiĥoj malbenante kaj insultante ekpelis homojn – stimolante ilin per siaj knutoj. Kaj ĉar multaj armenoj, precipe maljunuloj, ne povis paŝi sufiĉe rapide, tiujn oni per knutoj frapadis pli forte kaj ofte. Tio necesis, ja la zaptiĥoj devos montri ordonan esprimon – daŭri la vojon. Poste, kiam plej maljunuloj kaj plej malfortuloj kolektiĝis kaj devos esti pafmortigitaj, ĉar estis ne permesita ilin resti tie, la zaptiĥoj komprenis, ke kun tiuj ĉi senfortaj homoj oni kondukas humane.

- Estis junia varmega tago, kiam mi – la fabelisto, flugis post la ĉarvicoj de kvin mil da armenoj. Mi ne soifis, ĉar mi ne havas korpon, sed aŭdis ĝemojn de homoj, kiuj post tagmezo, paŝante kelkhore, ekkriis: “Akvon!” Ju pli longe mi flugis post ĉarvicoj, des pli ili evidente maldensiĝis de pereoj, pli ofte la maljunuloj kaj senfortuloj, malsanuloj, invalidoj tro peniĝis kaj senesperigis, ne povis paŝi kaj pafmortiĝis de zaptiĥoj. Jes, kiel mi diris, estis junia varmega tago. Certe estis varmega, kaj ne eblis daŭre lasi mortintoj sur vojo. Sed la saĝa kaj antaŭvidanta Alaho zorgis pri ĉio. Li tra ĉielo laŭ spuroj de armenoj sendis vulturojn kaj vagantajn, sendomajn hundojn – surtere. Kaj ili venis ĝustatempe, por ke disŝiri vestojn de mortintoj, disigi viandon de ostoj dume ne estis komencinta putrado, ĉar estis terure varme. En ĉi tiu lando

estas tiel: vintre estas furioza frostoj, somere – tro varmeco. Post la muĝantaj, spiregantaj hundoj kaj post la grakantaj vulturoj, kornikoj – avide glutantaj pecojn de homa viando, rampis amasaĉo el urbo Bekiro kaj el ĉirkaŭaj vilaĝoj – por ke maroderi. Ili sin tenis sur distanco, ĉar ne volis havi aferon kun zaptiĥoj. Ili trovadis pakaĵojn – lasitajn sur ŝoseo, trovadis ankaŭ aĵojn: kaptukojn kaj aliajn nemanĝeblajn objektojn, same ŝuojn kaj botetojn – lasitajn de mortintoj. Tiu amasaĉo same havis malfacilaĵojn, ĉar preskaŭ ĉiuj sekvis ĉarvicojn piede. Inter ili ankaŭ estis malfacile paŝantoj, ili same bezonis defendi sin – akirante bonan trofeon. Ili devis interbatadi kun similaj aĉuloj, inter ili same estis vunduloj kaj mortintoj. Jes, vere estis tiel. La plej malriĉaj mahometanoj estis foririntaj el urbo - forpreni de armenoj, kion preparis por ili Alaho en lando de sultanoj kaj de korumpita oficistaro. Sed la amasaĉoj venadis tre malfrue, ĉar la zaptiĥoj jam estis malfermintaj la pakaĵojn kaj enpoŝintaj karajn aĵojn. La amasaĉoj estis furiozintaj. Ili kriis, mordetis kaj disŝiris vestaĵojn de mortintoj, por ke trovi orajn monojn, ĉar ili estis aŭdinta, ke la armenoj siajn orojn kaŝas en kudraĵoj. Ili disŝiris ankaŭ ŝuajn kalkanumojn: kaj trovis ion, sed ofte trovis nenion.

La zaptiĥoj ĉirkaŭis domojn de armenoj ĝis la ĉarvicoj elveturis el urbo. Poste ekkomencis rabadon. La regantoj estis anoncintaj, ke la domoj kaj la mebloj post milito estus redonontaj al senkreduloj, kaj iotempe ŝajnis, ke ĉio estas sendanĝerita. Reale nenio estis enlistiĝita. Kaj kio ne estis rabita de amasaĉo, proprigis la oficistoj. Ĉiuj multekostaj aĵoj malaperiĝadis tie, kie la rigardo de Komitato ne povis penetri.

La rabantoj kaj marodantoj estis miritaj. Ili diris: “La armenoj estis enterigintaj siajn orojn». La aliuloj diris: “Ne, ili kunportis. Ni devas iri post ili, laŭ la ŝoseo. Armenoj orojn kaŝas en kudraĵoj aŭ en ŝuoj”. Sed alioj diris: “Ne, la armenoj estas ruzaj. La orojn ili certe estis glutintaj. Necesas disŝiri iliajn ventrojn”.

Ne! Ne ĉiuj mahometanoj estis rabintaj domojn de armenoj. Kiam la tamburistoj paŝis tra la urboj, iuj mahometanoj jam sciis, kies vico estas ekziliĝi, kaj ili aĉetis ĉion aĉeteblan laŭ etprezo. Multaj armenoj donacis iujn aĵojn al tiuj bonaj mahometanoj kaj petis konservi restintojn ĝis ili revenus. Mi erare iujn mahometanojn konsideris al bonajn, sed iliaj okuloj estis hipokrataj kaj avidaj. Inter ili estis kelkaj grekoj kaj judoj. La greko per sep piastroj – per ridinda kosto, aĉetis pianinon; kaj judo, starinta apud greko kaj enviinte rigardinte aĉeton, demandis anticipan mastron de pianino: “ĉu li havas ankaŭ unu alian kaj aldonis, ke si pagos ok piastrojn?”. Sed la armeno ne havis duan pianinon. La greko tintigis la pianinon, tre kolerante judon, ĉar li havis muzikan bonan aŭdon. “Iam ni, judoj, - diris la judo al armeno, - ankaŭ estis persekutitaj, sed tiuj tempoj, gloron al Dio, jam pasis”. Kaj li rakontis al armeno pri judaj buĉecoj – permesitaj de rusa reĝo, pri masakro – plenumita de kruckavaliroj kaj pri hispanaj inkviziciaj fajregoj.

Dum kelkaj semajnoj mi – la fabelisto, flugis ĉirkaŭ Anatolio, poste revenis Bekiron. Mi forprenis mian ombron de pendumita hoko sub Beatecpordego, karesis lin kaj sidigis sur miajn genuojn.

- Mi estas fabelisto. Vi nomu min Meddah. La fabelojn –

rakontitaj de mi por vi, ne estas fabeloj. Tiuj estas veraj historioj.

Kaj mi rakontis por mia ombro vidintaj de mi – fluginte sur Anatolio.

- Do, ĉu sur ŝoseo mortintoj estis tiom multnombraj? - demandis mia ombro. - Kaj kiuj ankoraŭ povas paŝi, ĉu daŭrigos vivi?

- Dum du tagoj ili tra la ŝoseo iris al Konio. Ili daŭre malmultiĝis, aŭ alidire la ŝoseo fariĝis pli diversforma, pro la falitaj mortaj korpoj – kun siaj diverskoloraj vestaĵoj: brunaj, ruĝaj, flavaj, ankaŭ kun nigraj kaj bluaj ŝuoj, kun virinaj kaptukoj, vualoj (ofte tre bonkvalitaj), kaj certe senrandaj ĉapoj de mortintaj maljunaj homoj kaj ĉapetoj de infanoj. La mortintoj similis vojmontrajn kolonojn. La ĉefo de zaptiĥoj kaj ĉeteoj, rajdintaj post vicoj, devis bone scii, kie estas ekzila marŝruto kaj kie estas la ĉefa ŝoseo.

Multaj anstataŭantoj de regantoj, sidinte sur ĉevaloj, rajdis laŭ direkto de kadavroj. La plej granda amaso ilin atendis en Taŭrosaj montpasejoj. Kaj tiel dum du tagoj, piede pasinte ŝoseon, la akompanantaj zaptiĥoj elektis pli mallongan vojon – pasantan tra montoj. Sed en montpasejoj jam atendis taĉmentoj de ĉeteoj.

Jes, ĝuste, la ĉeteoj estis informitaj, ke ne taŭgas malrapidi. Sed ili anticipe volis perforti junulinojn kaj poste mortigi. Alie kia senco estis precipe mortigi kaj poste leviĝi sur ŝi, truigi, kiam ŝi pli ne tremas aŭ krias. Pro tio ili mortigis maljunulinojn. Ili mortigis ankaŭ malgrandajn infanojn kaj maljunulojn. La ĉeteoj disŝirante forigis vestaĵojn de korpoj

de junaj virinoj kaj ilin ĵetis sur someran netolereblan teron, kiu, malgraŭ vento, suno kaj manko de pluvoj, ne estis seka, sed humida kaj glueca pro ekskremento de virinoj, per kiuj pro timo la virinoj estis malpurigintaj sin mem. Sed la ĉeteojn tute malhelpis nek urino, nek fekaĵoj. Ili amuzante per manoj knedis fekaĵojn, kaj montris al virinoj siajn virajn membrojn – ruĝajn konveksajn, cirkumciditajn, senhaŭtajn, aspektantajn minace. Ofte la ĉeteoj helpis sin per bajonetoj, kiam vira vosto ne trovis malfermaĵon inter virinaj femuroj aŭ ili ne povis trovi, ĉar la timo de perejo fermis la malfermaĵo de vulvo. La zaptiĥoj same ĝuis: ili demetis uniformajn pantalonojn kaj ĉar ne volis interbatadi kun ĉeteoj, frate prenis tion, kion la ĉeteoj lasis por ili.

- Vi ne kredus, sed la pasiigo flamigis ĉiujn turkojn. Eĉ la plej kreskaĝuloj aperiĝis erektion kaj ili juniĝis. Ŝajnis, ke la krioj kaj la timo de virinoj des pli pasiemaj farigis perfortantojn. Jes, estis varmege kaj humide en Taŭrosaj montpasejoj, kvankam la flava suno ne ĉiam aperadis.

Sed kie estis la montaj kurdaj gentoj? Tion mi ne scias. La regantoj delonge estis informintaj al ili, ĉar la regantoj deziris atribui buĉadon al kurdoj. Kurdaj gentoj aperis, kiam la restaĵoj de kvinmilaj grupoj de ekzilitoj pli profunde eniris en kurdajn areojn. Tie ili estis liberaj en siaj agoj. La registaro estis promesinta riĉan trofeon. Pri tio sciis ankaŭ policiaj taĉmentoj. Centope ili piede kaj rajdante, kriegante kaj muĝante venis el siaj montaj nestegoj. Ili pafis per siaj malnovaj pafiloj, kvazaŭ volis timigi ne nur pereojn, sed ankaŭ policiajn taĉmentojn, kiuj timis. Neniu volis havi aferon

kun kurdoj. La kurdoj ĉiam aperadis tage, dume ili ne kaptis sunon kaj fermis ĝin en nigra tendo. Ili perfortis restajn virinojn kaj rajdis sur virinoj, kiel maraj ondoj falas sur sablorifoj. Iuj kunportis virinojn, alioj lasis ilin falitaj tranĉante iliajn kolojn, ĉar la virinoj aŭ jam estis mortintaj aŭ estis maljunaj, kaj ne plaĉis al kurdoj havi aferon kun tiaj virinoj.

La kurdoj forprenis ĉiujn vestaĵojn kaj ŝuojn de pereoj kaj la policiaj taĉmentoj ne malhelpis, pensante, ke somere la pereoj ne frostos, se ilin peli nude. Estis necese peli, ĉar en Konio aliaj zaptiĥoj devos peli ĝis Mezopotamio. Kelkaj ekzilitoj devos atingi Mezopotamion, ĉar laŭ ordono temas nur reloĝigado. Sed kia reloĝigado okazis, se reloĝigantoj ne atingos antaŭdeciditajn lokojn?

- Mi – la fabelisto, nomiĝata ankaŭ Meddah, diris al mia ombro – sidiĝinta sur miaj genuoj. - Iutage, ŝafideto mia, iutage la ĉefzaptiĥoj ekpensis, ke tiuj ĉi nudaj homoj eble estas kaŝintaj orojn aŭ karajn aĵojn. Sed kie la pereoj povis ion kaŝi, se estas nudaj?

- Kaj jen, - diris mi – la fabelisto, la zaptiĥoj antaŭe serĉis orojn en haroj de pereoj, kaj trovis kelkajn aĵojn. Poste zaptiĥoj malfermigis buŝojn de pereoj kaj ŝovis siajn fingrojn ĝis iliaj stomakoj, ĉar opiniis, ke la stomakoj de armenoj taŭgas nur kaŝi orojn de ŝtato. Ili disŝiris ankaŭ ventrojn de mortintoj kaj fosis intestojn, vaginojn, analojn. La zaptiĥoj ŝovis siajn manojn ĉien, atente kontrolis ekskrementojn kaj, vere, iam ili trovis orojn.

La ĉefzaptiĥo, havante gradon de ĉaŭŝo (feltfebelo), diris al unu el ĉeteoj:

- Precipe la armenaj patrinoj havas malbonan kutimon – kaŝi turkan noblan oron, por ke poste aĉeti panon por siaj gefilaĉoj, se povus ie feki kaŝintan oron.

- Sed ĉu estas tia loko aĉeti panon, ĉaŭŝo aghao? - diris ĉeteo, - aŭ kie ili povos kaŝe feki? Ja ni ĉiufoje kontrolas fekaĵojn. Kaj kia celo estas aĉeti por infanaĉoj panon, se ĉiuj estos mortontaj?

- Ne ĉiuj, - diris la ĉaŭŝo. - Kelkaj el ili vivos.

La ĉaŭŝo ekdubis:

- Vi ne konas armenojn, - diris li al la ĉeteo, - ili estas ruzaj.

Eĉ ilaj fekaĵoj nenion sciigos nin pri sekretoj de armenoj.

- Ĝuste, - diris la ĉeteo. - Eĉ poste morto la armenoj kaŝas siajn sekretojn.

- Ĝuste, - diris la ĉaŭŝo. - Estas ĝusta kaj tio, ke vulturoj kaj hundoj scias ege multe, ol ni.

- Pri kio tiemas, ĉaŭŝo aghao? - demandis la ĉeteo.

- Mi vetas, - diris la ĉaŭŝo, - ke la vulturoj kaj hundoj estis manĝaĉintaj ne nur intestarojn de mortintoj, sed ankaŭ ĉion estintan en tiuj. Ankaŭ la orojn.

- Ĉu vere vi pensas tiel, ĉaŭŝo aghao?

- Jes, - diris la ĉaŭŝo.

- Tiukaze necesas mortaĉigi ĉiujn vulturojn kaj hundojn kaj disrigardi iliajn ventrojn, - diris la ĉeteo.

- Necesas, - diris la ĉaŭŝo.

Mi ankoraŭ longe konversaciis kun mia ombro kaj

rakontis al li pri centmilaj ekzilitoj, rakontis pri vicegoj – venintaj el Cezareo kaj el Muŝo, el Trebizondo kaj el Erzrumo, kaj el aliaj lokoj.

- Unu tuta popolo marŝas tra vojoj, - diris mi. - Ĉiujn la zaptiĥoj forpelis. Kelkaj homoj ne bezonis iri malproksimen, ĉar oni ilin pafmortigis tuj en limkvartaloj de urbo. Aliulojn poste oni buĉis survoje per bajonetoj aŭ per pioĉoj. Restintoj daŭrigis siajn infernajjn vojojn.

- Do, ĉu la homoj venadas el ĉiuj direktoj?

- El ĉiuj direktoj, - diris mi. - Kvankam mi precize ne scias, kiom da direktoj ekzistas en mondo.

- Kaj laŭ kia direkto oni pelas homojn?

- Laŭ nenia direkto, - diris mi. Ĉimomente laŭ nenia. Li la vojoj ĉesiĝas, la celoj disiĝas, kaj nenia loko restas.

- Tamen, devos esti unu cela loko. Mi longe flugis tra aero, kaj miaj okuloj bone vidas pli malproksimen, ol montaglaĵoj okuloj. Tiel mi vidis, ke vivantoj trapasis Eŭfraton kaj sub frapoj de knutoj de zaptiĥoj, ŝancelante moviĝis tra senakvaj, senkreskaĵaj dezertoj, kia estas la senhara kranio de jedisua vilaĝestro. Ŝajnis, ke tiu ĉi tero englutis ĉiujn kreskaĵojn – kreitajn de amoza Dio. Jes, tiu ĉi tero eĉ englutis montojn kaj kaŝis sub sablo. Tie estis tendaroj kaj dometoj. La malmultajn atingitajn homojn oni ĵetis en tiujn ejojn – lasante sen manĝaĵo kaj sen akvo.

Mi diris:

- Mi aŭdis kriojn de soifantoj kaj malsatuloj, mi aŭdis ridon de flava suno – senindulge staranta meze super terglbo kaj sennuba, blua ĉielo. Mi aŭdis kriojn, mi vidis mortintajn

infanetojn – suĉantajn mamojn de siaj mortintaj patrinoj.

- Ja la mortintaj infanoj tamen ne povas suĉi?

- Tio nur ŝajnas, - diris mi. - Mi vidis patrinoj kun frenezaj okuloj. Mi vidis patrinoj, kiuj manĝis viandon de siaj mortintaj infanoj por almenaŭ malfortigi malsaton kaj trinkis sangon pro la netolerebla soifo.

Kiam mi rakontis pri tio al mia ombro, inter ni flugis io. Kaj mi pensis: “Verŝajne tiu estas la Lasta Penso de Tovma Ĥatisjan. Lin io maltrankvilis”.

9.

- Mi vidas zaptihon en Bekiro, - diris la Lasta Penso, - zaptihon, kiu aspektas iomete diverse alioj. Liaj okuloj estas aliaj.

- Mi ankaŭ lin vidas, - diris mi, - li havas armenajn okulojn. Kaj ĉio turko, rigardanta en liajn okulojn, povas scii tion.

- Li iras tra armena kvartalo, - diris la Lasta Penso, - preter lasintaj domoj kaj vendejoj. Liaj okuloj estas duonfermitaj, sed iam li larĝe malfermas tiujn. Li penadas iri nerigardeble, malrapide, kvazaŭ li promenas.

- Kiu volas esti nerigardeble, li pli vidiĝas, - diris mi, - ĉar en movoj de tiu ĉi stranga zaptiĥo ekzistas io artefarita. Li ne devos emfari nerigardeblecon. Tio altiras atenton de homoj.

- Kiu estas ĉi tiu homo?

- Ni tuj ekscios, ĉar li nun proksimiĝas al Beatpordego. Baldaŭ li estos ĉi tie.

La zaptiĥo kun armenaj okuloj pli kaj pli malrapide

paŝas. Li estas laca, kvazaŭ li volas sidi ie kaj ripozi. Sed li eniras nenien, ĉar estas Ramadanano kaj la kafejoj malfermiĝos, kiam la pafilega salvo informos, ke la fasto estas finita.

Unu el **kahveĝioj**⁶ estas sidinta sur kuseno, ĉe la kafeja pordo. Li alvokas zaptihon:

- Hej, zaptiĥo aghao! Alaho sendis por mi verdajn freŝajn kafajn grajnoj, mi jam tiujn rostis. Jam tiuj estas brunaj, bonodoraj, kaj brilas kiel la okuloj de fianĉino sub vualo. Sed nun estas Ramadanano, zaptiĥo aghao, vi revenu tuj post sunsubiro, kaj mi preparos por vi tian kafon, kiun vigliĝas lacajn homojn.

Sed la zaptiĥo nur ekridetis kaj nenion respondis.

La muezinoj jam ekkomencis voki kredulojn al moskeoj. Hodiaŭ laŭ franka kalendaro estas la 27-a de julio. Jam estas lastaj fastaj tagoj, sekve, la impeto de kreduloj, unuiginte preĝi, estas pli forta. La voko de muezinoj sonis pli obstine, kvankam ili ripetadis tiujn, kiujn sciis ĉiujn: :Alaho Akbar! Alaho estas la plej granda, kaj mi konfirmas, ke estas nenia Dio, krom Alaho. Mi konfirmas, ke Mahometo estas la profeto de Alaho. Venu preĝu! Venu preĝu! Venu saviĝu! Alaho Akbar! La illa lah! Alaho estas la plej granda! Estas nenia Dio, krom Alaho!". Kaj ĉar estas festaj tagoj – Ramadanano, mi – la fabelisto, aŭdas, kiel la muezinoj daŭrigas siajn unutonon vokon. Mi aŭdas: "Vi, kreduloj, nutru orfojn, malriĉulojn, vagantojn – amitajn de Li, Alaho kaj diru: "Ni nutras vin laŭ volo de Alaho, nenan vorton de dankesprimado aŭ rekompenco!"".

⁶Kahveĝi - mastro de kafejo /turke/.

La zaptio kun armenaj okuloj, atingis Beatecpordegon. Sub ĝi ree estis tumulto; sed ne pro tio, ke la regantoj denove pendumis tri homojn, jam delonge oni ne faras tion, sed pro tio, ke malriĉuloj el siaj kabanoj venis urbon, por ke vespere preĝi ekstere fortikaĵaj muroj. La zaptiĥo haltis ĉe blinda almozulo – sidanta kiel statuo: unu lia mano estis metita sur genuo, kaj la alia malfermita manplato estis etendita sur naztuko. La zaptiĥo silente daŭre estis starinta antaŭ de almozulo, tiom longtempe, ĝis la almozulo sentis ies ĉeestecon, kaj li timante komencis palpi liajn botojn, poste – randojn de pantalono – volante koni, al kiu ili apartenas?

- Tiu estas mi, - diris la zaptiĥo, - Vardan Ĥatisjan.

- Ĉu Vardan Ĥatisjan?

- Jes, - diris la zaptiĥo.

- Vardan efendio! - eksklamis la blindulo. - Glorion al Alaho. Vi vivas!

Jam estis preskaŭ mallume. Mi – la fabelisto, vidas, ke la almozulo faras ion signon, mi aŭdas iliajn flustradojn kaj mi ankaŭ flustras ĉe la orelo de la Lasta Penso.

- Observu, via patro devos esti atentema, ĉar sub la Beatecpordego estas spionoj, murdistoj, denunculoj kaj ĝenerale estas danĝera, se li longe staru tie – precipe havante armenajn okulojn. Kaj ni trio – mi, mia ombro, la Lasta Penso de Tovma Ĥatisjan vidas, kiel la stranga zaptiĥo iras post la almozulo – lasante sin portu fluo de kreduloj.

- Li kun tiuj iras en moskeon, - diris mi, - ĉar ĉihore li ne estas rigardebla, kaj vi, ŝafideto mia, povas vidi, ke ne nur via patro estis surmetita uniformon.

- Mi vidas, - diris la Lasta Penso. - Mia patro ne estas nura. Inter kreduloj estas uniformulaj zaptiĥoj.

- Mi supozas, - diras la fabelisto, - via patro renkontos kun la almuzulo en moskeo aŭ en ĝia korto, kie kreduloj laviĝas.

Ni triope observas vian patron – falsan zaptiĥon, kiu en korto de moskeo Sankta kovraĵo, laŭ ordo lavas sin, kvazaŭ ĉiam li estis plenuminta la procedon. Kaj mi supozas, ke via patro lernis tion de Gjog-gjog – vivinte kun turkoj de Jedi Suo. Li neniel diversiĝas inter alioj, ankaŭ poste preĝante en moskeo. Via patro parkere unutone ripetas vesperan preĝon, kiel aliuloj kaj surgenuas, kiel aliuloj kaj krias “Alaho!”, kvankam mi estas konvinkita, ke li pensas pri Kristo. Kiel aliuloj, li longe rigardas dorson de imamo (starintan al la kiblo⁷) – forte krianta nomon de Alaho. La imamo estis preminta du dikajn fingrojn malantaŭ oreloj, aliaj kvar fingroj estis etenditaj, kaj li ploretas, vokas Alahon, falas sur genuojn kaj metas siajn manojn sur ventron poste sur genuojn, malbele turnas sinrigardante ĉirkaŭen, kvazaŭ ĉiumomente povas vidi heĝiron⁸ aŭ mahdion⁹, kiu eble flustros ion pri paradizaj sekretoj.

Post preĝo via patro meditinte estas starinta en moskea korto. Kelkaj adoremaj turkoj turnas sin al li, pensante, ke li ne havas familion, sed ne deziras hodiaŭ dormi en kazerno. Verŝajne li estas unu el fremdaj zaptiĥoj, multoj de kiuj estas

⁷ Fuĝo de Mahometo el Mekko al Medino /15-an de Julio 622 p.K./.

⁸ Muzulmana erao, kalkulita ekde tiu dato: en la 834-a jaro de la heĝiro.

⁹ Punkto de la spaco, al kiu islamanoj sin turnas preĝante, t.e. la direkto al la Mekka templo.

en urbo. Unu el turkoj – maljunulo, diris al li:

- Filo mia, dum Ramadanano ne taŭgas resti sole. La pordo de mia domo estas malfermita por ĉiuj kreduloj.

Sed via patro ŝancelis kapon kaj diris:

- Mi scias, ke mi malĝoigas vin – refuzante vian inviton, sed mi jam estas invitita kaj ne povas malĝoigi lin.

Poste via patro subite vidis almozulon.

Niaj rigardoj observas vian patron – malrapide irantan kun la almozulo. La blindulo per sia bastono, montrante direkton, alkondukis lin ĝis Beatecpordego, poste ili eliris el urbo kaj daŭrigis vojon ĝis kabanoj kaj nestegoj de malriĉuloj.

La kabanaĉo de almozulo estis senfenestra. En toniro, nomita tandir, ĝoje brulis fajro. En la loĝejaĉo estis virinoj kaj infanoj – anoj de familio de almozulo kaj ĉiujn nutradis li. Ĉi tie estis ankaŭ lia nepo – Ali.

- Ĉi tiu homo revenis el mondo de mortintoj, - diris la almozulo. - Li estas mia gasto.

Post ĉia peco, manĝita de turkoj post longa fasto, ili diras “Bismillah¹⁰”. Tiamaniere estis ankaŭ en familio de almozulo. Via patro ankaŭ diris “Bismillah”, kvankam li samtempe pensis pri Kristo. Via patro manĝis kun apetito kaj rapide, ĉar en lia stomako nenio delonge estis. Precipe plezuraj estis manĝetoj – preparitaj kun spicoj. La almozulo daŭre plenigis lian lignan teleron. Unu el virinoj aldonis manĝaĵojn sur tablo, kaj via patro nehontante prenis tiujn. Pli malfrue ili estis

¹⁰ De nomo de Dio/turke/.

sidintaj ĉe toniro, sur planko. La almozulo estingis olean lampon, kaj la briletoj de fajro en toniro malofte, sed hele lumigis iliajn vizaĝojn. Al via patro ŝajnis, ke la blindaj okuloj de almozulo pli bone vidas, ol okuloj de vidantoj.

- Tio okazis neatendite, - diris via patro. Ni rajdis unu post unu tra montvoĵeto. Subite kurdoj ekpafis.

- Ĉu vi sciis, ke ili estis kurdoj?

- Ne, mi ne sciis.

- Mi estis sendita tiujn kurdojn, - diris la almozulo.

- Mi scias, - diris via patro. - Sed mi pri tio sciis poste.

- Ĉu de ŝejka filo?

- Jes, - diris via patro.

- Ĉio plenumis tre rapide. Dume la zaptihoj povis preni siajn pafilojn, ili jam estis mortintaj. Jes, vere, ĉio plenumis tre rapide.

- Poste la kurdoj alkondukis min proksiman vilaĝon, kie vivis armeno – hufferforĝisto, restinta vivanta de zaptihoj, ĉar ili bezonis lin. La kurdoj mortigis preskaŭ ĉiujn vilaĝajn zaptihoj, restis vivantaj nur kelkaj de ili. Poste la kurdoj vokis armenan forĝiston kaj ili ordonis rompi miajn ĉenojn.

- Ĉu ĉenojn? - demandis la almozulo.

- Jes.

- Ĉu la vilaĝanoj vidis vin?

- Ne, - diris via patro, - estis meznokte.

- Sed la armeno, li ja vidis vin?

- Li ne denuncos min, - diris via patro.

- Poste mi iotempe kaŝiĝis en montoj. La kurdoj donis al mi uniformon de iu mortinta zaptiĥo, botojn kaj ĉapon. Ili nur ne donis dokumentojn de tiu ĉi mortinta zaptiĥo.

- Tio estas eraro.

- Jes, - diris via patro. - Tio eksplikiĝas jene: la ŝejka filo furioze rilatas aĵojn – aspektantaj, kiel dokumentoj kun segilo. La ŝejka filo ordonis bruligi ĉiujn dokumentojn.

- Ĉu ankaŭ dokumentojn de vilaĝa zaptiĥo?

- Jes.

-Domaĝe, - diris la blindulo.

- Jes, - diris via patro.

- Kaj la kurdoj kion faris kadavrojn de akompanintaj zaptiĥoj?

- Ili forprenis vestaĵojn kaj nudajn kadavrojn forĵetis en ravinon.

- Ĉu la ravino estis profunda?

- Ege profunda.

- Kaj ĉu kadavrojn de vilaĝaj zaptiĥoj same?

- Ne, la armeno devos enterigi ilin.

- Ĉu la hufferforĝisto?

- Jes, li.

- Kaj kiel vi vivos sen dokumentoj?

- Mi ne scias.

- Vi devas akiri novajn dokumentojn.

- Jes.

- En Bekiro vivas armeno, kiu scipovas prepari falsajn dokumentojn, - diris la almozulo. - Li nomiĝas Gevorg Hakobjan, li estas mastro de sia afero. Mi scias ankaŭ kie li

vivas: sur strato de feltistoj, tuj malantaŭ banejo. Sed vi verŝajne ne trovos lin, ĉar ĉiujn virojn oni estis pafmortigis kaj lasis nur kelkajn metiistojn kaj protektatojn de valio. Iaj kelkaj armenoj estis kaŝiĝitaj.

- Eble ankoraŭ li estas en urbo, - diris via patro. - Eble li same estas en listo de metiistoj aŭ de protektatoj.

- Li estis presisto, - diris la blindulo. - La presistoj ankaŭ taŭgas. Eble, vere, li ankoraŭ estas tie.

- Ĉu vi estis en Jedi Suo?

- Ne, - diris via patro. - Se la regantoj serĉos min, do, certe antaŭe en Jedi Suo. Mi supozas, ke ili min atendas tie.

- Neniu serĉas vin, - diris la blindulo.

- Ĉu vi scias pri tio?

- Jes, - diris la blindulo.

- Vi jam estas en listo de mortintoj, - diris la blindulo. - Ili plu ne serĉas vin.

- Ĉu pri tio estis presinta la ĵurnaloj?

- La ĵurnaloj silentas, pri tio, pri kio deziras silenti. Sed la zaptiĥoj de Hjukjumeto kaj malliberujo estas babilemaj.

- Ĉu vi interparolis kun ili?

- Jes, Vardan efendio.

- Kaj ĉu ili diris al vi pri tio?

- Ili diris al mi pri multaj aĵoj.

- Verdire, mi venis Bekiron eligi mian edzinon el virina malliberejo, - diris via patro. - Kvankam mi ne scias kiel tion fari? Sed mi pensas, ke Mehmed efendio cerbumos pri tio.

- Mi cerbumos pri tio, - diris la blindulo.

Dirante tion, li rekte rigardis vizaĝon de via patro, kvazaŭ

liaj estingitaj okuloj vere vidis streĉan vizaĝon de konversaciulo kaj briletojn en okuloj de armeno – simulanta turkan zaptihon.

- Mi scias, ke via edzino estis en virina malliberejo, - diris Mehmed efedio. - Pri tio estis dirintaj al mi la zaptihoj. Ili malliberigis vian edzinon, kiel garantiulinon.

- Jes, mian edzinon kaj nenaskitan mian idon – en ŝia sino.

- Tiel estas, - diris la blindulo.

- Jes, - diris via patro.

- Sed vi vane estas veninta en Bekiron, - diris la blindulo, - ĉar vi por ĉiuj estas mortinta. Eĉ la mjudiro kredas, ke ne povas ĉantaĝi mortinton rimede garantiulino, eĉ kiam ŝi estas propra edzino de mortinto, kaj havas en sia sino lian idon.

- T. e. kiel?

- Malliberejoj estas tre plenaj, kaj pro tio oni multojn ree sendis hejmen, ankaŭ vian edzinon. Ja ŝi pli ne taŭgis kiel garantiulino, ĉu vi komprenas? Pli praktike estis ekzili armenojn. Sekve, kiel ne resendi ilin en vilaĝojn kaj urbojn, kie oni povas ĉiun kune ekzili anstataŭ nutrita en ŝtataj malliberejoj.

- Do, ĉu mia edzino plu ne estas en malliberejo?

- Ili vian edzinon estis eligintaj el malliberejo, - diris blindulo. - Hieraŭ mi estis ĉe zaptihoj – antaŭ virina mallibereja pordego. Kaj ĉar mi estas blinda maljuna homo, ili interparolis kun mi. Ĉar komenciĝis la Ramadano la zaptihoj fariĝis konsciencemaj: ili por Alaha indulgo subite disdonis almozojn al almozuloj. Ĝuste tiam ili komencis

konversacii pri iaj sekretaj aĵoj. Kaj kiam mi demandis ilin pri via edzino, ili rakontis al mi diraĵon.

- Do, ĉu ŝi estas en Jedi Suo? - demandis via patro. Kaj la blindulo respondis:

- Jes, ŝi estis reveninta en Jedi Suon. Kaj se la vilaĝo ankoraŭ ne estas ekzilita, do ŝi ankaŭ estas tie.

- Vi ja scias tiun vilaĝon, - diris via patro. - Tio estas izolita, malproksima kaj kaŝita en montoj: eĉ foje hamideanoj de Abdul Hamid, komencinte masakron, forgesis pri Jedi Suo.

- Mi memoras, - diris la blindulo, - se tio estas volo de Alaho, ili denove forgesus la vilaĝon. Iam vi, kiel libera homo, revenus en Jedi Suon, trovus vian edzinon kaj vian filon, kiu tiam estos naskita.

- Tiu estas feliĉa deziro, - diris via patro, ĝemis kaj fermis siajn okulojn. Kelkminute lia vizaĝo esprimis feliĉon, kaj nur mi – la fabelisto, sciis, ke li ne kredas tion.

Dum tiu vespero ili interparolis ankaŭ pri aliaj aĵoj, pri restoracio “Hajastan” – jam antaŭ kelkaj monatoj fermata. Via patro singarde penis demandi maljunulon kaj scii, kiu ankoraŭ vivas kun sia familio en Bekiro. Sed la blindulo, kiu ŝajnis scias ĉion, plu ne havis aliajn informaĵojn. Li nur diris:

- Se kelkaj viaj familianoj ankoraŭ estas en urbo, tamen ili ne aperas. Eble ili iam ree aperos.

Ili estis dormintaj sur planko. Via patro vidis inkubojn kaj li ofte vekigis. Foje li rigardis, ke la blindulo estas genuita apud si.

- Ĉu vi vidas inkubajn sonĝojn? - demandis la blindulo.
- En la sonĝo mi vidis pendumitojn sub Beatecpordego.
- Ili estis tri, - diris la blindulo.
- Ĉu ili estis armenoj?
- Ne. Du estis turkoj kaj la tria – kurdo, ŝargportisto.
- Pro kia krimo?
- Ili estis kaŝintaj armenojn ĉe si.
- Ĉu tio estas malpermesita?
- Certe, estas malpermesita. Ĉu vi ne scias, ke la mjunadioj de nomo de registaro anoncadis, ke ĉiu muzulmano – kaŝinta armenon, oni kondutos tiel, kiel ili kondutas kun armenoj.

- Ne, mi ne sciis pri tio, - diris via patro.

- En sonĝo mi ankaŭ vidis mian fraton, - diris via patro. -
Antaŭ lasta mateno, kiam min oni eligis el malliberejo, mi sciis, ke oni estis pendinta lin.

- Ĉu ŝuiston – Tigran?

- Jes, lin.

Kaj la blindulo rakontis pri liaj ŝuoj al Vardan:

- Mi ne sciis, ke tiuj estaj ŝuoj de via frato. Pri tio mi sciis, kiam palpis tiujn.

- Ĉu vi vendis ŝuojn?

- Ne, - diris la blindulo. - Mi disŝiris kalkanumojn, sed tie oroj ne estis. Kaj la kaproledo de ŝuoj estas eluzita kaj ŝuoj plu ne estis la plej bonaj, sed iam ili estis la plej belaj ŝuoj en Bekiro.

- Jes, - diris via patro.

- Mi kaŝis tiujn ŝuojn por vi, - diris la blindulo. -

Frumatene vi povos surmeti tiujn.

- Konservu tiujn por vi, - diris via patro.

Via patro longe ne povis redormi. En mallumo li ree kaj ree vidis vizaĝojn de tri pendumitoj, kiuj ne estis armenoj: du turkoj kaj unu kurdo. Kaj en fasta nokta silento li demandis mem: “Ĉu ili estis solaj kaj ĉu ne estis aliaj turkoj, kurdoj – helpintaj armenoj?”. Kun tiu ĉi demando li dormis.

Frumatene lin vekis la tamburoj de ĥoĝaoj – alvokantaj kredulojn matenmanĝi. Unu el ĥoĝaoj per sia bastono kvarfoje frapis pordon de kabano de blindulo. Kaj via patro – duondormita kaj iomete konfuzita, aŭdis benajn vortojn de ĥoĝao – respondulo por siaj ŝafidoj de tiu ĉi kvartalo. Ekstere la ĥoĝao, starinta antaŭ pordo, multfoje kriis: “Ho Mehmed, ho Mehmed, tio estis feliĉa nokto, ellitiĝu Mehmed! La tempo de taga fasto proksimiĝas! Alaho estas la plej granda kaj Mohameto estas lia profeto. Glorion al Li – al Kreinto de mondo”.

10.

Via patro frumatene neniam estis manĝinta tian riĉan matenmanĝon, ĉar dum Ramadano la muzulmanoj abunde matenmanĝas, por ke dum fasto ĝis vespere iliaj stomakoj estu plenaj. Tiel ili manĝas multe kaj rapide, ĉar tuj la suno leviĝas kaj la pafeligo de fortikaĵo ree anoncas komencon de fasto, la manĝado devos esti ĉesita, kaj eblas nur gargari buŝon.

Antaŭ foriro via patro rakontis por blindulo pri suferiginta

demando – donita meznokte si mem. Tiam en mallumo li vidis vizaĝojn de tri pendumitoj, tri mortintajn vizaĝojn – nehavintajn armenajn okulojn.

- Multaj muzulmanoj helpas armenojn, - diris la blindulo,
- sed oni ilin ne vidas.

- Aŭ oni vidas ilin sur pendumiloj.

- Jes, oni vidas ilin tie, - diris la blindulo.

- Ĉu ankoraŭ estas multoj?

- Oni arestis multojn kaj multoj pendumis, kaj ankoraŭ pendumos.

- Ĉu inter ili estas konataj muzulmanoj?

- Kelkaj estas. Vi imagu eĉ la superskribisto de la mjudiro de Bekiro.

- Ĉu la superskribisto?

- Jes.

- Ĉu li kaŝis armenojn ĉe si?

- Ne. Nur por kelkaj armenoj preparis falsajn dokumentojn.

- Tio estas danĝera.

- Ĝuste tiel, Vardan efendio.

- Mi domaĝas, ke oni arestis lin, - diris via patro, - Nun mi bezonas dokumentojn.

Voje via patro pensis pri superskribisto. Li memoris, kiel la superskribisto tiam, en laborĉambro de mjudiro, iam post iam strange rigardis vian patron kaj pensis: “Kiam oni lin pendumus, min plu ne estus en urbo”.

Via patro singarde kolektis informaĵojn pri la armeno – scipovinta prepari falsajn dokumentojn. Sed lin estis

forportinta delonge. En bazaroj li ricevis aliajn adresojn: adresojn de perantoj kaj falsofarantoj, sed kiam via patro frapis iliajn pordojn, neniu el ili estis hejme. Tiel li decidis iri laŭ sola restanta vojo. Li iris amerikan ataŝeon.

La amerika ataŝeo estis malgrandkorpa aĝula homo. Laŭ liaj ĝestoj kaj maniero de parolado eĉ mia ombro ekkonis, ke li ne estas el tiaj amerikanoj, kiuj estas pentritaj en turkaj bildulaj libroj. Ankaŭ la Lasta Penso, kiu inter ni, preter sekretarino, glietis en akceptejon, poste – oficejon de ataŝeo, rimarkis, ke li estas ne kutima amerikano. Sed ĉu ne estas stranga amerikano ankaŭ Vardan Ĥatisjan?

- Tiu ĉi amerika ataŝeo estas greko, - mallaŭte diris mi al la Lasta Penso, la saman diris mi ankaŭ al mia ombro. Li estas greko tuj el Smirno, unu el emigrintoj. Li parolas multlingve, parolas ankaŭ turke, kaj scias, kiel amikiĝi kun turkaj regantoj.

- Kiel estas la afero de Vardan Ĥatisjan?
- Tio ne estas en arkivaj ŝrankoj, ĝi estas sur tablo.
- Ĉu la ataŝeo estas informita?
- Ĉerte, li estas informita. Jam kelkmonate li vane klopodas ion fari por tiu afero, sed sen rezulto.
- Kaj ĉu la amerika presaro?
- La afero de Ĥatisjano ricevis grandan proklamon. Eĉ dum kelkaj semajnoj oni informis pri afero de Ĥatisjan, sed la militaj okazintaĵoj ĉion forgesigis.
- Ĉu ankaŭ pri afero de Ĥatisjan?
- Jes. La ĉiutagaj sciigoj havas mallongan vivon.
- Sed ĉu la konsulo konis mian patron? - demandis la

Lasta Penso.

- Li du fojon estis renkontinta kun via patro en restoracio "Hajastan", kie li estis ĉiama frekvento kaj li ĉiam havis menditan tablon. Li eĉ estis amikita kun mastro de restoracio.

- Ĉu kun frato de mia patro?

- Jes, kun Hajkaz.

La konsulo tute ne miris, vidante antaŭ sia skribtablo Vardan, – en turka zaptiha uniformo, kvankam jam li konsideris lin mortinta.

- Ĉu iu konis vin, kiam vi eniris ĉi tien? - demandis la konsulo.

- Ne, - diris via patro.

- Vi estas forgesita, - diris la konsulo. - Vi eĉ plu ne ekzistas.

- Jes, - kapjesis via patro.

- La tutmonda presaro ankaŭ forgesis pri vi. Vi jam fariĝis negravulo, kiel ĉiuj neuzeblaj aĵoj.

- Tiel estas bone, - diris via patro, - oni plu ne serĉos min.

- Ni povas kontrabande eligi vin el lando, - diris la konsulo, - sed tio estos malfacila.

- Ankaŭ mian familion... antaŭe mian ebzinon kaj infanon.

- Tiujn - ne, - diris la konsulo.

- Mia filo ankoraŭ ne estas naskita, - diris via patro.

- Mi komprenas, - diris la konsulo.

- Mi ne povas lasi mian edzinon kaj infanon en malfeliĉa stato, - diris via patro, - mi devos ion fari por ili, kvankam ankoraŭ mi ne scias fari.

- Jes, - diris la konsulo, - mi povas akiri novan pasporton.
- Sed pro tio postulos kelkajn semajnojn, ĉar nun mi ne havas pasportajn formularojn. Mi devos unue mendi, kiu postulas tempon. Ĉu vi povas tiel longe atendi?

- Ne, - diris via patro.
- Pro tio ankaŭ bezonas fotojaŝon.
- Ĉu verajn?
- Certe, verajn.

- Ne eblas, - diris via patro. - Ni ne povas atendi. Mi devas esti ĉe mia edzino, ĉe mia filo, kiun ni nomos Tovma.

- Ĉu Tovma?
- Jes, Tovma.
- Kie ili estas?
- Ili estis en malliberejo.
- Mi scias, - diris la konsulo.
- Nun ili denove estas hejme.
- Tie, en vilaĝo. Sed ĝi kiel nomigas?
- Jedi Suo.

- Jedi Suo, ĉu la vilaĝo havas sep akvojn? - ekŝercis la konsulo.

- Aŭ Sep fontojn, - diris via patro.

La konsulo provis rideti.

- Se la vilaĝanoj ankoraŭ ne estas ekzilita, - diris la konsulo, - vi havos ŝancon vidi ambaŭ vivantojn – vian edzinon kaj vian filon.

- Lin ni volas nomi Tovma, - diris via patro.
- Jes, mi scias, - diris la konsulo.

- La vilaĝo ne situas tuj ĉe granda vojo, - diris via patro, -

kaj fojo ĝi jam estis kontrolita, kiam estis masakro dum tempoj de Abdul Hamid.

- Kaj ĉu vi opinias, ke ĝi ankaŭ foje estos kontrolota?
- Mi ne scias kion opinii, - diris via patro.

- Bone, - diris la konsulo, - vi volas reveni vilaĝon. Aŭskultu bone! Vi certe aŭdis kio okazis en urbo Vano?

- Ĉu ribelo?

- Tio ne estis ribelo, - diris la konsulo. - Ĉi tie la armenoj rifuzis volonte pafmortiĝi kaj ili ne konsentis ekziliĝi. Ili armiĝis kaj defendinĝis kaj eĉ sukcesis dum longa tempo defendi sian kvartalon. Certe ili estis ĉirkaŭita. Sed poste en ĉijara majo alvenis la rusoj kaj kun rusoj – armenaj volonte formitaj taĉmentoj. Ili venis eĉ frue rusoj.

- Sekve ĉu la urbo liberiĝis?

- Jes, - diris la konsulo. - Tio okazis en dua duono de majo.

Sed poste atakis turkoj kaj aneksis Vanon. Granda parto de armenoj forkuris kun rusoj, sed la restinta malgranda parto buĉiĝis.

- Vano! - ĝemis via patro.

- Vano, - ripetis la konsulo.

- Kaj nun al kiu apartenas Vano?

- La rusoj tuj reforprenis Vanon. Sed mi volus diri al vi alion. La rusoj nun estas pretaj ofensivi. Atendiĝas granda traŝiro. Laŭ miaj kalkuloj aŭtune rusoj okupos tiuj regionoj.

- Signifas, la rusoj atingos Bekiron.

- Jes, - diris la konsulo.

- Mi proponas vin sekvonton, - diris la konsulo. - Vi iru kaj

venigu vian edzinon kaj filon dume la zaptiĥoj ne ĉiujn vilaĝajn virojn mortigis kaj dume ne forpelis el vilaĝo virinojn, infanojn, maljunulojn. Sed vi rapidu. Venigu vian edzinon en nia konsulejon. Kaj vi mem povas resti ĉi tie. Neniu povas vin kapti aŭ forpeli el ĉi tie. Nenu kuraĝos eligi vin, ĉar tiu ĉi konsulejo estas diplomatia loko kaj estas defendita. Ĝi estas teritorio de Usono.

- Sed kion ni devos fari ĉi tie?
- Vi atendos ĝis alvenos la rusoj.
- Ĉu ĝis alvenos la rusoj?
- Jes.
- Sed poste?

- Poste ni venigos vin kaj vian edzinon en nigramaran havenon, verŝajne en Trebizondon – jam estontan sen turkoj, aŭ vin ni alkondukos pli malproksime, ĝis rusaj havenoj kaj tie ni sidigos vin en amerikan ŝipon.

- Jes, - diris via patro.

Kaj la konsulo kapjeis kaj diris:

- Jes, sed vi devas rapidi. Mi donos al vi bonan ĉevalon, kelkajn kovrilojn kaj manĝaĵon. Vi rapidu!

- Bone, - respondis via patro.

Tamen ili ankoraŭ iomete restis sidintaj, ĉar la konsulo volis eliri kaj ordoni pri ĉevalo, kovriloj, manĝaĵoj, nur kiam ekmallumiĝos. Li ne volis, ke via patro eliru straton antaŭ mallumiĝo.

- Morgentaŭ faris ĉion eblan eksciti konsciencon de Enver paŝao, - diris la konsulo. - Ĉi tie Morgentaŭ estas la

voĉo de Ameriko.

- Mi estas aŭdinta pri Morgentaŭ, - diris via patro.

- Kun Enver paŝao interparolis ankaŭ germana pastoro Lepsius – defendi armenojn.

- Ĉu Lepsius?

- Jes, - diris la konsulo. - Tiu ĉi Lepsius estas vera Teŭtona sanktulo.

Pri tio estis dirinta al mi germana konsulo en Bekiro. Li estas la justa voĉo de germanoj.

- Sed kion pri voĉo de kajzero?

- Tiu ne estas vera voĉo de germana nacio.

- Nun nur la germanoj povas helpi vin – armenojn, - diris la konsulo. Ili estas la plej gravaj aliancanoj de turkoj. Nur unu serioza minaco de kajzero koncerne adreso de Komitato sufiĉas ĉesigi la masakron. Sed la kajzero silentas. Silentas same la germana presaro.

- T.e. ĉu la germanoj nenion iniciatas?

- T.e. ĝuste, sed ne tute, - diris la konsulo. - Ekzistas aliaj homoj similaj al Lepsius. La ambasadoroj kaj konsuloj daŭre sendadas informaĵojn al germana ministreco, ekzistas peticioj, deklaraĵoj al Komitato de Progreso kaj Unueco, kaj mallaŭtaj riproĉoj de nomo de kajzero aŭ armeestro. Ili ridadas – ricevante tiujn, ĉar en Konstantinopolo bone scias, ke la germanoj ne faros gravajn aranĝaĵojn – decidinte ne miksiĝi en turkaj internaj aferoj.

- Sekve ĉu nenia efektiva helpo de germana kajzero?

- Nenia helpo.

- Tiuj germanoj estas kultura, sed stranga popolo, - diris

la konsulo. - Iam ŝajnas, ke la konscienco de iliaj intelektuloj kaj verkistoj kaŝiĝas malantaŭ monokloj de generaloj, por ke finfine malaperi – estinte subpremitaj sub soldataj botoj.

- T. e. nenia helpo de ili, - diris via patro.
- Nenia helpo, - diris la konsulo.

- La amerika registaro, - diris la konsulo, - komprenigis turkojn, ke daŭrigo de masakro ne restos sen sekvoj, temas pri neŭtraleco de nia lando. La turkoj scias, ke pri masakro la amerikaj ĵurnaloj skribas per grandaj literoj. Eĉ en Eŭropo la militaj informaĵoj presiĝas due. Turkoj scias ankaŭ, ke la prezidanto Vilson estas ekscitita, kaj niaj armeestroj instigas pri konkretaj aranĝaĵoj – haltigi turkojn. Sed kedu min, ĉio havas nenan utilon. La neniigo de armenoj estas la unua celo de Komitato. Jam ŝajnas, ke masakro por ili estas pli grava, ol okazintaĵoj en frontoj kaj la neŭtraleco de Ameriko.

- Tio estas neperceptebla, - diris via patro.
- Neniu povas tiun kompreni, - diris la konsulo.

Kaj la konsulo aldonis:

- La informaĵoj pri masakro estas metitaj sur mia skribtablo. En lasta informaĵo, - diris la konsulo, - temas pri 25000 da mortigitaj armenoj en ravino de Kemaho ĉe Eŭfrato. 25000! Kiaj nombroj! Sed ni ne scias ĉu vere? Laŭdire la masakron plenumis la kurdoj, tamen la zaptiĥoj kaj ĉeteoj sendube ankaŭ estis partoprenintaj, kaj ankaŭ la kavalerio de turka regula armeo, kiel estas informita. Oni la malgrandajn infanojn forĵetis en Eŭfraton, kaj la patrinoj sin ĵetis post la infanoj. Multaj virinoj mem, propramane ĵetis infanojn en riveron, ĉar timis, ke la kurdoj ilin senkapigus.

Nun en Eŭfrato naĝas tiom da multaj kadavroj, ke la turka kavalerio sur vojo al suda fronto ne povas rajdi tra la rivero, ĉar la ĉevaloj timas, kaj turnigas soldatojn de si. En mia informaĵo estas dirita, ke la Eŭfrato kaj ĝia enflanto estas tiaj ruĝaj, kiaj estas sangaj striegoj en buĉejoj de grandaj urboj. Ĉu vi iam estis vidinta tiajn buĉejojn?

- Ne, mi ne estas vidinta tiajn grandajn, - diris via patro. - Mi en vilaĝo buĉis animalojn po unu. malantaŭa parto de domo.

- Nu, ĉio tiel okazis, diris mi – Meddah. La konsulo zorgis pri rapidkurema ĉevalo, manĝaĵo, kovriloj, ankaŭ pri felsakoj – plenitaj de akvo kaj vino. Kaj tiel okazis, ke post mallumiĝo via patro – bone armita, eliris el urbo. Vere, li havis ĉion necesan por zaptiĥo, nur mankis paŝilo kaj leĝaj dokumentoj.

Via patro sciis, ke oni tuj dubos rajdanton al montoj. Same, ke li estis sola, estis dubinda, ĉar la zaptiĥoj rare rajdas sole, eĉ la zaptiĥo de Jedi Suo ne kuraĝis eliri el vilaĝo, se kun li ne estas zaptiĥoj de najbaraj vilaĝoj. Sed via patro estis singardema. La konsulo donis al li ĉifonojn, ankaŭ grandan farunan sakon kaj grandan tranĉilon – disŝiri la sakon. Via patro disŝiris malnovan sakon kaj per pecetoj li pakis hufferojn de ĉevalo. Li rajdis dum tuta nokto ĝis sunleviĝo, tage dormis – kaŝite en ravinoj. Via patro kondukis kiel la armenaj fidajioj – partizanoj, t.e. legendaj batalantoj por libereco de Armenio, kiujn la kurdoj timis pli, ol daŝnakanojn. En komenco de jarcento oni multe parolis pri la fidajioj – alvenantaj tra la persa limo, tra la sekretaj vojoj, por ke venĝi je kurdaj rabistoj kaj aperadis, kiam la kurdoj ree

estis atakintaj ian armenan vilaĝon – mortiginte virojn kaj forŝtelinte virinojn. La fidajtoj same rajdis nur nokte kaj dormis tage en siaj kaŝejoj. Pro tio neniu povos trovi ilin.

Via patro rajdis ne tiel rapide, kiel li antaŭe estis intencinta. En kurda landparto, Inter montaj altaĵoj kaj nudaj rokoj – kaŭzintaj kapturigojn, serpentmaniere kurbiĝis montaj vojetoj. Sur randoj de noktaj nigraj abruptoj la ĉavelo ofte stumblis kaj timinte spiregis. Via patro firme tenis bridon per siaj manoj kaj per trankvila, tenera voĉo paroladis kun animalo. Li daŭris vojon du tagojn kaj du noktojn. La konsulo donis cigaredojn al via patro, sed via patro ne kuraĝis fumi, ĉar la kurdoj povus rimarki. Tage li dormis maltrankvile, plejparte dormetis kaj dum longaj noktoj li rajdis ĝis sunleviĝo.

En fino de dua nokto li estis proksime de vilago. Kaj ĉar li timis, ke povis esti okazinta malfeliĉo kun sia familio, li hastante stimulis la ĉevalon, espere, ke li atingos vilaĝon ĝis sunleviĝo. Sed la tago estis pli rapidema, ol stumblanta lia ĉevalo sur kurbformaj vojetoj. Jam estis duonlumo. Kun naturo vekiĝis birdoj. Kun una ĉirpo la ĉarma duondormanta suno liberiĝinte montris sian fajroruĝan kapon sur horizonto. Via patro ne maltrankviliĝis pro tio. Kaj kiam la suno leviĝinte disvastigis lumon sur Sep Fontoj, li jam rajdis al nova tago. Li forgesis pri singardo, ĉar ŝajnis, ke vokas la graveda edzino. Ŝajnis, ke vokas ankaŭ la nenaskita filo. Kaj ĉar la suna forta lumo malhelpis vidi, li nek vidis fumon malantaŭ vilaĝaj kabanoj, nek multajn zaptiĥojn kaj ĉeteojn– atenditajn ĉe enirejo de vilaĝo.

La ĉeteoj sciis, ke la zaptiĥo neniam rajdas tra montoj sen pafilo. Tamen, tiu, sidinte sur sia laca ŝvitoza ĉevalo, rajdis rekte al ili – ne havante pafilon. La zaptiĥoj – starintaj ĉe vilaĝa enirejo, vidis lin. La ĉeteoj ekkonis vian patron – unue laŭ liaj okuloj, ĉar la armenaj okuloj parolas pri tutaj alioj, ol okuloj de turkoj. La ĉeteoj estas profesionaloj por tio. Ili tuj konis sian pereon.

Ĉio plenumis dum kelkaj minutoj sub ĉielo, kiu ĉimatene estis sennuba. La ĉeteoj kaptis vian patron, malleviĝis lian pantalonon kaj ekridis, vidante, ke li ne estas cirkumcidita. Unu el ĉeteoj tenis lian membron, alia eligis tranĉilon – tranĉi ĝin. Sed la afero ne plenumis, ĉar unu el zaptiĥoj estis levinta pretan pafilon kaj pafis al kapo de via patro. Aliaj ankaŭ pafis kaj tranĉilulaj ĉeteoj atakis vian patron.

11.

Kurdino Bjulbjul, jam tre maljuna, sed ankoraŭ vigla, antaŭ tagmezo, sidinte sur sia sennoma azeno, eniris vilaĝon. Kion ŝi vidis, estis tiom terura, ke ŝi naŭzis bonegan matenmanĝon: armenan odoran teon – kun spicoj, ankaŭ armenan lavaŝ-panon – ŝirmitan morusan doŝabon. Ĉio elverŝiĝis el ŝia maljuna stomako sur kolhararo de sennoma azeno. Pro teruro ŝi ankaŭ urinis sur selo. Iomtempe ŝi interpecoj de senkapitaj kadavroj serĉis amikojn kaj konatulojn. Poste refuzis tiun intencon kaj movis al kabano sur rando de vilaĝo, kie vivis la sola turka familio – verŝajne ne mortigita (kiel ŝi pensis). Estis ĝuste tiel. Sed la turkoj estis sidintaj malantaŭ fermitaj pordoj kaj fenestroj, kaj malgraŭ ŝi longe

frapis pordon, neniu malfermis ĝin. Poste ŝi trovis vilaĝan policiston – Jukzel efendion, kiu oficis ĉi tie en Jedi Suo, de 1902j., kiam variolkava Ŝekir efendio emiritiĝis. La zaptiĥo Jukzel efendio estis kaŝita dum pafado. Nun li staris apud Bjulbjul.

- Hej, Jukzel efendio, - diris Bjulbjul. - Kiam tiu plenumiĝis?

- Hieraŭ, post tagmeze, - diris la zaptiĥo.

- Sed kial oni bruligis armenan preĝejon?

- Ĉar virinojn kaj infanojn la turkoj fermis en preĝejo, - diris la zaptiĥo.

- Ĉu vi ĉeestis?

- Mi ĉeestis, Bjulbjul, sed ne partoprenis. Kion mi povis fari? Ili min mortigus, se mi dirus eĉ unu vorton. Poste mi kaŝiĝis.

- Kaj kiuj faris ĉion?

- Fremdaj zaptiĥoj kaj ĉeteoj faris.

Jukzel efendio montris bruliĝitan preĝejon, poste la montan vojeton ĉe enirejo de vilaĝo.

- Tie, supre ankoraŭ unu estas falita. Li estas Vardan Ĥatisjan – reveninta ĉimatene. Ili mortigis lin.

- Ĉu Vardan Ĥatisjan?

- Jes.

- Kaj ĉu li estas falita tie, supre?

- Jes. Tie, supre.

Vardan Ĥatisjan estis nuda. El liaj multaj vundoj fluis sango. Sed li ne estis morta. Kaj kiam Bjulbjul vidis, ke li ne estas morta, ŝi tuj rapidis.

- Ĉu vi scias, ŝafideto mia, - diras mi, la fabelisto – Meddah, al la Lasta Penso, - neniŭ scias, kiel la amoza Dio iam prokrastas ies morthoron.

- Kaj ĉu vi ne scias kial, Meddah?

- Ne.

- Ĉu Dio ne povas likvidi morton por ĉiam?

- Ne, tion Li ne povas. La morto estas pli ruza ol Dio. Kaj ĝi diversmaniere denove kaj denove revenas.

- Sekve, ĉu ĝi nur iam malfruiĝas?

- Jes.

- Kaj kial amoza Dio ne volis, ke mia patro mortu tie, supre – sur monta vojeto?

- Mi ne scias, ŝafideto mia. Verŝajne li havas iajn intencojn koncerne via patro.

- Jes, povas esti.

- Jes, - diris mi, la fabelisto. - Tio estis tuj tiel, ĉar ne povis esti alimaniere. Certe, amoza Dio havas aliajn intencojn koncerne li. Sed ni ne devos rompi niajn kapojn kompreni tion. Kaj ankaŭ ne taŭgas demandi: “Ĉu tio estas miraklo aŭ nur eventualeco?”. Fakte via patro estis viva, malgraŭ ĉio. Ankaŭ fakte Bjulbjul subite rapidis kaj rapidis ankaŭ la zaptiĥo, ĉar necesis rapide helpi.

La fremdaj zaptiĥoj kaj ĉeteoj jam estis forirantaj. Kiam Bjulbjul kun vundulo kaj zaptiĥo Jukzel atingis domon de turkoj, la terurigitaj mastroj tuj malfermis pordon, prenis siajn fosilojn – enterigi mortintojn. La maljuna Sulejman, iam nomita Taŝak pro granda saketo – ŝancelanta inter piedoj, estis starinta antaŭ domo kaj ordonis. Sed kiam la maljunulo vidis sennoman azenon, maljunulinon Bjulbjul kun vundulo,

ankaŭ zaptihon – Jukzel efendion – firme tenintan nmoveblan korpon sur dorso de azeno, li forgesis kadavrojn – falitajn en vilaĝaj stratoj, prenis sian bastonon kaj lamiris direkton ili.

- Li estas Vardan Ĥatisjan, - diris Bjulbjul.
- Li vere estas Vardan Ĥatisjan, - diris Jukzel efendio.

Ili vian patron alportis en loĝejon de turka familio.

- Li mortos, - diris edzino de Taŝak.
- Li devos vivi, - diris Bjulbjul.
- Li necesas helpon de kuracisto.
- Antaŭe, li necesas fortojn, - diris Bjulbjul. - Kaj necesas helpon de tiu stranga Sanktulo, kiun li kredas, kiu mortis sur kruco, ĉar Li tre multe sciis kaj ne volis silenti. Pri Li pastro Gabriel Hamadjan fojon diris: “Li estas korpula filo de Dio”.

- Kion ankaŭ li necesas, - demandis edzino de Taŝak.

- Li necesas ankaŭ bonan digesteblecon, - diris Bjulbjul,
- kelkajn fortajn singultojn kaj laŭtajn du aŭ tri gazajn eksplodojn, por ke ni sciu, lia animo ĉu estas ne forfluginta? Pri restaj necesajoj mi zorgos.

- Kion vi volas fari, Bjulbjul?

- Ĉion necesan, - diris Bjulbjul, - ĉar li ne estas unua homo, el kies ostoj kaj viando mi estis eliginta kuglojn. Kaj mi scipovas kuraci tranĉilaj vundojn. Mi nur alportu miajn kuracplantojn el mia kabano.

- Vi vidas, kiel mallume estas en kabano de Sulejman, - diras mi – la fabelisto, al la Lasta Penso, ĉar lia domo ne havas fenestrojn. Ĉi tie estas bruo, interpaŝado, kvankam ĉe maljuna geedza paro nur vivas edzinoj kaj unufanoj de plej

junaj filoj. La grandaĝuloj delonge estis foririntaj el vilaĝo. Kelkaj viroj estas en armeo, ankaŭ Gjog-gjog – la infaneca amiko de via patro: tiel nomita laŭ lia ekkrio – doninte grenojn al gekokoj.

Ili vian patron denove nutris, kiel infanon. Kiam li malfermis siajn okulojn, la kadavroj – falitaj en vilaĝaj stratoj, jam delonge estis enterigitaj. La fumo estis dispersita, kaj la bruletintaj fajretoj – estingitaj.

- Li malfermis okulojn, - diris zaptiĥo Jukzel efendio, kiu dum tago kelkfoje vizitis Taŝak – vidi vian patron.

- Hej, Bjulbjul, li vere estas malfermintaj siajn okulojn, je la nomo de Alaho.

Sed, ĉar Bjulbjul dormetis apud lito de via patro, ne respondis.

- La aero nun estas pura, efendio, - diris la zaptiĥo al via patro, - ĉar tiuj fremdaj zaptiĥoj kaj ĉeteoj estis malpuraj, kaj odoraĉaj, kiel estas manĝaĉantoj porkaĵon.

Kaj la zaptiĥo kraĉis, hikis kaj furzis, kvazaŭ si mem estis manĝinta ion malpuran.

- Ili bruligis preĝejon, ĉar pensis, ke virinoj kaj infanoj pli bone bruliĝos en preĝejo, ol sur fajrego, - diris la zaptiĥo al via patro. - Ili pensis, ke se ĉielo pluvus, brulado estus malbone.

- Pri kiuj virinoj kaj infanoj temas? - demandis via patro.

- Nu, pri virinoj kaj infanoj de nia vilaĝo, - diris la zaptiĥo Jukzel efendio. - Ili estis fermintaj – virinoj kaj infanoj en preĝejo.

- En kiu preĝejo?

- En via preĝejo, - diris zaptiĥo, - aŭ vi plu ne scias, kio estas preĝejo?

La zaptiho mirinte ŝancelis sian kapon:

- Ne ĉiuj virinoj kaj infanoj estis brulitaj: - diris li poste, - ĉar oni bruligis fajron nokte. Kelkaj virinoj kaj infanoj povis elsalti tra fenesto, kvankam la preĝejo ne havas fenestrojn.

- Kiel tio okazis, efendio?

- Nu, la preĝejo havas aertruojn sur muroj – mallarĝaj, sed iomete longformaj. Mi supozas, ke infanoj kaj kelkaj maldikaj virinoj grimpis kaj elrampis tra tiuj aertruoj.

- Kaj ĉu ili estas forkurintaj?

- Jes. La noktoj estas mallumaj, kaj montoj ankaŭ, kvankam la fajrego estis helega. Ili tuj forkuris al montoj.

Via patro demandis nek pri sia familio, nek pri edzino, nek pri nenaskita filo, ĉar ne memoris li ilin. La zaptiho iomete daŭrigis paroli kun via patro. Li parolis pri Alahaj mirakloj: kiel la gravedulino kun granda ventro povas elrampi tra tiu mallarĝa aertru. Jes, tiu estas la volo de Alaho. Bjulbjul ankaŭ rakontis similaj aĵoj. Poste via patro dormis kaj plu nenion aŭskultis kaj nenion diris.

- Li perdis memoron, - diris Bjulbjul. - Li plu nenion scias. Li jam ne havas memoraĵojn.

- Sed li ja estas poeto, - diris Jukzel efendio. Ja la pastro Gabriel Hamadjan iam diris, ke la poetoj estas nia memoro.

- Jes, tiel estis dirinta la pastro.

- Do, li ne povis perdi sian memoron.

- Mi tion ne scias, - diris Bjulbjul.

- Ili tre forte frapis lian kapon kaj la kugloj – eligitaj de vi el lia korpo, ne estis preparitaj el bova sterko.

- Jes, tiuj ne estis preparitaj el bova sterko, - diris Bjulbjul.

Iam post iam el sep vilaĝoj venis unu el zaptiĥoj, kiuj ne partoprenis masakron, ĉar dum multaj jaroj oficis servis en vilaĝoj kun armena loĝantaro kaj rilatis amike al armenoj. Kaj ĉar en sep vilaĝoj plu ne ekzistis armenoj, ili enuis. Unu el ili estis dirinta al Bjulbjul:

- Baldaŭ alvenos muĥaĝiroj, – okupi domojn de armenoj. Ili verŝajne estas emigruloj el orientaj ĉelimaj regionoj – fuĝintaj kaj unuigintaj kun iaj taĉmentoj. En pasinteco estis muĥaĝiroj el Makedonio kaj el aliaj landoj, pri kiuj mi nenion scias. La registaro ilin protektas, ĉar ili estas mahometanoj, kiel ni. Poste la zaptiĥo aldonis:

- Mia vilaĝo estas mortinta, kiel iam tie vivintaj armenoj. Ĝinoj interparolas kun mi eĉ tage. Sed la ĝinoj estas nevideblaj. Mi estas la sola homo en mia vilaĝo kaj enuas.

- Jes, - diris Bjulbjul, - tion mi komprenas.

- Se muĥaĝiroj alvenos, ne estos tiel enue.

- Jes, - diris Bjulbjul.

- Malbone estas, kiam homo estas sola, - diris zaptiĥo.

- Malbone estas, - diris Bjulbjul kaj demandis, - kion vi faras dum tuta tago en mortinta vilaĝo?

- Mi atendas, kiam finiĝos la enuo, - respondis la zaptiĥo.

- Ĉu vi pensas, ke la muĥaĝiroj scipovas ludi kartludojn kaj tavlaon, kiel la armenoj en kafeoj, kun kiuj vi ofte estis ludinta?

- Mi ne scias, - diris la zaptiĥo. - Mi ne scias same, ĉu ili donos mian kutiman baĥŝiŝon – ĉiam donitaj de armenoj al mi?

- Tion mi ankaŭ ne scias, - diris Bjulbjul.

- Ni bone vivis kun armenoj, - diris la zaptiĥo. - Tiuj homoj sciis, kio estas la baĥŝiŝo kaj sciis, kiel vivi.

Post definitiva tempo ree venis alia zaptiĥo el sep vilaĝoj – simpatinta armenojn kaj diris al Bjulbjul.

- Oni diras, ke la myĥaĝiroj ĉisemajne alvenos. Ili alvenos kun siaj enhejmaĝoj – kun edzinoj kaj mamsuĉantaj infanetoj, kun gepatroj, kun gefiloj, gebofiloj kaj kiu scias ankoraŭ nun kiuj? Kun ili alvenos fremdaj zaptiĥoj kaj donos al ili landon kaj domojn de armenoj. Se la fremdaj zaptiĥoj vidus vundulon kaj scius, ke li estas armeno, ili mortigus lin. Kaj ili mortigus vin kaj turkajn flegantojn – kaŝintajn armenon, ĉar tio estas malpermesita.

- Kion ni faru? - demandis Bjulbjul.

- Vi devos forporti lin, - diris la zaptiĥo.

- Plej bone mi lin forportu en mian kabanon, - diris Bjulbjul, kiu delonge konis zaptiĥon. - Kion vi pensas? Ĉu tiom malproksime, sur montoj tiuj mallaboremaj hundoj leviĝus?

- Tiom malproksime certe ili ne irus, - diris la zaptiĥo.

Helpe maljuna Taŝak, Bjulbjul ligis vian patron sur dorson de sennoma azeno. Edzino de Taŝak donis al Bjulbjul sakon da manĝaĝoj kaj kelkajn kovrilojn. Ĝis kabano de Bjulbjul la vojo estis mallarĝa, ŝtonoza kaj danĝera, ĉar pasis trans la Diabla ravino. Falinto tie plu ne revenus. Sed tio nek maltrankvilis Bjulbjul, nek sennoman azenon – bone sciantan la vojon. Tiu ĉi azeno ĝuste aspektis, kiel antaŭestinta azeno de Bjulbjul. Ĝin ŝi havis tiam, kiam naskiĝis via patro.

Kaj ĝi estis tiom scipova, kiom la antaŭestinta: tio pravas, ke saĝa azeno ne estas ekskluziva.

Kiam ili ekiris, la suna lumo saltadis sur ravinoj, dancis antaŭ ili, kiel la vaganta fajro – kun tuta lukso de ĉielarkaj koloroj . Sur rokoj de Diabla ravino pecetriĝis la nuboj kaj kurante kun vento fajfis la ĝinoj. La azeno iris malrapide, kaj Bjulbjul paŝis malantaŭ ĝi. Ŝi paŝis kliniĝinte ŝancelante, kiel ĉiam, per siaj kurbaj piedoj kaj, kun longa bastono en maljuna mano. Kiam ŝi stumblis, ŝi firme tenis voston de azeno. Dum tuta vojo Bjulbjul mallaŭte malbenis kaj, ĉar Kostantinapola Komitato ne povis aŭdi ŝin, Bjulbjul sendis ĉiujn – Enver, Taleat, Ĝemal, al diablo – tutan triumviraton, ankaŭ novan sultanon, kiu estis pupo en manoj de Komitato. Ŝi malbenis fremdajn zaptihojn, ĉeteajn taĉmentojn, ankaŭ kurdajn rabistojn, kiuj eble en partoprenis masakron en Jedi Suo, sed buĉis en najbaraj vilaĝoj. Ŝi malbenis germanan kajzeron kaj liajn helpantojn. Ŝi malbenis tamburistojn kaj ĉiujn heroldojn – anoncatajn tion, kio ne povis esti de nomo de Alaho. Apud la kaverno jam delonge nomita Kurda kaverno, kiu estis proksime kabano, la azeno laŭ kutimto haltis. Ĉi tie la monta vojeto pli abrupte kurbiĝadis supren al nuboj kaj al ĉielo.

- Ie estas starinta la monto Ararato, - diris Bjulbjul al via patro, samtempe per sia sulkoza mano montrante nedefinitan direkton, - ie, filo mia, estas starinta via Sankta monto. Oni diras, ke aglaj okuloj de ĉi tie povas vidi ĝin. - Ŝi sekunde mallaŭte ekridis, poste forte piedfrapis azenon kaj premis ĝian voston. Kiam la azeno spiregante ree ekmoviĝis antaŭen, ŝi diris:

- Nun ni estas ne malproksime mia kabano, filo mia. Vi ofte estis ĉi tie, kiam vi estis etulo. Ĉu vi memoras vi saltetis

sidinte sur miaj genuoj kaj ludis per miaj mamoj?

Sed via patro nenion povis memori.

Kiam la sennoma azeno spiregante finfine haltis antaŭ kabano, Bjulbjul eksciis, ke via patro perdis konscion. Lia kapo senvive ŝanceliĝis sur flankon de azeno, la okuloj estis fermataj, kaj la buŝo – malfermita.

- Tio estis atendebla, - diris Bjulbjul al azeno. - Nenion, poste mi lin ree sobrigos.

Ŝi kraĉis, viŝis sian buŝon, karesis azenon, kiun estis piedfrapinta kaj estis preminta voston.

- Bedaŭrinde li ne povas vidi kabanon, ĉar tio helpus lin revivigi lian memoron, - parolis Bjulbjul kun azeno.

Ŝi detrenis de azena dorso senkonscian vian patron kaj ekinsultis, ĉar lia korpo peze frapiĝis sur tero. Poste insultante kaj trenante ŝi portis korpon internen, trans la sojlo. Por la malsanulo ŝi preparis softan liton. Malgraŭ estis somera varmeco, Bjulbjul kovris lin per ŝaflana dika kovrilo, ankaŭ per kovriloj – donitaj de edzino de Taŝak, ĉar Bjulbjul pensis, ke la ĝinoj de varmo – vagantaj, kiel fantomoj, ne malutilos vian patron, se li estas bone kovrita.

Kiam via patro post tagmeze vekiĝis, aŭdis diversajn voĉojn. Li malfermis siajn okulojn kaj rigardis ĉirkaŭen. Li teruriĝis. Ĉirkaŭ toniro estis sidintaj tri turkaj soldatoj kaj ili konversaciis kun Bjulbjul. Iliaj uniformoj estis tiel malpuraj, kvazaŭ ili estis elrampintaj el tomboj. Rimarkante timon de Vardan, Bjulbjul proksimiĝis al lia lito kaj trankvilante parolis kun li:

- Vi ne timu tiujn, - diris ŝi, - ili estas armenoj. Ili estis

soldatoj de turka armeo. Printempe la turkoj volis ekzekuti ilin.

- Sed kiel ili estas vivantaj, - teruriĝinte flustris via patro.

- Ĉar la turkoj estas malbonaj pafistoj, - diris Bjulbjul, - precipe, kiam ili volas multajn homojn tuj mortigi. Tiuj tri soldatoj tiam elrampis el ĝenerala tombo kaj treniĝinte atingis ĉi tien, por ke mi, kiel taŭgas, kudradu ilin.

Bjulbjul ridis kaj bruligis cigaredon.

- Ili loĝas en montoj, - diris ŝi, - sed iam post iam pasas preter mia kabano.

Tiuj homoj ne interesiĝis pri via patro. Ili drinkis ŝnapson el siaj felsakoj, kaj kun ĉiu gluto deziris unu alian bonan sanon, parolis mallaŭte, kvazaŭ disputis pri grava temo kaj redonadis reciproke akvopipon. Poste ili staris kaj lasis kabanon – nenion lasinte krom siajn fiodorojn kaj densan cigaredan fumon.

Post foriro de viroj Bjulbjul aldonis sekan sterkon en fajron. Nun ŝi estis starinta antaŭ malkovrita fajro kaj en kurba fulgula rostujo rostis kukurbajn kernojn. Kun sia larĝa kaj longa pantalono, griza ŝultrotuko el saka ŝtofo kaj diverskolora ventrotuko ŝi similis birdotimigilon de Jedi Suo, pri kiu superstiĉaj vilaĝanoj diris, ke ĝi en malicaj tempoj viviĝas. Bjulbjul estis starinte iomete kliniĝinte sur rostujo kaj flaras. Ŝia vizaĝo pro respegulo de fajro estis iomete ruĝiĝinta, kaj ĝi sub kaptuko ŝajnis tiel sulkita, kiel la armena tero somere, dum sekeco.

Via patro estis trankvile kuŝinta sur planko nemalproksime maljunulino. Liaj okuloj jam adaptiĝis al duonmallumo kaj al cigareda densa fumo. Baldaŭ li povis

diferenci apartajn objektojn en kabano – kelkajn malpurajn bastmatojn sur planko anstataŭ divano, kelkajn grandajn rondajn kusenojn – trans kiuj aperis kokinaj plumoj, krude preparitan duonŝrankon, du matracetojn – kovritajn per kapra felo, senpordan tenejon kaj bretojn – preparitajn el poplaj branĉoj, sur kiuj estis diversaj ĉifonaĵoj, ankaŭ tabakaj folioj, manĝaĵoj. Sur muroj, estis penditaj kupraj kaseroloj, argilaj potoj, korboj, muraj tapiŝoj kaj jungilaro por azeno. Li rimarkis same olean lampon – metitan ĉe toniro, sur planko, apud kiu ankoraŭ bruletis la akvopipo. Ĝia longa tubo estis etendita al tonira fajro. Iam post iam lia vaganta rigardo rektiĝis al malferma enirejo, trans kio en nebulo estis viditaj montaj siluetoj kun ĝiaj nigragrizaj linioj. Ekstere, antaŭ kabano kuretis gekokoj – bekrastis en maldensaj herboj. Granda bunta koko estis sidinta sur rado de renversita ĉaro. Vardan rimarkis ankaŭ du nigrajn kaprojn – trankvile paŝtintajn ĉe kabano, same sennoman azenon, kiun Bjulbjul ne ligis. Kiam viroj ankoraŭ estis en kabano, Bjulbjul diris al ili:

- Iam mi konis kokon – nomitan Abdul-hamid – apartenitan al familio Ĥatisjanoj – el malsupra vilaĝo. Jes, Abdul-hamid. Mia koko havas nomon Enver-paŝaon.

La viroj ekridis. Unu el ili demandis:

- Sed ĉu vi volus senkapigi ĝin?
- Certe, mi volas, - diris Bjulbjul, - kaj ĝuste hodiaŭ.
- Sed kial?
- Ĉar ĝi estas maljuna kaj netaŭgita.
- Kio okazis kun la koko?
- Ĝi plu ne povas ĝustatempe kokareki, kaj miaj kokinoj mortaĉas frutempe.

- Ĉu frutempe?

- Jes. Frue sia tempo.

La viroj ree ekridis, sed plu nenion diris.

Sur la fajrujo sur stangeto estis pendita mordetita ostoj, deveno de kiu estis malfacile klari. Bjulbjul eligis ostojn de stangeto kaj forĵetis eksteren – en korton. Poste ŝi prenis el tenejo du rondajn kukaĵojn, trempis en sezaman oleon, surŝutis salon, verdajn spicojn kaj donis al via patro.

- Mi buĉos Enver-paŝaon pli malfrue, - diris ŝi, - se la tiuj viroj revenus, estus tre malsataj.

Ŝi eligis poton kun kukurbaj rostitaj kernoj kaj metis sur plankon ĉe lito de via patro. Ŝi mem kaŭris ĉe via patro kaj ekincite diris:

- Vere, kial vi revenis el Ameriko? Kial la homo estas tiom malsaĝa? Tie vi estus en sekura stato.

Ŝi maljunuline ekridetis, poste diris:

- Vi povus eviti de juĝo, Bekira malliberejo!

Subete ŝi komprenas, ke via patro nenion memoras, ne scias ke li estis en Ameriko, nenion sciis ankaŭ pri la juĝo, pri bekira malliberejo kaj enketo.

Vespere ekpluvis. La animaloj serĉis sekurecon en kabano, ĉar ekstere nenio rifuĝejo ekzistis. Unue huffrapante eniris la sennoma azeno – flarante simile granda muso. Ĝin sekvis paro de nigraj kaproj. Poste po unu trapasis sojlon kokinoj, kaj laste eniris la granda, bunta koko.

Bjulbjul turnmovis karbojn en fajrujo kaj kaŝe rigardis kokon Enver-paŝaon, kiun volis buĉi, ĉar ĝi jam estis maljuna. La koko estis fluginta sur tegmenton de tenejo kaj

rigardis Bjulbjul. Ĝia kapo tremis, kvazaŭ ĝi sciis pri ŝia intenco. Via patro prenis kelkajn kukurbajn kernojn el potoj, ekmanĝis klakante kaj arkoforme kraĉante ŝelojn, kiel ĉiam faris homoj de tiu regiono. Li vidis, ke Bjulbjul metis flanken fajrostangon kaj krucinte manojn sur brusto, staris ĉe toniro. Ĉar Bjulbjul ne moviĝis, ŝajnis, ke la koko trankviliĝis. Ĝian atenton allogis kokino – pli granda kaj pli blanka ol aliaj. La kokino turniĝis ĉirkaŭ duonŝranko – serĉante grenojn. La koko levis kapon, streĉis kolon kaj plu ne paciecante saltis sur kokinon. Via patro ridetis kaj pensis: “Tiu estas bona koko. Kial ŝi volas buĉi ĝin?” Li vidis, ke la blanka granda kokino plezure etendis flugilojn kaj premiĝis al planko kaj ekkokblekis, kiam la koko movis ventron, kvazaŭ ĝi volis dispecigi kokinon. Ĝuste tiam Bjulbjul kaptis ĝin, tenante ĝiajn flugilojn. La koko forte kriis. Bjulbjul prenis hakilon – falitan sur planko, metis la kokon sur duonŝrankon, tiel, ke la kolo de koko estu sur ligna malsofta rando. Poste ŝi levigis hakilon kaj per forta frapo tranĉis kapon de Enver-paŝao.

Via patro ĉesis maĉadon. La kapo de la koko falis sur plankon kaj rondiĝis ĉe lia lito. La beko estis larĝe malfermita, kvazaŭ volis ree krii. Via patro abomenante, per piedo forĵetis la kapon de koko kaj rigardis Bjulbjul. Li vidis, kiel la senkapita koko saltetas – svingante flugilojn kaj ŝprucis sangon – makulante Bjulbjul. De la rando de duonŝranko ĝi rondiĝis kaj falis sur grandan blankan kokinon, kiu teruriĝinte estis sidinta ĉe la duonŝranko. Poste ĝi falis sur grunto – kun beko en polvo. La blankaj flugiloj de kokino ruĝiĝis. La koko kaj la kokino kune skuiĝis. Kaj la tio similis lastan aman ludon.

Por ke sensangigi Enver-paŝaon, Bjulbjul ĝin pendumis de lavaĵa ŝnuro. Sub ĝi Bjulbjul metis rondan lavkuveton. La gutanta sango bruetis, kiel pluvo sur tegmento de kabano.

- Tiel ili estis senkapigitaj armenajn virojn en Jedi Suo, - diris Bjulbjul al via patro. - Ĝuste tiel.

- Mi pensis, ke oni estis pafmortigitaj ilin.

- Ne ĉiujn, - diris Bjulbjul. - Plejparte ili estis senkapiĝintaj.

- Ĉu vi ĉeestis?

- Ne, mi ne ĉeestis, - diris Bjulbjul. - La vilaĝa zaptiĥo, kiu ne partoprenis buĉadon, sed ĉeestis, rakontis por mi.

- Kaj kion vi estis vidinta?

- Mi multon ne estis vidinta, - diris Bjulbjul. - Kiam sekvonta matene mi venis vilaĝon, sur stratoj mi vidis senkapajn korpojn. Vidis mi ankaŭ kelkajn kapojn – ruliĝitajn flanken kaj jam estis nekoneblaj.

- Ĉu ĉiujn ili enterigis?

- Jes. Ĉiujn.

- Ĉu ankaŭ la kapojn?

- Ankaŭ la kapojn?

- Sed ĉu pri infanoj kaj virinoj? - demandis Vardan.

- Ilin oni bruligis en preĝejo. - Poste Bjulbjul aldonis. - Ne ĉiujn. Iuj sukcesis saviĝi.

Kiam la pluvo ĉesis, Bjulbjul insultante kaj piedfrapante pelis animalojn el kabano. Tri armenaj soldatoj malfrue revenis, kiam Bjulbjul jam delonge estis senpluminta kokon, elverŝinta sinaĵon kaj pendinta sur fajro. La viroj estis malsataj kaj avide rigardis rostiĝatan kokon.

12.

- Via patro kuraciĝis. Sekvis semajnoj, Bjulbjul flegis kaj nutris lin. Dum somero la ventro estis malforta, ĝi blovis el montoj freŝe, susuris sur tegmento de kabano, iam skuis lignajn malnovajn knarantajn murojn kaj malfacile pasante sojlon – celis penetri fulgulan nigran ĉambron. Sed jam en komenco de aŭtuno la vento fortiĝis. La ĝinoj blovis malvarman aeron sur ravinoj. La vento plu ne susuris. Ĝi fajfis ĉirkaŭ la kabano, kaj kuregantaj kun vento ĝinoj rakontadis pri velkitaj diverskoloritaj folioj. Kiam la vintro jam estis starinta antaŭ sojlo, via patro jam povis paŝi sen bastono. La vundoj kuraciĝis kaj plu ne doloris. Nur la stato de kranio ne estis sufiĉe bona.

Ĉar via patro forgesis ĉion okazintaĵon en pasinteco, eĉ pafojn kaj frapojn, li eĉ ne sciis propran nomon. Kiel infano li demandadis pri aĵoj kaj ne ĉiam postulis respondojn. Bjulbjul ofte parolis pri pasinteco. Ŝi rakontis por via patro ĉion: pri Ĥatisjanoj, pri familioj, pri vilaĝanoj, priskribis aparte ĉiujn, rememoris nomojn gepatroj kaj geavoj. Ŝi rememoris ankaŭ animalojn kun kiuj li ludis dum infaneco. Antaŭ ĉio ĉiutage ŝi celis firmi lian propran nomon en lia memoro, ĝis ŝi konvenkiĝis, ke li ripetas sian nomon kaj ne forgesas. Bjulbjul penadis, kvankam koleregis ofte pro lia forgesemo, malfacila komprenemo. Dum aŭtunaj semajnoj ofte vizitis savitaj armenoj de masakro – soldatoj, virinoj, infanoj kaj aliaj homoj. Ŝajnis, ke ili ĉiuj elrampis el mortaj ravinoj. Ili loĝis en montoj, sekrete venis ĉi tiun kabanon, kiam malsaniĝis aŭ bezonis ion. Ili ankaŭ venis nur montri al Bjulbjul, ke ankoraŭ ili vivas kaj tiel sekrete oni foriris.

- Ili ĉiuj atendas rusojn, - diris Bjulbjul al via patro, - kiuj jam marŝas antaŭen kaj iutage estus ĉi tie.

Fojon vizitis armena pastro. Li estis la sola vivanto el sep vilaĝoj. Kiam li vidis vian patron kaj konvenkiĝis, ke Vardan forgesis ĉion, rakontis por maljunulino historion de Sodomo kaj Gomoro, ankaŭ pri edzino de Loto – ŝtoniĝita kaj fariĝita sala kolono.

- Kial la amoza Dio precize ŝin faris sala kolono? - volis scii maljuna Bjulbjul.

- Ĉar Dio kondolencis ŝin, - diris la pastro, - ĉar ŝi estis vidinta teruregon. Ja amoza Dio scias, ke homo – travivanta tion, ne povas plu daŭrigi vivi kun tiaj memoraĵoj.

Sed Bjulbjul ne kredis rakontojn de pastro. "Tiuĵ ĉi kristanoj multe parolas, - pensis ŝi,- ili troigas kaj mensogas, kiel same pri Sankta Virgulino, kiu nedeflorite naskis infanon. Tiuĵ kristanoj estas fabelrakontistoj. Kaj Vardan, vere, estas same kristano, kaj ege turmentiĝis, sed certe ne estas sala kolono, li nur perdis memoron, nenion plu".

- Kial vi pensas, - demandis Bjulbjul pastron, - ĉu povas esti, ke Vardan Hatisjan konservas sian memoron ie, eble en sia kranio, malantaŭ truoj faritaj de malbenitaj zaptiĵoj kaj ĉeteoj? Ĉu povas esti, ke li intence ne revenigas sian memoron, por ke kolerigi min?

- Se iu kaŝas memoron malantaŭ truoj, - diris la pastro, - do tio estas Dia volo.

- Nu, certe, - diris Bjulbjul, - povas esti. - Ŝi meditis, ekridetis, poste sin turnis al pastro:

- Ni havas la saman Dion. Verŝajne ni ambaŭ devas preĝi por senmemora Ĥatisjan.

Finfine venis la tre adentita tago. La rusoj ekatakis. La ĉefa ofensivo delonge estis komencinta, kaj la marŝo antaŭen prokrastis nur pro pluvema vetero kaj kotozaj vojoj. En 1916-a jaro la cara armeo aneksis grandan parton de Anatolio. Trebizondo, Erzurumo kaj Bekiro cedis. Iumatene Bjulbjul malsupreniĝis en vilaĝon kaj kiam revenis diris al via patro: “La rusoj estas tie”.

En Jedi Suo vivas aliaj homoj. Multoj el ili estis muhaĝiroj, muzulman-emigruloj, al kiuj la registaro de Enver paŝao donis domojn de armenoj, sed estis venintaj ankaŭ kurdoj kaj turkoj, senterpecaj vilaĝanoj kaj amasaĉoj el grandaj urboj. La rusoj ne sciis iliajn lingvojn, sed kun ili drinkadis vodkon kaj ebriiĝite kantis strangajn malĝojajn kantojn. La melodioj de kantoj rakontis pli multe, ol la vortoj. La rusaj soldatoj perfortis virinojn de novloĝintoj. T. e. ili same ne diferenciiĝis de ĉeteoj, zaptihoj kaj kurdaj rabistoj, kiuj faris la saman rilate armeninoj. Tamen ne taŭgas kompari rusajn soldatojn kun lokaj, ĉar rusoj ne mortigis, ne forpelis homojn. Kaj ili bone rilatis al infanoj kaj ne maltrankviligis ilin. Edzinoj de novloĝintoj estis rakontintaj, ke la caraj soldatoj havas grandajn palajn “boletojn” inter siaj femuroj – pikintajn kaj pasintajn tra musko, tute egale, ĉu virina buŝo krias petante helpon de Alaho aŭ ne. Kelkaj virinoj rakontis, ke tiuj ne estis “boletoj”, sed “ŝlosiloj” el malsofta osto kaj haŭto – malfermantaj ĉiujn fermitajn sekurojn. Iulinoj rakontis, ke tiuj abomenindaj svarmoj – trovintaj siajn vojojn al virinaj truojn. La edzoj de ĉi tiuj virinoj estas kolerintaj kaj estis ĵurintaj venĝi.

Kun rusoj estis venintaj armenaj volontulaj batalionoj. Ili estis vestintaj rusajn uniformojn. Multaj volontulaj armenaj soldatoj estis perdintaj siajn familiojn dum masakroj. Kaj okazis tiel, ke kelkaj tiaj soldatoj aspirante venĝi mortigis turkojn ie ajn. Sed multoj ne kondukis tiel kaj diris aliojn, ke ne taŭgas vivi “okulon pro okulo...”.

13.

Printempe la turko Taŝak jungis al ĉaro (dum jaroj starinta en stalo) sian mulon – nomitan Osman, kaj diris al Bjulbjul kaj al Vardan:

- Tiu ĉi mulo estas forta animalo. Mi ŝutis same sur ĉara okso farunon. Nun vi povas serĉadi edzinon de Vardan.

- Kaj lian fileton, - diris Bjulbjul. - Li certe jam estas naskiĝita.

- Ĉu li estis nomita Tovma? - demandis maljuna Sulejman.

- Jes, Tovma, - diris Bjulbjul.

- Mia edzino certe ne estis bruliĝita en preĝejo, - diris Vardan. Ja kelkaj virinoj sukcesis elrampi el fajro. Ili estis fuĝintaj al montoj. Bjulbjul estis rakontinta por mi.

- Jes, konsentis Taŝak, - oni diris, ke okazis tiel.

- Se ŝi ne estis bruliĝita en preĝejo kun aliuloj, - diris Bjulbjul, eble ankoraŭ estas vivanta.

- Ankaŭ lia fileto eble estas vivanta, - diris Taŝak.

- Ŝi estis graveda ok aŭ naŭmonate. Mi ŝin estis vidinta nedelonge masakro. Ŝi havis konveksan, ŝvelan, grandan ventron: do, ŝi ne povis elrampi tra mallarĝa aertruo.

- Se Alaho volu, la kamelo ankaŭ pasos tra truo de kudrilo, - diris Taŝak.

- Ĝuste, - diris Bjulbjul.

- Ŝi estas forta kaj altstatura, - diris Vardan. Bjulbjul priskribis ŝin por mi, ĉar mi estis forgesinta ĉion. Se ŝi estas forta kaj altstatura, sekve certe ŝi elrampis. Kaj mi vetas kun vi, ke ŝi estis unu el virinoj – elrampintaj tra aertruo.

- Eble, - diris Bjulbjul.

- Kaj ni ŝin trovos, diris Vardan. - Ankaŭ ni trovos mian fileton. Mi ekkonos ilin.

- Jes, - diris Bjulbjul.

Kaj tiel ili ekvojaĝis: la maljunulino kaj juna viro sen memoro, sen pasinteco...

- Ni trovos ŝin, - diris Bjulbjul. - Nun mi ankaŭ kredas tion. Ni traveturos ĉiujn urbojn kaj vilaĝojn kaj laŭ vojoj de ekzililoj. Ni demandos ĉiujn kaj ĉie.

- Jes, - diris Vardan.

- Neniu forgesos vian edzinon, kiu almenaŭ fojon estis vidinta ŝin, - diris Bjulbjul, - ĉar ŝi estas tre altstatura kaj ne havas vizaĝon, sed nur okulojn.

- Jes, - diris Vardan. - Vi ĉiam tiel estis priskribita ŝin.

- La vilaĝanoj memoros ŝin. Mi diros al ili: "Vi certe estis vidinta ŝin. Ŝi estas tre altstatura. Ŝia vizaĝo estis bruliĝita, vere ŝi ne havas vizaĝon. Sed havas grandajn armenajn okulojn – la plej grandajn kaj la plej belajn, vidintajn de vi iam kaj ie".

Ili antaŭe veturis Bekiron – serĉi geparencojn, ĉar se Anahit estas vivanta, ŝi estis fuĝinta Bekiron kaj estis kaŝita

ĉe geparencoj. Se Anahit tuj ne povis tion fari, do ŝi aperus tie post veno de rusoj. Geparencoj de Vardan devis scii, kie estas Anahit. Bjulbjul sciis, kie trovas la restoracio "Hajastan". Ŝi memoris Hajkaz – pliaĝan fraton de Vardan.

En Bekiro ili sciis, ke ĉeteoj kaj zaptiĥoj, antaŭ invado de rusoj en urbon, pafmortigis ĉiujn armenojn: metiistojn, kiujn ili bezonis, ankaŭ armenojn-protektatojn de valio. Tio okazis antaŭ fina tago de cedo de la urbo. La rusoj jam estis starintaj antaŭ urbaj pordegoj. Aŭdiĝis ne nur salvoj de rusaj pafilegoj kaj mitraloj, sed jam kelkaj tagoj aŭdiĝis kriegado de rusoj, se konvenis venta direkto. Vere, ili preskaŭ estis tie ĉi, sed efektive ili ankoraŭ ne estis tie ĉi. Interalie, la turka regula armeo jam estis demarŝinta, kaj en urbo estis nur la lasta taĉmento, same ĉeteoj kaj zaptiĥoj – subordiĝitaj al mjudiro, kiu subiĝis al valio, al mutesarifo kaj al kajmakamo. Kiam buĉiĝis la lastaj armenoj ĉi fortikaĵa murzono, la regitaj oficistoj jam estis kolektintaj siajn vojaĝajn valizojn en iliaj risortulaj ĉaroj, kaleŝoj – defenditaj de kugloj per sabloplenaj sakoj, kaj atendis antaŭ Hjukjumeto.

- Laŭ rakontoj de okulvidintoj dum tempto de pafmortigado de armenoj, sur Bekiraj stratoj subte aperis armitaj armenoj – vestintaj turkajn uniformojn. Neniu sciis, kiuj estas ili kaj kiel estis akiritaj armiloj. Ili ne estis multaj, verŝajne sep-ok homoj. Ili celis malhelpi pafmortigadon. Kelkaj ĉeteoj kaj zaptiĥoj mortiĝis de ili, sed, kiel oni diras, ili estis malmultaj, kaj multnombraj ĉeteoj kaj zaptiĥoj finfine estis venkintaj.

Jes. Ĝuste estas. Tiuj armitaj armenoj ne vane mortis, ĉar dum pafmortigado ĉe urbaj orientaj pordegoj kelkaj urbanaj armenoj povis forkuri. Poste ili nekoneble revenis urbon kaj kaŝiĝis ĉe kurdaj kaj turkaj amikoj. Ili ne estis multaj. Tamen ili povis rakonti siajn historiojn al homoj.

Nenia parenco de Vardan Ĥatisjan plu vivis en Bekiro. Travivantaj armenoj – elvenantaj el kaŝejoj, ne estis Ĥatisjanoj. Unu el ili konis Hajkaz – mastro de restoracio “Hajastan”. Li konis ankaŭ Vardan – foje vidinte lin tie:

- Mi tuj ekkonis vin, - diris armeno al Vardan. - Kaj ĉu vi memoras min? En “Hajastan” ni estis sidintaj ĉirkaŭ sama tablo, somere en 1914 jaro. Vi estis novedziĝinta, kaj via edzino estis kun vi.

- Ĉu mia edzino? - diris Vardan – nenion povanta rememori.

- Jes, via edzino, - diris armeno.

- Ĉu vi ree estis vidinta ŝin? - demandis Bjulbjul. - Ŝia nomo estas Anahit. Ŝi havas bruliĝintan vizaĝon kaj grandajn okulojn.

- Mi scias ŝian nomon, - diris la armeno, - kaj mi scias, kiel ŝi aspektas.

- Ĉu vi lian edzinon iam ree estas vidinta?

- Ne, - diris la armeno. - Mi plu neniam estis vidinta ŝin.

Poste Bjulbjul kaj Vardan en ĉaro – kun jungita mulo, veturis tra vilaĝoj kaj urboj de liberigita lando. Ili veturis en ĉaro – kun knorantaj radoj, kiuj, malgraŭ ŝutita faruno, bruis, kiel kutimaniere bruas buradulaj ĉaroj, kies radoj ne turnadas ĉirkaŭ oksoj. Bjulbjul kaj Vardan nek estis evidentaj kaj nek

tute nerigardeblaj. Multoj veturis en tiaj ĉaroj, aliuloj iradis piede aŭ sidinte sur ĉevalaj seloj. Plejparte tiuj serĉis homojn. La vilaĝanoj informis, kiel povis. La homoj celis respondi al demandoj, ĉar estis tempo de serĉado. Sed neniu povis rememori Anahit. Neniu estis vidinta ŝin.

Tagon, en malgranda vilaĝo sur bordo de rivero Tigriso, vilaĝanino diris, ke mem estis vidinta virinon, kiu konvenas al virino – priskribita de Bjulbjul. Jes, ŝi estis vidinta virinojn, infanojn kaj maljunulojn – pelitajn tra vilaĝo. Unu el zaptiĥoj diris al ŝi, ke inter tiuj grupoj estis iuj – povintaj kaŝiĝi en montoj, sed poste ili ree estis kaptitaj. Vilaĝanino memoris unu virinon el kolono. Ŝi estis pli altstatura ol aliulinoj, graveda – verŝajne naŭmonate. La virino ankaŭ havis bruliĝitan vizaĝon – similan priskribitan vizaĝon kaj nigrajn grandajn okulojn. Ŝi ne havis kaptukon – verŝajne ĝi estis perdita. La vilaĝanino montris direkten Tigriso, ĉar zaptiĥoj pelis ilin tien.

La samajn informaĵojn ili aŭdis sur bordo de Eŭfrato. Ĉiam iu insistis, ke scias ion. Multoj estis vidintaj gravedajn virinojn en ekzilaj kolonoj, same altstaturajn virinojn kun cikatrozaj vizaĝoj, ankaŭ ne vizaĝoj, sed viandaj ostaj masoj – kun grandaj okuloj. - Ĉi tie Eŭfrato estis ruĝa, - diris alia vilaĝanino, - verŝajne pro sango de malgrandaj infanoj – ĵetitaj de patrinoj en akvojn de Eŭfroto. Poste ŝi aldonis, por ke ilin ne forŝtelis ĉeteoj, kurdoj, zaptiĥoj, ĉar tiuj sovaĝbeste mortigis infanojn antaŭ patrinoj.

Aliaturkino ekridis kaj diris:

- Ĉio estas malsaĝeco. Eŭfrato estis ruĝiĝita ne pro sango de lulinfanoj, sed pro sango de ventroj de patrinoj. Zaptiĥoj aŭ ĉeteoj disŝiris per glavoj ventrojn de virinoj kaj poste ilin ĵetis sur rifojn. La patrinoj, - diris la sama vilaĝanino, - vivantajn infanojn ĵetis en akvon, por ke ili droniĝis sen sangofluaj vundoj.

Aliuloj insistis, ke tiaj informaĵoj ne estas precizaj, ĉar la zaptiĥoj, kiuj ankaŭ ĵetis infanojn en akvon antaŭe tranĉis iliajn tenerajn koletojn.

- Sed ĉu iu estas vidinta, ke la virino kun bruliĝita vizaĝo estis dronita en Eŭfrato?

Sed neniu estis vidinta. Turka vilaĝano diris:

- Ni ĝenerale nenion estas vidintaj. Ni simple tion scias.

Foje ili renkontis turkmenan vilaĝanon, kiu rakontis, ke dum masakro armenino estis kaŝita en sia domo. Ŝi estis graveda kaj post buĉado naskis. Ŝi ankoraŭ vivas en sia domo kaj havas bruliĝitan vizaĝon. Verdire ŝi ne havas vizaĝon, sed tio ne maltrankviligas turkmenon, ĉar ŝi estas bona, kaj estas obeema. Ili vizitis tiun virinon en domo de turkmeno. La koro de Vardan batadis, eĉ maljuna vizaĝo de Bĵulbĵul ruĝiĝis pro ekscitito.

Sed la virino ne estis edzino de Vardan.

- Ne, - diris Bĵulbĵul, - tiu ĉi virino ne estas Anahit. Ŝi estas alia virino, - diris Bĵulbĵul al Vardan.

En duonnomodaj kurdaj vilaĝoj eĉ en nigraj tendoj de montaj gentoj ili renkontadis armenojn – savitajn de masakro. Bĵulbĵul kaj Vardan miris, ke ekzistas kurdaj gentoj – kaŝintaj

armenojn. Unu el kurdaj bejoj diris al ili:

- Mia gento estas pacema gento kaj ni ne partoprenis buĉadon, ĉar mi estis dirinta al miaj homoj, ke ni devas esti malproksime tiaj aferoj.

- Sed multaj kurdaj gentoj partoprenis buĉadon, - diris Bjuľbjuľ. - Iam ili estis pli kruelaj ol la turkoj.

- Povas esti, - konsentis la bejo. - La turkaj ŝtataj oficistoj estis senditaj siajn heroldojn al montoj informi, ke estos riĉa trofeo, kaj nenia puno. La registaro garantias. Kaj la heroldoj de ŝtataj oficistoj estis rakontintaj al bejoj kaj iliaj homoj, same al paŝtistoj de montaj lokoj, pri bonaj vestaĵoj, pri iliaj virinoj kaj ornamaĵoj. La heroldoj ankaŭ estis dirintaj, ke la virinoj havas truojn – plenitaj de mielo.

Reveninte Bekiron, Bjuľbjuľ kaj Vardan renkontis senpiedan turkon. Li estis ne razita kaj estis surmetinta eluzitan armean uniformon.

- Mi nenion sciis, - diris la kriplulo. - Mi ne sciis ankaŭ, kiam mi kun Kvara kavalerio pasis trans Eŭfrato. Oni diris al ni, ke la ekzilitaj kolonoj iras Surion, kie estis anglanoj kaj francoj, sed ili ankoraŭ estis malproksime. Kaj kiam ni pelis niajn ĉevalojn en akvon, por ke naĝante trapasi riveron, la ĉevaloj rezistis, ne obeis, ĉar Eŭfrato estis plenita de kadavroj. Grandparte estis virinoj kaj infanoj, kaj la akvo estis tiel ruĝa, kiel tonira fajro. Tiam mi ankoraŭ havis du piedojn, ĉar mi perdis piedojn poste – en fronto. Kaj ĉar tiam mi havis du piedojn, mi sen ĉevalo naĝis tra rivero, kaj mian ĉevalon pelis aliuloj. Ĝi baŭmis kaj henis, kiel faras maljunaj ĉevaloj en buĉejo. Kaj, kredis min, amikoj, ke mi nenion sciis, neniu el ni volis scii ion.

Revenante Bekiron survoje, nokte Vardan malleviĝis el ĉaro, dirante al Bjulbjul:

- Mi nur urinos kaj revenos.
- Sed li neniam revenis.

14.

La vilaĝanoj miris, vedante, ke Bjulbjul revenis sole. Kiam maljuna Taŝak maljungis mulon, Bjulbjul diris:

- Vardan malleviĝis el ĉaro kaj plu ne revenis.
- Tre strange, - diris Taŝak.
- Interalie, Vardan diris, ke nur volas urini, - eksplikis Bjulbjul.
- Nenion kompenas mi, kiel homo povas tiel daŭre urini?

La novaj loĝantoj de vilaĝo ne konis Vardan kaj baldaŭ oni forgesis lin. Nur la familio de Taŝak kaj Bjulbjul iam post iam memoris lin.

Ree estis varma somero. La manĝaĵoj estis malmultaj. Sekeco kaj akridoj terurigis vilaĝanoj. La revenintaj soldatoj alportis ĥoleron kaj abdomenan tifon. Malgraŭ tio el urbo venis komercistoj vendi aĵojn. En pasinteco la komercistoj parolis armene, sed nunaj komercistoj estis turkoj kaj kurdoj, same kelkaj judoj kaj grekoj. Nur foje venis armena komercisto. La muhaĝiroj ridis kaj diris: "Tiujn armenajn komercistojn ne eblas neniigi. Rigardu, ili denove etas ĉi tie".

Finiĝis la somera sekeco kaj samtempe malaperis akridoj. Multoj mortis pro ĥolero kaj abdomena tifo. La vilaĝanoj vestojn de mortintoj pendis sur sancta arbo kaj ili

estis konvenkitaj, ke la malicaj animoj – loĝintaj en vestoj de mortintoj, plu ne alvenos domojn de vivantoj. Armenaj toniroj nun nomiĝantaj de mahometanoj tandiro, ankaŭ restis, kaj kuirajoj, kaj restaĵoj de armenoj jam estis finitaj. Baldaŭ venis vintro – frosta, kiel ĉiam. Poste venis printempo: la freŝa herbo, arbaj burĝonoj, floroj. Kaj nenio remorigis pri milito. En fino de 1917-a la komercistoj rakontis pri rusa revolucio, pri rusa cara granda armeo, kaj pri similaj multaj aĵoj.

- Tamen tio ne povas esti, - diris vilaĝanoj, - ni opinias, ke soldatoj ne mortigas sian oficiron. Ĉu tio eblas? Ĉu iu iam aŭdis, ke ia servisto mortigis sian mastron?

- Baldaŭ la rusa armeo ne ekzistos, - diris komercistoj.

- Se tio okazus, turkoj revenus.

La komercistoj pravis. Sed tamen okazis alimaniere. Turkoj ne revenis. La cara armeo kvankam estis malfortigita, sed en ĉi tiu regionoĝi havis sufiĉajn fortojn, por ke defendi aneksitan teritorion kaj frontan linion. Kaj poste, kiam en Turkujo venis ankaŭ unu somero, el Surio alvenis la anglanoj kaj la francoj.

Kiam en 1918-a jaro la sciigo pri kapitulacio de Turkujo atingis vilaĝon, tio pli timigis vilaĝanoj, ol la ĥolero, aŭ tifo, sekeco kaj akridoj. La vilaĝanoj aŭdis, ke la rusoj remarŝis, same remarŝis la anglanoj kaj francoj kaj, kiel diris la komercistoj, nun la lando estas okupita de armenoj.

- Sed ĉiuj armenoj estas mortintaj, - diris vilaĝanoj.

- Ne ĉiuj armenoj estas mortintaj, - diris la komercistoj. - Rusflankaj armenoj vivas, ankaŭ vivas turkflakaj armenoj – pasintaj tra limo kaj fuĝintaj. Kaj ĉi tie, en tiu ĉi landparto

subite estis aperintaj armenoj. Ili elvenos kiel ĝinoj – elirante el siaj nestegoj, el ravinoj, el kavernoj kaj el aliaj kaŝejoj. Antaŭ ĉio tiuj estis armenaj volontulaj batalionoj, kiuj kuniĝis kun cara armeo. Ĝuste, ke la rusoj ankaŭ senarmiligis armenojn, ĉar la rusoj demarŝis, kaj ili ne lasis rusajn armilojn ĉe armenoj.

Sed ili denove akiris armilojn. La armenoj nun estas ĉie. Ili deziras ĉi tie establi novan ŝtaton kaj ĝin nomi Hajastan.

- Ĉu Hajastan? - demandis vilaĝanoj. - Ni neniam aŭdis ion pri tiu ĉi vorto.

Multnombraj armenoj, fuĝintaj en Kaŭkazon, aŭ kaŝiĝitaj ĉe turkoj kaj ĉe aliuloj, estis revenintaj kaj postulas siajn aĵojn kaj domojn. En Jedi Suo tio ne okazis. Ĉu tie neniu estis insisti, ke estis vivinta en Jedi Suo, krom Vardan Ĥatisjan. Sed li nenion postulis, ĉar estis malaperinta.

- Se la armenoj ĉi tie establis regnon, - diris la muzulmanaj vilaĝanoj, - iliaj ŝtataj oficistoj venus Jedi Suon kaj postulus revenigi al mortintoj iliajn domojn. - Ankaŭ revenigi animalojn, - diris la komercistoj, - kaj ĝenerale ĉiojn posedaĵojn.

Sed ree okazis alimaniere. Kiam la cara imperio plu ne ekzistis, la azerbajĝanaj tataroj unuiĝis kun kartveloj. En ĉi tiu unueco ili enprenis ankaŭ rusflankajn armenojn kaj establis portempan ŝtaton, kiun ili nomis Transkaŭkaza Federacio. Tamen ĉar muzulmanaj tataroj ne povis solidare kunvivi kun kristanaj kartveloj kaj armenoj, kaj ĉar la lastaj du nacioj ankaŭ kverelis, kaj same pro aliaj kaŭzoj, la unueco baldaŭ disiĝis. La kartveloj kreis sian propran ŝtaton. La tataroj kaj armenoj sekvis ilian ekzemplon.

Finfine, post multaj jarcentoj la armenoj denove en 28 majo de 1918-a jaro proklamis sian propran ŝtaton – liberan kaj sendependan ŝtaton Hajastan – Armenion. Tiam, en Jedi Suo ĝojegis nur la mortintoj, kiuj mortis pro natura morto antaŭ Granda masakro. La sciigo pri establo de armena ŝtato trans rusa limo atingis Jedi Suon nur dum sekvonta jaro. Kaj nur en 1920-a jaro la vilaĝanoj sciis pri detaloj de vojaĝantaj grekaj komercistoj – alvenantaj el Kaŭkazo. Ili rakontis, ke amerika prezidanto Wilson, pri kiu oni diris, ke li estas la plej potenca padiŝaho en mondo, pli potenca, ol la kajzero, la caro, Abdul Hamid aŭ Enver paŝao, t.e. amerika tiu ĉi granda padiŝaho promesis en traktado pri armistiko de popoloj aparte atenti armenojn, ĉar nenia popolo en mondo dum milito suferis tiel, kiel la armenoj. La komercistoj diris, ke padiŝaho Wilson promesis al armenoj tutan armenan landon, kiun iam posedis la armenoj, antaŭa ĉiu landon – situantan sur vera t.e. turka flanko. Wilson ankaŭ promesis al armenoj monton Ararato, eĉ Erzrumo, Trebizondon – situantan sur bordo de Nigra maro kaj Bekiron kaj grandan parton de montoj ĝis Mediteraneo. Li promesis ankaŭ landparton, kie same vivas turkoj kaj kurdoj, ciganoj kaj diablokultistoj, kaj aliaj popoloj. Sed ĉi tiuj promesoj, - diris komercistoj, - restos nur sur papero, ĉar du grandaj turkaj armeoj nun ofensas frakasi malgrandan armenan ŝtaton, kartografoj havos tempon defini verajn limojn de armena ŝtato sur geografaj novaj mapoj.

Kaj okazis ĝuste tiel. La malvenkita turka armeo denove reviviĝis kaj forpelis fremdajn armeojn el Anatolio. Nun turkoj havis novan gvidanton, kiu sin nomis Ataturk. La komercistoj

diris, ke tiu ĉi Ataturk estas patro kaj liberiganto ne nur de ĉiuj turkoj, sed ankaŭ estas konkeranto. Liaj armeoj jam estis trapasantaj malnovan rusan limon – liberigi Kaŭkazajn popolojn, konkeri ĉiujn novajn malgrandajn ŝtatojn sur tiu landparto, same Armenion. Kaj la komercistoj diris, ke de alia flanko de Kaŭkazo kontraŭdirekten moviĝas aliaj armeoj – dezirantaj ankaŭ liberigi. Tiuj aliaj armeoj ankaŭ proksimiĝis al armena limo. Tiel diris komercistoj. Tiuj estis novaj laboristo-vilaĝanaj armeoj kun siaj ruĝaj standardoj, kaj kun martelo kaj falĉilo – firmitaj sur malnovaj rusaj ĉapoj. Tiuj ĉi du grandaj armeoj – turkoj kaj ruĝuloj, simple frakasus armenan malgrandan ŝtaton. Ĉar la vilaĝanoj ne volis kredition, ĉar havis mizeran imagon, kaj ne povis koncepti, kiel oni frankasus ŝtaton. Tiam unu el komercistoj, por ke estu imageble, prenis ovon de juna kokino en sia granda avida mano, kun plezuro malrapide frakasis ĝin:

- Jen tiel, - diris la komercisto, - simple tiel.
- Bedaŭrinda estis la ovo, - diris la vilaĝanoj. Nun ili komprenis, kion konsideris la komercisto. Sed tio kolerigis ilin, ĉar estis bona ovo de juna kokino. Kaj la ago de komercisto estis antaŭpensita malŝpareco – antaŭ rigardo de Alaho.

Poste kelkaj monatoj, kiam mallongdaŭra sendependa armena ŝtato ree farigis historio, ĝi fariĝis kiel lasta sceno de granda milito, epizodo de ŝakludo en traktado de armistico kaj define de novaj limoj – postulinta tempon, longan tempon.

Denove venis komercistoj, venis de Kaŭkazo kaj rakontis por vilaĝanoj historion pri lacaj piedoj.

- Ĉar la soldatoj havis lacajn piedojn, - diris la

komercistoj, - ne nur soldatoj de Ataturk, sed ankaŭ soldatoj de laboristo - vilaĝana armeo, ĉar la Granda milito daŭris longe, do soldatoj preskaŭ ĉiam marŝadis. Sed la lacaj piedoj de laboristo - vilaĝana armeo estis pli rapidemaj, ol la lacaj piedoj de turkoj. Okazis tiel, ke ruĝuloj glutis armenan sendependan malgrandan ŝtaton ĝis partoprenos aferon Ataturk.

- Tie la sorto de armenoj estas malfeliĉa, - diris la vilaĝanoj.

- Ne, ilia sorto estas feliĉa, - diris komercistoj, - ĉar Ataturk estus aranĝonta grandan masakron. Li estus neniigonta restaĵojn de armena popolo.

- Sed kiel vi sendube scias tion?

- Al mi diris armenina patrino.

- Kion ŝi diris?

- Ŝi diris: "Pli bone estas luli vivantan infanon ĉe ruĝuloj, ol mortintan ĉe turkoj".

- Ĉu ŝi diris tiel?

- Jes, ŝi diris tiel.

15.

Bjulbjul ree aŭdis pri Vardan nur en 1921-a jaro, kiam kelkaj geparencoj de mortigintaj armenoj, kiel pilgrimantoj, alvenis Jedi Suon, por ke preĝi por animoj de siaj forpasintoj – enterigintaj en komunaj tomboj. Unu el venintoj estis tre maljuna. Li konis Bjulbjul delonge. Li konis ankaŭ Hatisjanojn, ĉar estis onklo de ruĝharula forĝisto – de baptopatro de Vardan. En pasinteco la maljunulo ofte vizitis Jedi Suon, li ĉeestis dum unua kaj dua edziĝfestoj de

Vardan. Tiel li konis Anahit kaj sciis, ke ŝia filo, pri kiu ofte parolis Vardan, estus nomota Tovma.

Okazis tiel, ke Bjulbjul, jam tre maljuniĝita, malfortiĝita, vivis pli en pasinteco, ol en nuntempo. Ne ĉiam ŝi komprenis realecon. Bjulbjul sekvis maljunulon kaj iris tombejon. Post preĝo ŝi estis sidinta ĉe maljunulo, sur tero de tombejo. La tombejo estis muta – sen ordinara frustrado de ĝinoj. Ili babiladis. Ĉirkaŭaĵo estis kvietaj. Ili parolis maljunule, kaj ili ne komprenis ĉu rakontaĵo estas pri realeco, aŭ pri sonĝoj, memoraĵoj aŭ imagaĵoj?

- Mi tre deziras scii ĉu Anahit naskis Tovman? - demandis Bjulbjul. - Ĉu ŝi nutris bebon per sia lakto?

- Sed mi estis aŭdinta, ke ŝi kun aliuloj estis bruliĝita en preĝejo, - diris la maljunulo, - celante imagi kiel bruliĝis la preĝejo kun internaj homoj? Kie ŝi naskus infanon? Ĉu la infano naskiĝis en flamoj?

- Sed Vardan pensis, ke ŝi ne estis bruliĝita, - diris Bjulbjul.

- Ŝi estis forkurinta en montojn, sed tion neniu estis vidinta. Anahit kun sia konvekso ventro elrampis el aertruo. Kaj bruliĝitan vestaĵon ŝi estingis per sablo. Poste, dum kelkaj tagoj, ŝi vagadis en montoj, oni ree ŝin kaptis kaj ekzilis direkton Surio kaj Mezopotamio. Ŝi estis en mortigendaj grupoj kaj sian malgrandan Tovman Anahit estis akuŝinta sur grandaj vojoj de morto.

Kaj mi vetas, ke malgranda Tovma estas vivanta, lia patrino poste estis mortinta. Tiu malgranda Tovma estas tolerebla knabo, tolerebla, kiel siaj antaŭuloj – vivintaj ĝis kadukeco.

- Kaj kion pri Vardan? - demandis la maljunulo.
- Mi ne scias.
- Mi aŭdis ion de homoj – konintaj Vardan.
- Kaj kion vi estis aŭdinta? - demandis Bjulbul.
- Li estis fariĝinta armena volontulo, - diris la maljunulo.

- Sed poste, kiam la rusoj malfidis armenojn, ĉar ili tamen deziris krei sian propran ŝtaton kaj interalie en regiono – konkerita de rusoj, kiun la rusoj deziris proprigi, sekve rusoj likvidis volontulajn batalionojn. Kelkajn armenajn komandantojn kaj iliajn soldatojn – nefordonitajn armilojn, oni arestis. Vardan ankaŭ estis oficiro, ĉar estis poeto, sciis skribi kaj legi, same scipovis desegni, komprenis geografiajn mapojn. Oni lin ankaŭ arestis kaj ĉenligis kaj kun aliaj oficiroj ekzilis en Sibiron.

- Kaj tie, en Sibiro, - diris la maljunulo, - li estis iotempe, ĝis komenco de revolucio. Alvenis ruĝuloj kaj liberigis ĉiujn arestitojn. Poste li estis batalinta kun ruĝuloj. En estonto Vardan subite estis aperinta en Erevano, en nova ĉefurbo de armenoj, kie la rusoj nun estis levigintaj ruĝan standardon. Iotempe li estis restinta tie. Oni diris, ke li estis ankaŭ en Surio – serĉi tendarojn de ekzilitoj, ĉar deziris ree scii ion pri sia edzino, ankaŭ scii ion pri sia fileto Tovma – delonge jam naskiĝita.

- Poste Vardan denove estis reveninta Erevanon, - diris la maljunulo. - Printempe la armenoj ribelis kontraŭ ruĝuloj, kiam ilia armeo venis Kartvelion – obeigi kartvelojn. Oni diras, ke Vardan havis gravan rolon en tiu ĉi ribelo. Sed la ribelo nur mallonge sukcesis, ĉar la ruĝuloj estis revenintaj kaj ili por ĉiam restos tie.

- Kion signifas “por ĉiam”? - demandis Bjułbjuł. - Ĉu vi estis vidinta ion eternan en tiu ĉi vivo?

- Vere dire, ne, - respondis maljunulo.

- Ni eĉ ne scias ĉu la morto estas eterna? - diris Bjułbjuł, - ĉar la kreduloj insistas, ke ekzistas ankaŭ Reviviĝo.

- Sed kiu estis rakontinta por vi tiun ĉion? - demandis Bjułbjuł.

- La homoj – konintaj Vardan.

- Sed Vardan ĉu konis tiujn homojn?

- Ne, - diris la maljunulo. - La homoj diris, ke li nenion konis.

- Kaj Vardan kie nun estas? - demandis Bjułbjuł.

- Ie, - diris la maljunulo.

16.

- Kaj mi – Meddah, same perdis spuron de Vardan, - diris mi – la fabelisto, al mia ombro. - Mi nenion povis fari. Sed mi iris laŭ spuroj de aliulo, kiu insistis, ke li mem estas filo de Vardan.

Kaj tiel, mi – nomita Meddah, diris al mia ombro:

- Baldaŭ post fino de tutmonda milito, nedelonge post tio prepariĝis alia nova milito. Kaj ĉar la historiistoj nomis *la grandan militon* ankaŭ *tutmondan*, ili volis difini numeron, por ke ĝi ne perdiĝu en vico de aliaj militoj, ĉar la grandan tutmondan militon – ne havantan numeron, oni povis nomi la Unua. Kaj tio estis tre facile – solvebla problemo – nebezoninta inventon, ĉar kiel la granda parto de inventoj, ĉi

tiu ankaŭ delonge estis trovita kaj necesis nur preteksto, por ke ekspliki al historiistoj: ĉi tiu Dua tutmonda milito nun fakte ekzistas. Kaj la historiistoj kun pura konscienco povas uzi la vorton „Unua,“ por antaŭa milito kaj la vorto „Dua,“ – por la sekvonta milito. Eblas ankaŭ, ke la numero Unua kaj la numero Dua memkompreneble skribiĝos kun signo – № 1, № 2 ... ĉar ĉio havas sian regulon kaj konvenas al orfografion.

- Tamen mi ne volas deflankiĝi, - diris mi – la fabelisto, - vere mi volas nur rakonti pri Vardan Ĥatisjan, kiu perdiĝis en tempo kaj en ventegoj, kaj subite li ree aperis laŭ aspekto de sia filo Tovma. Tiu Tovma ekzistis efektive. Neniu sciis, ĉu li estis babilanto aŭ frenezulo? – elpensanta historiojn, kredante ŝajnitajn, kiel efektivecon. Se vi demandu pastrojn aŭ pastorojn, rabenojn kaj mulaojn aŭ similajn ĉiujn, demandu sanktulojn kaj predikantojn en montoj kaj en valoj, ili ĉiuj insistos, ke la kredo estas sciencaĵo. Kaj tiu ĉi Tovma serioze kredas tion. Li kredas, ke mem estas filo de Vardan Ĥatisjan – el vilaĝo Jedi Suo, kies loĝantoj malaperis, kaj iliaj nomoj jam delonge estas forgesitaj.

Tiu homo, nominta sin Tovma, Tovma Ĥatisjan, post la Dua granda milito estis ofte sidinta en kafejoj de Zuriko kaj rakontis al sataj kaj dikaj homoj de tiu ĉi urbo sian eksordinaran historion. Certe ne ĉiuj loĝantoj de tiu ĉi urbo – Zuriko, estis sataj kaj dikaj. Multoj el ili estis aliaj. Inter ili estis armenoj – travivintaj masakron, homoj – havantaj memoraĵojn, homoj – perdintaj ĉion kaj havantaj nenion. Ili en plezuro aŭskultis Tovma. Preskaŭ dum 60 jaro(tiel rakontis

Tovma Ĥatisjan), li estis daŭre serĉinta spurojn. Kaj li serĉis longe. Li diris, ke mem estis orfo – naskiĝita dum buĉado en 1915-a jaro, sur ŝoseo. Li daŭrigis serĉadon.

- Kaj estis tiel, - diris Meddah. - Tiu ĉi homo neniam laciĝis serĉi. Kaj kiam li jam estis maljunulo – preskaŭ 73 aĝa, li ankoraŭ daŭre serĉadis.

Li estis en antaŭinfarkta stato. Li sentis tion, ĉar la morto en sonĝoj ofte frapis pardonon. Li estis sidinta en kafejo kaj rakontis por ĉirkaŭantoj sian historion – kreskanta ĉiutage, ofte ĝi ŝanĝiĝis, sed konservis la saman direkton. La homo, sidinta kontraŭ li, estis armeno.

- Iam mi konis homon – nomitan Vardan Ĥatisjan, - diris armeno. - Tio estis delonge. Tiu homo nenie povis trankviliĝi. Post la Unua tutmonda milito li estis vivinta en multaj landoj kaj ofte estis ŝanĝinta sian civiton. Finfine li estis akirinta svislandan pasporton.

- Ĉu svislandan pasporton?

- Jes, certe kun alia nomo, ĉar la turkoj iam lin suspektis en spioneco kaj li timis, ke svislandanoj pro tio ne fidus sin.

- Sed kial ili ne fidus?

- Ĉar ĉi tie oni ne ŝatas spionojn.

- Do, li nomigis alie.

- Jes. La nomo Vardan Ĥatisjan nenie estas registrita. Sed ĉiuj lin nomis Vardan kaj li estis el Jedi Suo. Li estis rakontinta por mi pri sia edzino – havinta bruliĝitan vizaĝon: verdure, ŝi ne havis vizaĝon. Ŝi havis nur okulojn – grandajn nigrajn okulojn. Tiu Vardan Ĥatisjan diris, ke ŝiaj okuloj brilis

eksordinare, kvazaŭ ŝi estis vidinta Kriston.

Tiu estas mia patro! - diris la homo – nomanta sin Tovma. - Kaj la virino kun bruliĝita vizaĝo kaj kun sanktaj brilaĵoj en okuloj – mia patrio.

La kunparolanto – armeno, donis al li ian adreson. Kaj en la sama tago Tovma iris laŭ tiu adreso. Sed tie ne estis homo kun nomo Vardan Ĥatisjan. La pordon malfermis maljunulino. Kiam Tovma diris nomon de sia patro kaj eksplikis kiu mem estas, la virino diris:

- Iam ĉi tie estis vivinta armeno. Vere, tre delonge, antaŭ kvardek jaroj. Tiam, en 1942-a jaro ĉi tie estis armeno.

- Do, ĉu dum la milito?

- Jes, dum la milito. Ni – svislandanoj, gloron al Dio, estis savitaj. Tiam iu estis vivinta, kiel luinto ĉe miaj gepatroj, tuj en tiu ĉi loĝejo. Mi tiam estis juna, ankoraŭ tre juna. Ĝuste mi memoras, ke liaj amikoj lin nomis Vardan Ĥatisjan. Tiun nomon li estis ŝanĝinta en dokumentoj.

Kaj la virino diris:

- Tiu luinto, tiu Vardan Ĥatisjan, havinta ankaŭ alian nomon, post kelkaj monatoj foriris. Tio okazis printempe, en 1943-a jaro.

Kaj la virino diris:

- Tagon venis ĉe ni barbula judo, frapis lian pordon. Tiu judo estis unu el malplezuraj homoj. Nu, vi scias – unu el ortodoksoj, kun kripaj haroj sur tempioj, barbula, kun pejsoj sur tempioj, kun felĉapo kaj kun ajlaodoro. Kvankam mi ne flaris tiun odoron, sed mi scias, ke tiuj homoj multe manĝas ajlon. Do, tiel, li venis kaj frapis lian pordon. Poste ili kunekun

foriris. Vardan Ĥatisjan ankaŭ foje revenis kaj diris al mi, ke li devos iri en Pollandon. Mi ne scias kialon.

- Ĉu li veturis en Pollandon?

- Mi ne scias. Mi nur scias, ke li ordigis vojaĝan sakon kaj diris, ke alveturos aŭtoveturilo porti sin.

- Nur eblas imagi, kio estis okazinta, poste - diras mi - la fabelisto. - Iam la homo povas trovi lastan ĝustecon nur en siaj pensoj, - diris mi al mia ombro.

- Kaj kio okazis? - demandis mia ombro.

- Okazis jen kio, - respondis mi.

17.

Kaj tiel mi rakontas fabelon por mia ombro, ĉar la finan serĉatan ĝustecon mi ne scias.

Ne. Tiu ĉi ne estas turka fabelo. Kaj ĝi ne komencas kiel ĉiuj turkaj fabeloj: *bir varmiŝ*, *bir jokmiŝ*, *bir varmiŝ* - estas, ne estas, estas... Tiu ĉi fabelo komenciĝas tute alimaniere. Ĝi komenciĝas, kiel komenciĝas judaj aŭ similaj fabeloj. Pro tio mi nun diras:

Tagon en Pollando estis maljuna judo. Li frapis pardonon de Vardan Ĥatisjan. La judo lin konis, ĉar ofte li konversaciis en kafejo.

- Mi deziras proponi al vi kontrakton, - diris la judo.

- Mi estas poeto, - diris Vardan Ĥatisjan. - Mi ne okupiĝadas pri negocoj.

- La poetoj ankaŭ iam okupiĝas sin pri negoco, - diris la judo. - Kaj la negoco, proponata de mi, estas honesta negoco.

- Honestaj negocoj ne ekzistas, - diris Vardan Ĥatisjan.

- Tamen tiuj ekzistas, - diris la judo.

- Aŭskultu atenteme! - diris la judo. - Mia tuta familio estas en Pollando. La pollandaj judoj grandparte estas malriĉaj, sed mia familio estas ekskluzivo. Ĝi estas tre riĉa.

- Ĉu ĝi estas riĉa? - redemandis Vardan Ĥatisjan.

- Jes, - diris la judo. - La familianoj havas orojn, ornamaĵojn, grandajn valizojn – plenitajn de monoj. Iutage mia familio estas elvenigota el Pollando. Kaj ili ne povos kunporti orojn, ornamaĵojn, valizojn – plenitajn de monoj.

- Jes, - diris Vardan Ĥatisjan, - mi tion komprenas.

- Jen vi havas svislandan pasporton, - daŭris la judo. - Mi nenian havas. Kaj pro tio mi ne povas veturi tien, savi la multtekostajn aĵojn.

- Ĉu mi devos savi viajn multtekostajn aĵojn?

- Jes, - diris la judo. - Ĝuste temas pri tio.

Kaj la judo diris:

- Mi konas svislandan konsulon en Varsovio. Oni pasigos vin translimo en diplomata vagono, laŭ via svislanda pasporto. Ne estos malfacilaĵoj nek akiri vizon, nek en alia demando. Vi kunprenos orojn kaj ornamaĵojn, ankaŭ valizojn – plenitajn de monoj, kaj poste oni en diplomata vagono vin ree pasigos trans limo. Ne timu. Nenio estos kontrolota. Nenio okazos kun vi.

Kaj la judo diris:

- Vi ĉion plenumos senpage, nur bonkore. Ni nenion donas al vi: nek procentojn, nek perantajn monojn kaj nek antaŭpagon. Ĝenerale nenion.

- Jes, - diris Vardan Ĥatisjan. - Mi komprenas.

- Vi ĝenerale nenion komprenas, - diris la judo. - Ĝenerale nenion.

Kaj la judo diris:

- Vi konservos valizojn – plenitajn de monoj, oroj kaj ornamaĵoj ĉe vi. Se miaj familianoj travivus, vi post milito ĉiojn revenos al ili. Mi ripetas: ĉiojn, ĉar en tiu ĉi absolute honesta negoco ne estas perantaj monoj.

- Se ĉu ili ne travivus?

- Tiu okaze ĉioj apartenus al vi. Ĉioj.

- Kaj kiaj estas la ŝancoj?

- Malfacile estas diri, - diris la judo. - Neniu ekzakte scias, kien oni forsendos pollandajn judojn. Ĉu ili revenos aŭ ne?

- Miaj familianoj nenion perdas en tiu ĉi negoco, - diris la judo, ĉar ili ne povas siajn multekostajn aĵojn transpasigi el Pollando, - diris la judo.

- Mi ĉiojn revenigos al ili, - diris Vardan Ĥatisjan. - Kaj se nur unu el ili travivus, mi revenigos al tiu homo ĉiujn apartenaĵojn.

- Nun vi ĉion komprenis, - diris la judo.

- Sed se ili ĉiuj mortus, - diris Vardan Ĥatisjan, - kaj se neniu el ili travivus, do mi prenis multekostajn aĵojn, monojn, ĉiojn.

- Ĝuste tiel, - diris la judo. - Vi estas poeto. Vi ĝuste komprenis.

- En tiu ĉi negoco neniu perdas ion, - diris la judo. - Kaj vi ankaŭ.

- Jes, mi nenion havas perdi, - diris Vardan Ĥatisjan. - Kaj kion vi havas en tiu ĉi negoco?

- Vi ne maltrankviliĝu pri mi, - diris la judo. - Se travivus almenaŭ unu ano de mia familio, li min – zorgintan pri ĉio, ne lasus morti pro malsato.

- Sed ĉu neniu travivus?

- Tiu okaze vi zorgus pri mi, Vardan Ĥatisjan!

La judo ridetis unue.

- Mi konas armenojn, - diris la judo. - Mi konas ankaŭ judojn. Ĉi tiuj du nacioj neniam forgesas tiun, kiu turmentigis ilin. Sed ankaŭ ne forgesas tiun, kiu estis farinta ion bonecon.

- Ĝuste, - diris Vardan Ĥatisjan.

La judo ankaŭ diris:

- Ĝuste.

Kaj tiel en 1943-a jaro Vardan Ĥatisjan veturis en Pollandon, en diplomata vagono, kun svislanda pasporto. Li alvenis en malgrandan urbon. Oni ankoraŭ ne eligis judojn de ĉi tie. Judoj vivis en izolita distrikto de tiu ĉi urbeto, sed ĉiuj estis kunekun. Inter judoj rapide estis disvastigita lia intenco. Kaj ĉar Vardan havis rekomendan leteron kaj afablajn okulojn, la judoj fidis lin. Ne nur la familio de zurikano donis al li siajn monojn kaj ĉiujn multtekostajn aĵojn, sed ankaŭ la aliuloj donis al li ĉion havintan. La sciigo de

emisio de Vardan Ĥatisjan disvastiĝis tra lando kaj el ĉiuj lokoj, kie ankoraŭ vivis judoj, alvenadis kaj alportis siajn monojn kaj multekostajn aĵojn. Ili ĉirkaŭprenis, kisis lin, ĉar tiu negoco estis laŭ siaj gustoj. Ili sciis, ke tiu ĉi armeno estas honesta homo, ĉar lin sendis zurika judo. Ĉar lin diadorantoj konsideris sanktulon, sekve netaŭgas suspekti tiun ĉi armenon.

- Se ni travivus, - diris la judoj, - ĉion ree ni ricevus. - Se ne, kion fari, tiu okaze ni ne bozonus tiujn.

Ili donis al Vardan ŝnapson, intertuŝis glasetojn kun li kaj ploris pro ĝojo, ĉar ili estis renkontinta tian bonan homon, kaj pro honesta negoco.

La diplomata aŭtoveturilo alveturis ĝustatempe – forporti Vardan Ĥatisjan. La valizojn, pakaĵojn, multekostajn aĵojn kun nomlistetoj de mastroj li dislokis en la diplomata veturilo kaj diris al ŝoforo, ke mem devos veturi en Varsovion kaj porti ŝarĝon en konsulejon.

- La konsulo postmorgaŭ veturos en Svisujon, - diris li al ŝoforo. - Poste ni ĉiojn ree enpakos.

- Do, ĉu vi ankaŭ veturas Svisujon? - demandis la ŝoforo.

Vardan ridis kaj diris:

- Memkompreneble.

La ŝarĝon ili mallevigis en konsulejo. Kaj nur kiam Vardan konvenkiĝis, ke ĉio sukcese estas enlokita en ŝlositaj ŝrankoj – malantaŭ rigidaj pordoj, li direktiĝis al sia hotelo.

Vardan Ĥatisjan delonge tiel bone ne estis dorminta. Sed kiam matene li vekigis, eksciis, ke la dokumentoj mankas. Li

renversis ĉion, multfoje kontrolis poŝojn de palto kaj de kostumo, sian malgrandan vojaĝan valizon. Ĉio estis vane. Li telefonis al pordisto, plendis al hotelestro, sed neniu sciis ion.

Li telefonis al konsulo:

- Ĉu vi estis dorminta ne ferminte fenestrojn? - demandis la konsulo.

- Jes, - diris Vardan Ĥatisjan.

- Kaj ĉu dum tuta tempo vi ĉeestis en via ĉambro?

- Nur nokte fojon mi iris necesejon. La necesejo estas ekstere, en koridoro.

- Iu estis en via ĉambro, - diris la konsulo, - verŝajne servistino aŭ aliulo. Multaj popoloj nun vivas kaŝiĝante, ĉu vi komprenas? Ili urĝe bezonas novajn dokumentojn.

- Kion mi faru nun?

- Nenion, - diris la konsulo, - nemaltrankviliĝu. Ni dume preparos novan vojaĝan pasporton. Bone estos, ke vi tuj alvenu nian oficejon.

Kaj tiel Vardan Ĥatisjan elirinte el hotelo direktiĝis al konsulejo. Eventuale en la sama tempo, en la sama kvartalo, kie situis lia hotelo, oni plenumis amastraserĉon. Nenia kompliko estis: la efektivigantoj kaj helpantoj de nova reĝimo volis kapti judojn – senpatrujan amasaĉojn, kiuj havas falsajn dokumentojn aŭ estas sen dokumentoj. Tiel oni insistis. Vardan oni ankaŭ arestis, ĉar estas nigraharula kaj havis neniajn dokumentojn. La helpantoj de nova reĝimo kelkajn homojn kaj Vardan alkondukis fervojan stacidomon. Tio estis ordinara stacio kaj situis proksime hotelo. Ĉio plenumiĝis kvazaŭ ne rigardeble, antaŭ okuloj de preterpasantoj, kiuj

tute ne maltrankviliĝis, ĉar mem havis leĝajn dokumentojn. Multoj eĉ ne rigardis tion, iuj ekridetis, aliuloj malice ridaĉis. En la stacio, kie grandaj homaj amasoj atendis siajn transportojn, ĉio plenumiĝis aranĝite, senallongante atenton, senbrue, neplendante, ĉar la pasaĝiroj sciis, ke ne taŭgas malhelpi novan reĝimon kaj kolerigi efektivigantojn de nova reĝimo.

La plenplenaj kradulaj vagonaroj forveturis el stacio sen malfruiĝo. En vagono de Vardan estis sufoka varmeco, kvankam ne estis somero, sed premitaj homoj per varmo de siaj korpoj varmegis vagonon. La homoj estis trankvilaj: la infanoj eĉ la suĉantoj ne kuraĝis krii kaj ili silente suĉis mamojn de siaj patrinoj. Ju pli la vagonaro malproksimiĝis de urbo, des pli trakviliĝis homoj, ĉar jam estis klare, ke siaj fatoj ne estas ŝanĝeblaj. Tio ne estis tempo de plendoj. Tion sciis ankaŭ Vardan kaj diris mem al si: “Vi povas plendi al svisuja konsulo, sed la konsulo ne estas ĉi tie. Nek telefono estas, nek poŝto. La akompanantoj de tiu ĉi vagonaro ne estas konversaciemaj”.

Tra la kradula fenestro Vardan ekvidis polan pejzaĝon kaj konis: estas la sama pejzaĝo – vidita de si el diplomata veturilo. La samaj estis aromo kaj hela ĉielo de frua printempo. Malsupere nuboj kun vento alvenis birdaroj. Ili alflugis el malproksimaj lokoj kaj li sciis, ke tiuj birdaroj estas unuaj – revenantaj kun printempo en Pollandon, sed estos la finaj, kiujn li vidis en ĉi tiu vivo.

Dum tago daŭre la vagonaro veturis rekten, eble tiel ŝajnis. Kelkaj maljunuloj mortis pro malsato, soifo, lacegiĝo,

kaj restis kuŝinta tie, kie estis mortintaj. Ne estis necesejo, kaj la pordoj neniam malfermiĝis. La homoj zorgis pri naturaj bezonoj tuj tie. Nek estis lokoj kuŝi, nek sidi, kaj la homoj starante fekis kaj urinis. Sed tio neniun ekscitis.

Finfine la vagonaro ie haltis. Tie la pejzaĝo estis alia. Tie estis pikdratoj, kaj trans la pikdratoj estis starintaj grandaj fornoj, kiuj senĉese fumadis. Ĉar la homoj en vagono estis malsataj, soifintaj, havis halucinaciojn, pensante, ke la fornoj estas panbakejoj. Kaj kie estas pano, tie certe ankaŭ estas akvo.

Unu el judoj diris:

- Oni kondukis nin en panbakejon.

Aliulo ridis:

- Oni promesis laboron por ni. Verŝajne ni devos baki panon.

- Ĉu vi ĉiuj estas panbakistoj? - demandis Vardan.

- Ne, - diris unu el judoj. - Sed ĉion eblas lerni. La panbakecon same. Oni nin rekvalitigos.

La vagonaro longtempe restis starinta sur mortaj reloj – en senlirejo. Ĝi nenie moviĝis. Estis silentinta ankaŭ la siblo de lokomotivo. Ĉar la pordoj de vagonoj estis fermitaj, kelkaj judoj ekflaris tra la malgrandaj kradulaj fenestroj. Iu el ili havis bonan flarsenton.

- Stranga odoro estas, - diris li al aliuloj. - Tio ne estas pana odoro.

Nun alioj ankaŭ tion eksentis. Unu el judoj subite ekkriis.

- Tio estas odoro de brulita homa viando!

Kelkaj judoj ekploris, alioj ekhurlis.

Vardan trankviligis ilin:

- Estu trankvile, - diris li. - Ne estas kaŭzo emociiĝi.

Vi aŭskultu min. Mi rakontos fabelon por vi.

Kaj Vardan rakontis por ili fabelon pri Maks kaj pri Moric. Kiam li finis, la judoj estis trankviligitaj.

Kelkaj eĉ ridis. Unu el judoj diris:

- Tio certe estas fabelo, ĉar tiaj aĵoj ne ekzistas.

- Oni bakis panon el Maks kaj el Moric, - diris Vardan. - La panbakisto knedis ilin ambaŭ kun pasto kaj enmetis en fornon.

- Tio estas fabelo, - diris la judoj, - nur fabelo.

- Certe, tio estas nur fabelo, - diris Vardan.

- Sed kiu estis skribinta tion fabelon?

- Germanon. Lia nomo estas Vilhelm Buŝ, - respondis Vardan.

- Tio estas germana fabelo, - diris la judoj.

- Lutage ni kreus statuon de Vilhelm Buŝ, diris unu el judoj, - ĉar li konvinkis nin, ke similaĵoj ĉe germanoj okazas nur en fabeloj.

- Certe, - diris la aliulo – similanta rabenon, - tiu ĉi Vilhelm Buŝ devas esti la plej amita germana verkisto por judoj, ĉar li lernis nin ne timi germanojn.

Vardan estis devigita ree rakonti por ili fabelon pri Maks kaj pri Mopic kaj pri panbakado. La judoj atenteme aŭskultis lin, kaj kiam li finis sincere ekridis. Ili plu ne timis, ili trankviliĝis.

Poste bruante malfermiĝis la pordegoj.

18.

Inter animoj de sufokitaj kaj bruliĝitaj judoj de gaso, animoj, kiuj saman tagon ankoraŭ estis sidintaj sur fumtuboj de brulaj fornoj, estis ankaŭ animoj de unu turko kaj de armeno, kies nomo estis Vardan Ĥatisjan.

- Kiel vi aperis ĉi tie? - demandis Vardan turkon.
- Sed kiel vi aperis ĉi tie? - demandis la turko.
- Mi havis aferojn en Varsovio, - respondis Vardan.
- Ĉu vi estas aferisto?
- Ne, - respondis Vardan. - Mi estas poeto.

- Mi ankaŭ havis aferon en Varsovio, - diris la turko, - mi ankaŭ estas poeto.

- Ĉu vi estis perdinta viajn dokumentojn?
- Jes, - diris la turko. Mi estis perdinta dokumentojn dum amastraserĉo, kaj oni kaptis min kun alioj.

- Sed kion ni atendas ĉi tie? - demandis la turko.
- Signalon forflugi, - respondis Vardan.
- Kaj kien ni flugos?
- Mi ne scias, - diris Vardan.

- Generale muzulmano ne devas ĉieliri kun armeno, - diris la turko.

- Kial?
- Pro fabelo, rakontita de Meddah por mi en unu granda bazaro.

- Pri kia fabelo temas? - demandis Vardan.
- Nu, ordinara fabelo, - diris la turko.

Kaj la turko komencis:

“- *Estas, ne estas, estas ...*

lutage estis mortinta turko, kies animo kun animo de mortinta armeno ĉieliris.

- Kial vi tiel ĝojas? - demandis la armeno.

- Ĉar mi iras ĉielon, - diris la turko. - La ĉiuj kredulaj muzulmanoj iras tuj en paradizon.

- Kaj senkreduloj?

- Ili iras en infernon.

- Sed vi ne povos taksi paradizajn ĉarmojn, - diris la armeno, - ĉar bonon povas taksi nur homo, kiu estis vidinta malbonon.

- Kion vi konsideras?

- Jen kion mi konsideras: kiu almenaŭ foje estis rigardinta infernon, nur tiu poste povas duoble, trioble ĝui ĝojecojn de paradizo, ĉar li scias kia estas inferno.

- Vi pravas, - diris la turko, - nun estas klare.

- Mi kondolencas vin, - diris la armeno, - ĉar vi ne povos vere taksi la paradizajn bonaĵojn, ĉar neniam estis vidinta inferno.

- Kaj kion mi devos fari? - demandis la turko.

- Mi ne scias, - diris la armeno. - Sed bone vi pripensu, eble ion pripensos vi.

Kaj cerbumis la turko kaj diris:

- Kio okazus, se ni interŝanĝus niajn vestojn. Mi surmetos vian nigran palton kaj nur je la sekundo mi rigardos infernon, por ke sciis kio ekzistas tie. Vi, armeno, surmetu mian blankan palton kaj je la sekundo rigardu paradizon.

- Tio estas nemalbona penso, - diris la armeno.

Kiam ili atingis Pordegon de Alaho, la Ĉefanĝelo Gabriel ne estis tie. Lia anstataŭanto – juna sensperta anĝelo ne estis sufiĉe informita pri tiaj aferoj.

- Ni estas interŝanĝintaj niajn paltojn, - diris la turko al anĝelo. - Mi dezirus je la sekundo rigardi infernon, kaj la armenon – paradizon. Por mi tio estos utila, ĉar poste, en paradizo mi estos pli feliĉa. Kaj por ĉi tia senkredulo ankaŭ estos utila, ĉar li devos scii, kion li estis perdinta.

Por la anĝelo estis la sama. Kaj li alkondukis turkon al inferno, kaj armeno – al paradizo. Kaj ĉar el tiuj du lokoj ne ekzistas revenigantaj vojoj, la turko eterne rostiĝos en inferno, kaj la armeno ĝojos en paradizo».

- Tre bela historio estas, - diris Vardan. - Sed kial vi rakontis tion por mi?

- Ĉar la turko ne povas fidi armenon, - respondis la turko.
- Eĉ post la morto.

- Ĉu vi vere timas flugi kun mi en ĉielon?

- Jes, - diris la turko, - mi timas.

La judoj ankaŭ aŭskultis tion historion, sed ne sciis, kia edifo estas por si. Unu el ili diris:

- Atentu. Eĉ la animoj de mortintoj havas antaŭpretajn opiniojn. Se eĉ la animoj ne fidas unu alian, kion ni povos atendi?

La judoj mallongtempe mallaŭte interinsultis. Sed ili poste trankviliĝis, ĉar la amoza Dio donis signalon flugi supren.

Kaj jen ĉiuj animoj kunekun flugis al ĉielo. Nur la lastaj pensoj de iliaj mortintaj korpoj restis sur la Tero, ĉar la pensoj estas nemorteblaj kaj kun ĉiuj deziroj kaj espero – aperintaj dum tuta vivo de homo, eterne vagadas en la mondo.

La Lasta Penso de Vardan ankaŭ estis sidinta sur fumtubo de kremaciejo. Baldaŭ ĉiuj Lastaj Pensoj rektigis siajn flugilojn kaj forflugis. Multaj spiritoj de judoj forflugis en tiun landon, kie finis iliaj vivoj, ĉar tiu estis ilia patrujo, alioj forflugis en aliajn landojn. Kaj grandparto flugis en Jerusalemon.

La turko malaperis el vida horizonto de Vardan. Vardan ŝvebis en aeraj ondoj – observante judojn, flugantajn al Jerusalemo. Li flugis tre rapide, poste pli rapide, ege rapide, kaj finfine atingis judojn.

- Kien vi flugas?
- Al Jerusalemo.
- Ĉu al Jerusalemo?
- Jes.
- Ĉu vi flugos trans Turkujo?
- Certe. Tio lando estas sur vojo al Jerusalemo. Ĉu vi ne scias mapon?
- Mi tre multon estas forgesinta.
- Sed kion vi serĉas en Turkujo?
- La landon Hajastano.
- Ĉu Hajastano?
- Jes.

Flugante super monto Ararato, Vardan aŭdis voĉon – venintan el profundo de Kosmo.

- Mi sendos por vi aglon, - diris la voĉo, - kaj sur flugiloj de aglo vi malsupreniĝos sur Teron.

- Sed ĉu tiu ne estus aglo? - demandis Vardan. - Se tiu estus nur kulo, sur kies flugiloj mi devus malsupreniĝi, kaj se ia muŝo manĝaĉus kulon, kion mi poste devus fari? Do mi neniam atingus Hajastanon.

- Vi, armenoj, estas malkonfidema popolo, - diris la voĉo.
- Vi similas judojn. Neniun vi fidas.
- Kiel ni povas ankoraŭ fidi! - diris Vardan.
- Vi pravas.

- Ĉu vi vere por mi sendos aglon?
- Jes, mi sendos aglon.

Kaj Vardan sur aglaj flugiloj flugis sur monton Ararato. Poste li malsupreniĝis en armenan vastan landon – nomiĝintan ĉi tie Hajastano. Vardan vidis, ke si ne estas sola Lasta Penso – volanta enloĝiĝi ĉi tie. Ĉie estis la Lastaj Pensoj de armenoj. Ili estis sidintaj sur ĉiu floro, sur ĉiu eta herbo, sur ĉiu burĝono de arboj.

La tago finiĝis. Venis nokto. Kaj subite aŭdiĝis flustroj el floroj, el arbaj burĝonoj. La flustroj aŭdiĝis ankaŭ el herboj, kaj ĝenerale la tuta landparto estis plenita de flustroj.

- Kiam la armenoj nokte ekflustras, la turkoj vidas inkubojn, - diris la voĉo.

- Kie estas miaj gepatroj? - demandis Vardan. - Kie estas miaj fratoj kaj miaj fratinoj? Kie estas ĉiuj – amitaj de mi. Kaj kie estas mia edzino?

- Ili estas, ĉi tie, - diris la voĉo.

Kaj subite Vardan ekvidis sian familion. Ekvidis li ankaŭ sian edzinon – sidintan sur unu floro.

- Ĉu vi revenis ĉe mi? - demandis Anahit.
- Mi revenis, - diris Vardan.

Vardan salutis ĉiujn – amitajn de si, poste revenis ĉe Anahit.

- Domaĝe nia filo Tovma ne estas kun ni, - diris li al Anahit.

- Domaĝe, - diris ankaŭ Anahit. - Mi estas tre sopirinta pri li.

- Mi tre dezirus vidi lin! - eksklamaciis Vardan.

- Dum jaroj, daŭre, mi estas revinta pri li, - diris Anahit, - kaj mi provas imagi, kiel li aspektas.

- Mi ankaŭ estis sentinta la saman.

- Ver dire, la nomo de nia filo ne estas Tovma, - diris Anahit. - Kiam la turkoj bruligis min en preĝejo mi vidis vizion.

- Kian vizion?

- Al mi ŝajnis, ke mi leviĝis el flamoj – savi Tovman, etan Tovman, en mia sino. La flamoj ne tuŝas min, ĉar sankta estas tiu, kiun mi havis en mia sino. Estis puŝado antaŭ sola aertruo, ĉar ĉiu deziris unue eliri. Sed la homoj flankiĝis – vidante, ke mi estas graveda. Kaj poste sendefekte elirante el flamoj, malgraŭ mia konvekso ventro, mi povis elrampi tra mallarĝa aertruo. Dank' al subteno de nokto mi fuĝis. Iotempe mi vagadis en montoj, ĝis serĉantaj zaptiĥoj kaptis min. Ĉiutage la suno leviĝis kaj subiris. Kaj mi en sonĝoj vidadis mortajn kolonojn ĉe la bordo de Eŭfrato, sur la ŝoseo.

Tie mi vidadis min – ĉirkaŭitan de zaptiĥoj kaj de malfeliĉaj homoj. Mi sentis, ke la akuŝajn dolorojn jam ekkomencis, ĉar jam estis naŭa monato, kaj ie mi devas akuŝi. Kiam venis la tempo, mi simple kuŝis sur vojjon. Unu el zaptiĥoj per bajoneto gratis mian ventron kaj rigardis, kiel la eta Tovma elrampis el mi kun ĉarma aspekto – eta, malpura, sed senkulpa. Tiam mi aŭdis voĉon – dirantan:

- Lia nomo ne estas Tovma, estas Hajk.
- Ĉu Hajk? - demandis Vardan. - Kiel estis nomita la unua armeno?

- Hajk, - diris Anahit.

- Tio ne estis vizio, - diris Vardan. - Tio estis realeco.

- Kia realeco? - demandis Anahit.

- La alia realeco, kiun la flamoj ne povis ekstermi.

- Tiu okaze ĉu mi estis sur tiu ŝoseo?

- Certe, vi estis.

- Kaj ĉu mi estis akuŝinta tie?

- Jes, Anahit.

- Kaj ĉu mi por vi estis naskinta filon?

- Jes, vi estis naskinta mian filon.

Multaj jaroj ankoraŭ devus esti pasintaj, ĝis Tovma, nun nomata Hajk, trovus siajn gepatrojn. Sed ĉar la Pensoj ne sentas tempon, Vardan kaj Anahit tute ne estis rigardintaj – kiom da jaroj ankoraŭ estis pasintaj. Ili tre multe paroladis pri sia filo kaj tagon ili kune siajn rigardojn direktis al ĉielo. Alflugis la Lasta Penso de Tovma. Lia nomo nun estis Hajk. Fakte tio estis lia nomo. Ambaŭ signalis, kaj Tovma, nun nomata Hajk, kiel la unua armeno, tuj ekkonis ilin. Hajk kisis

kaj ĉirkaŭprenis sian patron, poste li ŝvebis al sia patrino kaj sidis sur ŝiajn grandajn laktodonajn mamojn.

- Mi neniam nutris vin per mamoj, - diris lia patrino. - Nun vi devas tute etiĝi, por ke finfine mi povus nutri vin per miaj mamoj.

- Mi denove estas tute eta, - diris Hajk. - Ĉu vi ne vidas? Mi trinkas vian dolĉoun lakton.

Sur najbara floro estis sidinta estinta armena pastro. Li vidis, kiel Anahit – la Patrino-Hajastan, trovis sian perditan filon – Hajk.

“Hajk estos tre fekunda kaj havos multegajn heredantojn, - pensis la armena pastro. - Kaj liaj infanoj, poste infanoj de infanoj loĝos en tiu ĉi lando, kiu por ĉiam estos iliaj”.

Kaj la pastro meditis pri tio tre longe. Kaj ĉiuj aliaj Pensoj – sidintaj sur floroj, aŭdis voĉon de lia Penso kaj ekpensis la saman.

Postparolo

- Vi ankoraŭ foje estis malfermita viajn okulojn, - diris la voĉo de fabelisto en kapo de Tovma Ĥatisjan.

- Ĉu jam lastfoje?

- Jes, lastfoje.

- Kie estas mia Lasta Penso?

- Ĝi ankoraŭ estas sidinta en via kapo.

- Sed kion pri la fabelo?

- Verŝajne, tio ne estis fabelo.

- Kion vi konsideras.

- Mi simple rakontis por vi, kio povas esti kaj eble kio okazos kun la Lasta Penso – finfine lasante vin.

- Kiam ĝi lasos min?

- Baldaŭ.

Kaj la voĉo de la fabelisto mallaŭtiĝas en mia kranio. Baldaŭ ĝi tute silentos, kaj mi plu nenion aŭdos. Regnos perfekta silento.

Mi scias, ke mia Lasta Penso flugos malantaŭen, al **preterlasoj** en turkaj historiaj libroj. Kaj ĉar mi tion scias, mi mortos pli trankvile, ol mortintoj antaŭ mi, kiuj ne sciis tion.

- Sinjoro ministro! Mi flugas malantaŭen!

- Kien, sinjoro Ĥatisjan?

- Al **preterlaroj** de via historio.

- Sed, sinjoro Ĥatisjan, vi ne povas fari tion.

- Sed kial?

- Ĉar tio povas maltrankvili min.

- Ankaŭ aliulojn tio maltrankvilos, - diris mi, - se la Lastaj Pensoj de mortigitaj armenoj daŭre flustros en lando Hajastana.

- Ĉu vi pensas tiel, sinjoro Ĥatisjan?

- Jes, sinjoro ministro.

- Sed la flustroj estas infektaj, - diris la ministro. - La flustroj de mortigitaj armenoj povas eliri el limoj de lando kaj estos aŭdeblaj ĉie.

- Eblas.

- Sed la aliaj voĉoj ankaŭ komencos flustri, kiuj neniam kuraĝis laŭte flustri. La flustroj fariĝos obtuzaj bruoj, se ĉiuj pereoj en tiu ĉi mondo subite komencus memori homojn pri

siaj fatoj. La tuta mondo surdiĝos pro tio frustrado. Tiamaniere kion ni atingus? Tio estas malpermesita, sinjoro Ĥatisjan. Pro tio dolorus ventroj de multaj turkoj, ĉar voĉoj de flustroj de pereoj embarasas digestecon. Ni povus fariĝi pli enpensigemaj, sed tre multa pensado kaŭzas kapdoloron. Kaj komencus noktaj inkuboj, kiuj sinigus nin je la dormo. Kiu necesas tion. Kaj kia senco?

- Ne ĉio devos havi sencon en tiu ĉi mondo, sinjoro ministro! - diris Tovma Ĥatisjan.

Kaj kun lasta spiro lia animo forflugis.

EREVANA ŠTATA UNIVERSITATO
INSTITUTO DE ARMENSCIENCAJ
ESPLORADOJ

Նկարչ. ձևավորումը՝	Գ. Վ. ՄԱՐԻԿՅԱՆ
Համակարգչային ձևավորող՝	Կ. ՉԱԼԱԲՅԱՆ
Տեքստը հավաքել է՝	Մ. ՀԱՐՈՒԹՅՈՒՆՅԱՆ
Սրբագրիչ՝	Հ. ԴԱՆԻԵԼՅԱՆ
Խորհրդական՝	Է. ՏԱՆՏԻՆԻ (ԻՏԱԼԻԱ)

Ստորագրված է տպագրության՝ 21.03.2017:

Չափսը 60/84 ¹/₁₆: Տպ. մամուլը՝ 10,5:

Տպաքանակ՝ 100:

ԵՊՀ հրատարակչություն, Երևան, Ալ. Մանուկյան 1

EDGAR Hilzentar
LA FABELO DE LA LASTA PENSO
ROMANO
LIBRO TRIA

Desegna dekoracio –	G.V. MARIKJAN
Komputila decoracistino –	K. ĆALABJAN
Tekston enkomputilis –	M. HARUTJUNJAN
Korektistino –	H. DANIELJAN
Konsilistino –	E. TANTINI (ITALIO)

Eldonkvanto – 100.

Eldonejo EŠU, Erevan, A1. Manukjan 1